

SANTIAGO ROSSINYOL

(1861)

Santiago Rossinyol estas samtempe fama pentristo kaj unu el la plej popularaj katalunaj verkistoj. Kiel pentristo li partoprenis multajn ekspoziciojn; li fariĝis fama pro siaj belaj pentraĵoj "Ĝardenoj de Hispanujo". Lia literatura verkaro estas abunda: li verkis dramojn, komediojn, monologojn, novelojn, rakontojn, vojaĝrememorojn, artikolojn kaj tradukojn.

Li estas bonega prozisto kaj dramisto. Fariĝis famaj liaj dramoj, plenaj de emocio kaj sentimentaleco, kelkaj el ili subtenantaj specialan tendencan. Sed liaj plej multaj verkoj estas gajaj kaj ŝercaj. Pli ol ironion kaj satiron, li prezentas karikaturon. La trograndigo de la komika karaktero malsukcesigis kelkajn el liaj teatraĵoj.

Santiago Rossinyol estas tre lerta teatra aŭtoro kaj lerta rakontanto, kaj liaj verkoj reflektas profundan observemon. Sed, eble pro sia karaktero de pentristo, kiu precipe celas impresi, li havas stilon iom senzorgan kaj eĉ kontraŭgramatikan. Tio faras lin malfacile tradukebla. Tamen ni devas diri ke la strangeco de lia stilo, el pure lingva vidpunkto, eble volas reflekti aŭ senkonscie reflektas la fortan originalecon de la aŭtoro, kiu kreis kaj paroligis figurojn en la plej popularaj, plebejaj kaj nedelikataj medioj. Rossinyol kreis la figuron de "Sinjoro Stefano" (Senyor Esteve), kiu prezentas la tipon de la Barcelona komercisto aŭ industriisto de la deknaua jarcento, tre laborema kaj praktika, sed tro rutina kaj senideala. En "L'auca del senyor Esteve" (kiu havas duoblan formon, en komedio kaj en novelo) la eminenta aŭtoro satire atakas la malbonajn flankojn de tiu homotipo, sed samtempe laŭdas la persistemon kaj "saĝon" de tiu speco de homoj, al kies agemo kaj energio oni ŝuldas la materialan progreson de la Barcelona ĉefurbo. Tiu verko, kiun nur loĝinto en Katalunujo povas plene kompreni, iel celas prezenti unu el la ĉefaj trajtoj de la kataluna karaktero, samtempe plena de praktikeco kaj de idealeco.

La sugestia koloro de ĉiuj verkoj de Rossinyol pardonigas pri iliaj mankoj. Entute, li meritas la famon de granda verkisto. Li, filo de riĉaj fabrikistoj, kreskinta en proza medio, sin donis tute al la artista vivo, dum kiu li travivis plej kuriozajn anekdotojn kaj aventurojn. Per la profito de siaj teatraĵoj, tre ofte ludataj en la katalunaj scenejoj, li subtenas muzeon en Sitges "Cau Ferrat", enhavantan prefere ferornamaĵojn kaj aliajn artaĵojn. Rossinyol estas tradukita en la lingvojn hispanan, francan, italan, germanan kaj Esperantan. Siavice li ankaŭ tradukis en la katalunan la "Tartarin" de Alphonse Daudet.

Bibliografio: Ĉefaj verkoj. Teatraĵoj: L'alegría que passa; El jardí abandonat; Cigales i formigues; Llibertat; El malalt crònic; L'heroi; El pati blau; El místic; La nit de l'amor; La bona gent; L'auca del senyor Esteve; La mare; Els savis de Vilatrística (en kunlaboro kun la hispana verkisto G. Martínez Sierra); L'hereu Escampa; Aucells de pas (kun G. Martínez Sierra), tradukita kaj adaptita por la hispana opero "Las golondrinas" de Usandizaga; El pintor de miracles; El despatriat; La Verge del mar; L'Homenatge; El redemptor; La llei d'herència; Cors de dona (kun G. Martínez Sierra); El bon policia; El daltabaix; El titella pròdig, k. a. Prozo: Anant pel món; Oracions; Els caminants de la terra; Fulls de la vida; El poble gris; D'ací i d'allà; Aucells de fang; L'auca del senyor Esteve; El Teatre per dins; El català de La Mancha; De la vida; Andalusia vista per un català; Del Born al Plata; Impressions d'una excursió al Taga. Tradukoj el A. Daudet: Tartarin de Tarascó; Tartarin als Alps; Port-Tarascó.

Multaj el la cititaj verkoj atingis kelkajn eldonojn. La plena verkaro estas eldonita de la libristo Antoni Lòpez, Barcelona.

LA MORFINULO

Laŭlonge kuŝanta sur lito Imperio-stila, kun la manoj falintaj kaj malfermitaj kaj la kapo supren turnita, ŝajnis ke li dormas.

Ŝajnis ke li dormas, sed li dormis iel strange, preskaŭ senpire, flaviginta, kun la palpebroj duonmalfermitaj, kvazaŭ li ne havus forton por ilin fermi.

De tempo al tempo li movis la fingrojn kaj frotis ilin iom sur la littuko; li havis tremetadon ĉe la piedoj kaj denove restis en la peza dormemo.

Stelire, servisto levis la pordan tapiŝon, kaj li, sen moviĝo, ŝignis al li, ke li fermu iom pli la kurtenojn, kaj ĉe tiu duonheleco, kiun donis la blankaj muroj kaj la blankaj mebloj, iom oritaj kun bluaj ombroj, li denove restis inter du sonĝoj.

Li estis maldormanta kaj sonĝis, kaj li sonĝis kun klareco komplota. Li pensadis, kaj li pensadis sen ia malhelpo, sen vibradoj, eĉ sen pulsa ĝeno. "Mi ja ne volis morfinon—diktis al li la penso—Pro tio ke mi ĝin tiom deziradis, mi ĝin ne voladis; sed la neŭralgio, la senenergia kuracisto, mi senenergia, inter la turmento hodiaŭ kaj la turmentego morgaŭa, mi prokrastis al mi la turmentegon! Mi estas perdiĝinta, mi ja ĝin scias, sed mi dormu, ĉar la morto ja venos ĝiafore".

Li volis dormi, sed neeble: ne estis dormemo por dormi, tia dormemo: tio estis la neniigo de la materio, lasante la spiriton je

duonlumo, sed je ia lumo travidebla; tio estis, kio estas la dormo de la fakiroj, la ekstazo mistera de la morto, la heleco fluganta, lumigante la penson, ne tuŝante la karnon nek la ostojn. "Mi timis tiun morfinon—diradis al li la lumo—mi ĝin timis kiel la viro malforta timas la virinon kiu lin enamigas kaj lin elĉerpas; kiel la floroj sendube timas printempon kiu ilin malfermigas kaj ilin sekigas; kiel la papilio la parfumon, kiu donas al ĝi vivon kaj ĝin mortigas. Ĉiam mankis al mi energio, kaj tiu mistera eliksiro, kiu devas ĝin doni al mi, portante ĝin al mi estas mortigonta ĝin. Mi estas tridek-jara. Kion mi faris? Flari la verkojn de la grandaj majstroj, ebriiĝi en ĉiaj literaturoj, gustumi ĉiujn fontojn de la plej pura arto kaj gustumi ĉiujn venenojn. Mi eniris ĉiujn novajn templojn, mi adoris ĉiujn ruinaĵojn, mi atentis ĉiujn religiojn, kaj ne faris nur tion, kion mi devis fari: produkti, paroli, krei, kio estas la sola afero bona, kiu restas sur la tero. Mi ne povis: mankis al mi antaŭenpuŝo; mi vidis la verkon kiel la frukton sur la arbo kaj mankis al mi entuziasmo por grimpi al ĝi; mi vidis la sunon kaj ĝi brilvundis min; mi revis kaj mi ne povis ĉirkaŭpreni la revon...."

Kaj pensante, pensante, kiel tiu, kiu vidas preterpasantan vizion, ŝvitguto ruliĝadis sur lia vizaĝo malsupren, kaj li sentis ĝian malvarmecon kaj ne havis forton por ĝin forigi.

"Sed, ci ĝin donos al mi, morfino, la forton! Tute negrave, ke ci min mortigos poste. Hodiaŭ mem ni laborados! Mi metos en tio la penson kaj ci subtenos la manon, se ĝi volos fali, ĉar ci havas la kuraĝon, kiu al mi mankas. Kaj kian verkon ni faros, morfino! Kian flon havos ni ambaŭ! Kian belaĵon! Ĝi estos la verko de tridek-jara atendado, de dezirado cin havi kaj neebleco cin posedi! Mi rakontos ĝin al ci linion post linio kaj ci movos la volon kaj ĉiu kiso cia estos strofo, kaj tute negrave ke ci min venenos: se la frukto estos bela, venenu min! Mortigu la floran, ĉar por tio estas la floroj: por odori kaj por senfoliigi. Jes: por senfoliigi" li diradis. Kaj la revo fariĝadis pli dolĉa, kaj, fine, ne plu estis revo tio, kion li havis: ĝi estis la ĉirkaŭpreno al la idealo, la elĉerpiĝo sen doloro, la regado de la netuŝebla.

En tiu stato li jam povis direkti la revon: li regis ĝin, li kondukis ĝin, li gvidis ĝin. Se ĝi prezentiĝis en malgaja vesto, li malfermetis la okulojn kaj forkuris: se ĝi estis bela, li retenadis ĝin kun si kaj ame luladis ĝin kaj devigis ĝin disvolvadi ĉiujn iluziojn, kiujn li volis. Dum momento li estis mastro de tio, kio foriras, de tio, kio glitas, de tio nebula, de tio nepalpebla; kaj ĉirkaŭprenante kion oni ne povas teni, li dormiĝis... pro dormado, ĝis la morgaŭa tagiĝo, ĝis la reala heleco lin revenigis al nia vivo.

Li rektigis sin sur la lito kaj la kapturigo klinigis al li la kapon; li viŝis al si la ŝviton, li sidigis kaj rigardante sur la tableton li ektemis. Ŝi! La tentulino! La malvirtulino! La ame malvirta estis tie! Tie apud li! Tute proksime, gardobservante lin! Kion li

faros? Ĉu li lasos ŝin? Ĉu li estos volpova lasi ŝin? Mi redonos—li diris al si mem—mi redonos ĝin al la doktoro. Ĝi ne estas mia. Mi ĝin abomenas" li aldonis prenante ĝin.—Kaj ŝvitante, malvarma, li alproksimigis ĝin al si iom post iom, kaj subite, dum la sango alfluis al la okuloj, li resaltigis ĝin sur la plankon, jetante ĝin kun la sama bedaŭro kun kiu oni jetas la velkintajn florojn, kiujn oni trovas en libro, de virino falsa kaj malbenita.

"Ne! Mi volas esti sola! Sola mi laboros, sola mi iros, kien mi devos iri! Ci ne regos min! Mi ĵuras tion al ci! Mi ne lasos min regi! Mi zorgos mian volon, kaj ĝi estos mia helpanto, ĉar ĉiam estis la volo, komprenu ĝin, kiu faris la fortajn verkojn! Mi foriras—li diradis al si.—Jes... Mi foriras...—Kaj li ne moviĝis.—Mi ne povas resti en tiu medio de malsano. Mi ne povas..." Kaj li ne moviĝis; li ne povis moviĝi. Estis al li neeble moviĝi! Ŝajnis ja ke mistera magneto tenas lin tie alnajlita; ke ia tento nekonata lin haltigas; ke la infero estas trovinta novan povon por detruji la intencojn de la homo. Ok fojojn li iris de la pordo al la tablo, de la tablo al la balkono, de la balkono al la pordo, nekuraĝante krei helpon pro timo ke oni helpos lin; nekuraĝante rigardi sur la plankon, sur tiun tapiŝangulon, kie estas kaŝita la vipuro, timante ĝin, volante ĝin, tremante, serĉante kion li ne perdis; ĝis fine li jetis sin sur la liton, kaj, de la lito, pli ol iam la rigardo fiksiĝis sur tiun vitran pecon, kiu briladis tie kuntiriginta, per koloroj de venena floro, per reflektoj de salamandro, per ĉielarkkoloroj kaj briloj de koleoptero; kaj stariĝante, per unu salto kaptis la serpenton de sur la planko kaj forkuris rigardante posten kvazaŭ li estus ŝtelinta ĝin...

* * *

La morgaŭon li skribadis kaj skribadis sola, sen morfino, propravole. Duhora skribado senpripensa, plenigante pli kaj pli da manuskriptaj folioj, ne polurante ilin, ne stiligante ilin, plumflue, kvazaŭ li ne volus scii kion li skribas, kaj antaŭenirante tra la blankeco de la papero, kvazaŭ ĝi estus glacia dezerto kies transiron li estus decidinta, trairante la dezertlokojn kaj rigardante nur transen. Ŝajnis ke li ne povas halti, ke li ne volas rigardi la horloĝon, ke li atendas kaj timas proksimiĝantan horon, ke li deziras ĝin, timante ĝin; dum la hormonstrilo ĉirkaŭiras, ŝajnis ke la deziro ĉirkaŭiras kun la montrilo; li estus volinta ĝin haltigi kaj li estus volinta ĝin rapidigi; li volus ke ĝi mem haltu; ke la tempo estus la haltinto; kaj ĉar la tempo ne haltas, li volis senpripensigi sin skribante, skribante tiel rapide kiel li povis. Venis momento dum kiu la plumo skribadis sola, kvazaŭ spirito ĝin gvidus, la spirito de la volo, la animo amika, batalante kontraŭ la animo de la horloĝo; sed tiu-ĉi daŭris nekortuŝebla kaj la korpo malfortiĝadis. Ju pli li vojradis, des malpli lin sekvis la mano;

kaj kiam li transiris tiun horon tiel deziran kiel timatan, la tempo ekpaŝis pli rapide ol iam kaj la mano falis elĉerpita.

Malespera, ekscita, malkvieta, "ne povas esti — li diris. — Neble!". Kaj li eltiris la ameman vespon kaj donis al si la pikon.

Vivflamo ekfluis tra la vejnoj, suprenirante, suprenirante ĝis la tempioj, kaj rava bano de kvieteco lasis lin serena, kvietita, certa pri si mem, kvazaŭ la ĉielarko estus lokiĝinta sur la tempioj. Li legis kion li skribis, kaj unu post alia, farante la kritikon pri sia verko, li disŝiradis la manuskriptojn. Li, la homo rafinita, la verkisto bongusta, kiu kunigadis en unu paĝo la mistikecon de Verlaine kun la vibreco de Mallarmé kaj la forto de Baudelaire, estis verkinta tridek foliojn de prozo felietona, vulgara, eĉ malinda. Sed nun kun la amantino malbonkora, kun la sireno malvirta, kun la dolĉa amatino, trompema, li skribos unu paĝon, unu solan, sed skribos ĝin ili ambaŭ, rigardante unu la alian en la okulojn, kisante sin, venenante sin, malvirtigante unu la alian. Kaj gvidata de la sireno li verkis paĝon senpekan, brilan kaj seren, sed ĝi kostis al li dek jarojn de vivo.

Post la revigliĝo venis denove la enreviĝo, kaj, kuŝante sur la lito, kiel ĉiam, li turnis folion en la libro de siaj revoj kaj daŭrigis la legadon: "Mi jam ne forlasos cin, morfino: mi jam estas tute cia; ci jam havas min cia; jam, se eĉ mi volus, mi ne povus. Mi ja scias ke ci estas mortiganta min, ke ci mortigos min iom post iom; sed, kaj la konsoloj kiujn ci donos al mi, kiujn mi ne pagus mortante cent fojojn, mil fojojn en ciaz brakoj, se mil fojojn ci povus mortigi min? Ci suferigos min multe, mi ja tion scias, sed mi mortos kisante cin, adorante cin, amegante cin. Kaj ju pli ci dolorigos min, des malpli mi povos vivi sen ci; ju pli proksimen al la morto ci min portos, des pli mi volos cin apud mi; ju pli ci lasos min sen vivo, des pli da vivo mi venos al ci peti, ĉar ci havas la mian kaj restos kun ĝi kiam ci volos" diris la paĝo, kiun li legis. Kaj tiun fojon li fermis la libron, sen batalo, fordonita, venkita, ne volante fari plian klopodon por liberigi sin de la ĉarma vipuro, nur petante al ĝi unu aferon: ke ĝi helpu lin fini la verkon.

De unu piko li iris al dua; de dua al tria, al kvara, al nekalkulo, al libereco piki lin kiam ĝi volos. Kiel li antaŭvidis, ju pli da veneno des pli da konsolo, kaj por pli da konsolo, pli da veneno. Ju pli li fordonis sin al ĝi, des pli bezonis ĝin; ju pli ĝi sufokadis lin, des pli li voladis esti sufokita; ju pli li trinkis, des pli da soifo; ĝi estis la morto, kiu finigadis lin vivigante lin.

* * *

Venis momento en kiu ŝi estis laca de li; en kiu li jam estis ŝia; en kiu la kisoj, kiujn ŝi donis al li, estis malvarmaj; kaj en kiu li volis pli da veneno kaj ŝi deflankigis la lipojn. La verko

estis nur duonfarita kaj la morto multe pli ol en la vojmezo. Malgrasa kaj kun koloro de bakita tero, kun la okuloj vitrecaj kaj kavaj, li nur atendis la momenton ŝin posedi por denove atendi alian momenton; kaj ĉiam alian, sen ripozo kaj sen moderigo, kun la eterna avido neniam kvietigi siajn dezirojn. Li havis jam la korpon duonmortinta kaj nur vibradis en li la spirito, eklumigante kaj estingigante kun korpremoj neniam kontentigitaj. De unu paĝo, kiun li skribadis ĉiutage, li transiris al skribado de unu sola strofo, kaj de unu strofo al unu linio. Jam la terura kunulino nur gvidadis lin momenton, momenton por karesi al li la harojn kaj tempiojn, kaj por forkuri kiam li plej multe ŝin deziris.

Li atingis la staton senti sin freneza, vidi sin enprofundiĝanta, vidi ke la racio lin forlasas kaj ne havis konscion ĝin voki, kaj perdante la forton... de la forto; li venis al stato lasi sin konduki de la kuracistoj kaj de la amikoj al la supera klopodo por sin savi: lasi sin enfermi en sian ĉambron, sola, sen ŝi, sen tio ke ŝi eniru se li eĉ mortus vokante ŝin.

Kio okazis al li post la enfermigo, oni devus skribi per nigra galo kaj ne per inko. Ĉiuj turmentoj de la mezepoko, ĉiuj doloroj, kiujn elsendas la infero por elprovi la esperantojn; ĉiuj maltrankvilecoj de agonio, kiu, estante agonio, neniam finiĝas, estus palaj por tion klarigi. Ŝajnis al li, ke oni ĵetas lin en la maran mezon, kaj ke li ne scias naĝi; ke li devas malsupreniri en foson de grandega kaj glitiga turo, sin subtenante per la ungoj; ke oni pendigis lin super granda abismo, kaj ke li devas teni la ŝnuron per la buŝo, se li ne volas enabismiĝi. Unue la ŝvito; de la ŝvito al la febro: ia malvarma febro, kiu pulsigos la tempiojn lin frostigante; de la febro al la soifo: ia soifo, kiu revigis lin pri lagoj de putriĝanta akvo por trinki ĉe ĝi; poste la hepato ŝvelante kaj resaltante kvazaŭ ĝi volus liberiĝi el la korpo; kaj laste, la tremetado, tremetado de la haroj, okuloj, fingroj, dentoj; tremetado taga kaj nokta; tremetado pri kiu li sciis, ke ĝi daŭros monatojn senhalte, kaj ĉiuhore, kaj ĉiam! "Venu — li kriadis al la morfino — Venu mortigi min! Se ci estis kruela, estu kompatema! Mortigu min! Mi petegas cin! Mi petas cin! Mi pli preferas morti kun ci ol vivi! Malfermu al mi, pro Dio, ke mi ne volas resaniĝi! Malfermu al mi! Malfermu al mi!" Kaj kriegante kiel kondamnito, li volis sin ĵetegi kontraŭ la murojn, kaj kriadis, kaj petadis helpon kaj oni ne volis lin aŭskulti, kaj li kriadis, kaj la muroj estis kvazaŭ surdaj; kaj li deŝiradis la murpaperon por la ungoj kaj la ungoj fleksiĝadis al li; kaj li rondiradis kiel leono... sciante, ĉiela Dio, ke per unu piko, per unu sola piko de la malbenita virgulino, li trovus konsolon kaj kvieton; kaj nek li povis posedi ŝin, infera fulmo, nek mortigi sin.

Dum momento, kvazaŭ falus al li radio de espero, kolektante ĉiujn fortojn, li stariĝis, alkuris la libroŝrankon, elprenis libron, malfermis ĝin, kaj tremante kiel hidrargo, tie en angulo, li trovis

pakajon da morfino. Neniam la suno, falante sur ruinojn, portis tiom da ora lumo, kiom falis al li sur la vizaĝon! neniam la ĉielo havis tiom da heleco. Ĝin tutan li englutis, ĝis la lasta peceto, ĝis la lasta ero; kaj, kiam revenis al li la forto, kun la tuta puŝo de fulmo kaj la tuta energio de frenezulo, per unu frapo de mal-esperanto, li renversis la pordon kaj forkuris de tiu malliberejo.

* * *

Li forkuris, sed li devis reveni baldaŭ al ĝi, devis reveni al ĝi... por morti.

Plena de ŝveloj, plena de vundoj, kaj ne trovante jam en sia korpo tra kie enigi al si la morton, tra la samaj vundoj li ĝin enigis en sin.

Li dormis jam, mortante de dormado; li jam ne havis volon krom por ne havi ĝin; kaj, dum li estis neniiganta malrapide, iom post iom, la verko, lia verko, servis tie sur la tablo por envolvi morfinon.

Trad. S. ALBERICH-JOFRE.

LA STUDENTO

Sidante sur ŝtona benko, apude de la paroĥejo, la pastra studento rigardadis la ebenajon kaj aŭskultadis.

La paroĥa domo estis malnova, kunigita al preĝejo ankoraŭ pli malnova. Antaŭ ĝi, romepoka portalo staris ĉe la ruiniĝinta fasado kaj subtenis sonorilturon tiel plenan de kavoj, tiel fendigitan kaj plenan de musko, ke ŝajnis ke ĝi ne taŭgas por subteni sonorilojn, sed nur por ke en ĝi nestu la hirundoj; apude estis la tombejo, kie la plantoj, sciante ke tie ripozas la mortintoj, kreskis plej abunde; malantaŭe estis muro, kiu ŝajnis esti konstruita por ke sur ĝi grimpu la hedero; tie, malsupre, staris la unuaj konstruaĵoj de la vilaĝo; malproksime, la vilaĝo vidiĝis inter verdaj terstrioj kaj amasoj da oritaj garboj.

Sur tiu-ĉi malgrandeta ebenajo de la preĝejo, la studento aŭskultadis; kaj li ne aŭskultis la sonorilojn plendantajn pro tio ke estas alveninta alia sunsubiro, nek aŭskultis la siblantajn venton, nek la *Angelus*, nek la kriojn de la hirundoj: li aŭskultis... muzikistaron, muzikistaron ludantan tie, malproksime, en velsalono, kun gajaj kaj festaj sonoj, sed kiuj, atinginte tiun supron trenite tra la ebenajo, estis por la oreloj de la studento pli malgajaj ol plendo.

Kun la kapo apogita ĉe la ŝtonegoj staris la pastra studento, sentante ke ĉiu sono batigas lian malfeliĉan koron; ĉiu bruondegilo lin tremigis; ĉiu krio de tiu muzika metalo ŝajnis lin ensuĉi; ĉiu vi-

brado vekis la kordojn de lia juneco: kaj dum lia koro forkuris, la preĝlibro elglitiĝadis el liaj manoj, ĝis tiu plendanta muziko eligis akran noton, kvazaŭ laŭtan vokon al la vivo, kaj la preĝlibro falis teren.

Timigita kaj konfuzita, li kaptis la libron, kisis ĝin kun dolĉeco, kaj, koncentrigante la penson, ŝajnis ke li demandas al si mem: "Kion vi pensas? Je kio vi pensas, distrita pekanto? Ĉu vi ne memoras, malfeliĉulo, ke morgaŭ vi preĝdiros la unuan meson? Ĉu vi ne scias, facilanima, ke morgaŭ estos la tago, *tiu* tago, kiun vi atendas, la plej solena el via vivo? Ĉu vi ne scias, ke vi ĉesas esti homo pro la savo de la homoj, ke vi iras al la altaro kun dia reprezento? Haltu, pekanto! Atendu! Detenu vin! Se la mondo, tiu mondo malfeliĉa, freneze ĝuas tie en la mallumo de la ebenajo, rigardu la mistikan sonorilturon, kie la lumo ankoraŭ brilas! Se la voĉo de la juneco vin vokas, ne aŭskultu ĝin, ĉar vi ne devas esti juna! Ne rigardu malsupren: rigardu al la alto, kaj pensu ke tie estas la perejo kaj preter tie la espero."

Pensante tion, li foliumis la paĝojn de la preĝlibro, kaj, kvazaŭ li volus distri sian penson, kiu flugis tien kien li ne volis per papiliaj flugiloj, li ensuĉis ĝiajn konsolajn vortojn unu post la alia, kiel gutojn da dormiga herbtrinkaĵo kiuj barus al li la revojn; li konsideris la tentojn kaj refortiĝis per la ekzemploj; li enprofundiĝis en la superhomajn mallumojn por vidi tie brili la ĝloron; kaj ju pli li serĉadis la lumon, des pli la suno subiris, iom post iom, malantaŭ la sonorilturo, malheligante ĝin, estingante guton post guto la violkoloran lumon de la ebenajo, estingante literon post litero ĉiujn literojn de la libro.

Unu momenton plu, kaj aperis la steloj kvazaŭ tremantaj fajreroj; unu plian spiron de heleco, kaj la nigra mantelo de la larĝa ĉielvolbo kovris la teron; kaj, jam ĉio mallumiĝinta, la ĉielo, la vilaĝo kaj la sonorilturo, vidiĝis nur unu sola heleco: la heleco... de la velsalono, kiu brilis kiel fajro; aŭdiĝis nur plendo: la krio... de la malproksima muziko, la konsolaj notoj de tiu muzikistaro, kiu kriadis la voluptecon de la vivo: dezirojn de amo, tentantajn ridojn kaj ebrigaĵojn.

La studento, en la mallumo, rigardadis la ĉielon, rigardadis la preĝejon, rigardadis sin mem, kaj ju pli li volis fermi la okulojn, des pli ilia rigardo forkuris altirata de tiu tentanta heleco. Li stariĝis por foriri, sed li restis tie alnajlita, sopirante pri io kion li ne scias, kaj revante pri io kion li divenas. Tiu fajro, palpebrumanta tie en la malproksimo, ne havis sufiĉan forton por altiri lin, sed revigis lian animon; fine, farante grandan klopodon por forviŝi la iluziojn lin turmentantajn, li eniris en la preĝejon.

La preĝejo estis malluma en tiu horo. La altaroj, la muroj, la volbo kaj la presbiteriejo havis aspekton de kavoj, kun odoro je dezerta domo. Nur iu pendanta oleolampo lumigis malforte iun altaran angulon, kaj tiuj helaĵoj briletis kvazaŭ konfuzaj oraj lu-

metoj, donante pli da malgajo al ĉio vidiĝanta. En angulo diveniĝis kapeleto, kie estis kuŝanta krucifikso, de kiu briladis nur la sango, malseka kaj densa, eliganta fajrogutojn de ruĝa brileco. Genuiĝinta, la studento preĝadis, kvazaŭ li preĝus el la fundo de konscienco en mallumo, kaj li petis rezistemon, virton, forton, precipe forton, kiu helpus lin rezisti. Li preĝadis ke oni deŝiru de li la junecon, se estas ĝi kiu lin malhelpas fari la deziratan oferon; ke oni ne lasu lin sola en la vivo; ke la meson, kiun li baldaŭ preĝdiros, li povu kanti kun la ĝojo de la kantantaj birdoj, sen revoj, sen turmentoj, kun la plej pura animvoĉo kaj sen la malhelpo de la karno.

Lumon el la ĉielo li petis ĉe tiu densa mallumo, helecon por gvido, helecon por celatingo, helecon-esperon, helecon-konsolon, nur ekviditan, antaŭsentitan, divenitan. Lumradion sole, fajron, ĉielajn-helaĵojn; sed ve! la mallumaĵoj ne foriĝadis el la fundo de tiu koro plena de duboj, kaj la preĝejo ne lumiĝis, kaj lia penso tremadis, kaj la sola heleco vidata ne venadis el la altaro nek de la alta volbo: ĝi venis el la mondo, el la trapasantaj lanternoj, el la krevantaj ridoj, el la ĝojfrenezaj junuloj helblindiĝintaj kvazaŭ papilioj de l' vivo, rapidantaj al la granda fajro kiu briladis tie en la ebenaĵo.

Kiam li eliris el la preĝejo, estis plenbruliĝinta pli ol antaŭe tiu tentanta fajro: ĝi ŝajnis forno de homa karno, brulanta de amo bruligita per vivo; ĝi ŝajnis infera kratero, al la okuloj de la studento; ŝajnis la koro de la tuta vilaĝo, flamanta per la ligno de la deziro, kvazaŭ ardanta purgatorio kie la animoj tremadas pro turmento—la turmento de la vivĝojo. Kaj la malproksima muzikistaro daŭrigis sian alvokon per trumpetado malgaja, akra, senlaca; la studento sentis sian koron forkuranta, ekbruliĝanta; kaj liaj kruroj tremiĝis, liaj dentoj klakis, kaj, ju pli la malproksima fajro brulis, des pli li sentis malvarmon ĉe la ostoj.

Kiam li estis enirinta sian dormoĉambron, li fermis ĉiujn fenestrojn, li preĝis la tutan nokton, kaj ankoraŭ penetradis en la ĉambron la flamoj de tiu fajro. Ĝis mateno preterpasis junuloj, kiuj kantadis, ĉiam kantadis; kaj kun tiuj kantoj ĉe la orelo, kiuj traflugadis en lia interno, la pastra studento... senkonsciiĝinta la morgaŭan tagon preĝis sian unuan meson.

Trad. EDUARD CAPDEVILA

LA BARCELONA BROKANTEJO

Vastiĝas la Barcelona brokantejo tra la ĉirkaŭaĵoj de la Vendejo de Sankta Antonio, lokitaj la nefiksaj barakoj ĉe la angulo de grandaj muroj el fero; ĝi daŭras tra la ampleksaj kaj kotaj trotuaroj de la strato Urgell, montrataj la vendotaj komercaĵoj sur la malseka tero, kaj formas ĉe la angulo de la Rondstratoj rondon

de kompaktaj kaj pentrindaj barakoj, sub la arboj kun branĉoj maldikaj kaj plenaj de terkoloraj buloj, kiel paroj da birdoj tremantaj pro la frumatena malvarmo.

La dimanĉojn matene, kiam alvenas la tramoj plenaj de laborkomunistoj irantaj al la urbo por fari siajn aĉetojn kaj amuziĝi; kiam la granda vendejo forĵetas el siaj grandaj buŝoj la servistinojn, kun la korboj tutplenaj kvazaŭ kornoj de la abundeco; kiam la stratoj Carme kaj Hospital estas du riveroj verŝantaj la popolamason en la foiron, estas belega spektaklo tiu abelejo sub la fajro de brilega suno: la iroj kaj revenoj kaj haltoj antaŭ la improvizitaj butikoj de ruinaĵoj; kaj prezentas la plej strangan kontraston tiu popolamaso festotage vestita, inter tiuj malriĉaĵoj kaj restaĵoj jetitaj teren en la plej hazarda nekohereco.

Neniel similas tiu-ĉi foiro la festajn foirojn. En tiuj, kiu iras aĉeti iras tien por plenumi deziron: en tiu-ĉi estas la mizero kiu vokas la malfeliĉajn. Tien oni iras por nove sin ornami: ĉi-tien por sin vesti de malnovaĵoj. Tien oni iras kun la deziro ornamati la korpon: ĉi-tien kun la urĝa bezono kaŝi ĝin je la malagrabla vetero. En tiuj oni vendas iluziojn, kaj en ĉi-tiu malrevaĵojn. La vendistoj ne laŭdas la artiklojn per krioj kiel en tiuj, kie ili devas batali kontraŭ la kaprico: ĉi-tie ili antaŭscias ke estas la mizero kiu helpas la vendadon, kaj ili atendas kuŝantaj kaj dormemaj ke la malfeliĉo alportu al ili aĉetantojn.

Ne estas necese demandi kion ili serĉas kaj deziras alproksimiĝinte al la barako. Nudpiedaj ili prezentiĝas se ili bezonas ŝuojn; tremantaj de malvarmo se ili bezonas surtuton; sen io sur la kapo se ili bezonas ĉapon; kaj tie, el tio multa kaj malbona kion la mizero amasigas, ili ne elektas tion kio pli ornamas, sed kio pli varmigas, kaj ili trovas, en tiu mortintejo de objektoj, malriĉajn vestaĵojn aranĝitajn kaj rebonigitajn por ne morti de malvarmo kaj daŭrigi la vivon.

Tien fine venas tio kion jetis la mondo pro malŝato aŭ enuo, kion donis la malsato garantie ĉe la pruntedonistoj de mono, kion elverŝis la lukso kaj malŝatis la troa riĉeco. Ĉiuj kompatindaj restaĵoj kiujn la morto lasis sur la tero, ĉiuj rememoraĵoj forlasitaj de la tempo per la malvarmo de tuta forgeso, tien alvenas fine; tie ili kuŝas sen varmo sur la trotuaroj, dum la suno kun bela senkonscio lumigas ilin, igante tiun mizeran scenon brila kolorigita scenejo, kie la ĉiela lumo, la vibrado de la atmosfero kaj la matena venteto invitas la homon al la vivo, al la forgeso de la doloroj kaj al la ĝuo de la bonaĵoj de la tero.

Tie, meze de malnovaĵoj, ofte oni trovas ion antikvan; kaj ĉiuj el ni, kiuj sentas la amon por la restaĵoj de la estinteco; kiuj aŭskultas atente la parolon de la rememoro kun obstina fido; kiuj flaras en tiuj mizeraj amasoj ion rakontantan al ni altempajn sentojn, ĉiokiom da emociaj historioj ni povis diveni ĉe tiuj aroj da ruinaĵoj!

Ĉio rememorigas tie ion estintan kaj neniigintan; ĉiu ero konservas en sia ŝvitplena surfaco la premon de amika mano, la sigelon de iu iluzio aŭ la unĝobaton de la elreviĝo; la froto de la vivo tremas en tiuj mizeraj restaĵoj, ankoraŭ varmetaj kaj korbantantaj; en muta, malgaja kvieto ili gardas sekretojn kies atestantoj ili estis; kaj ili aspektas hontemaj sin vidi senvestaj kaj mizeraj sub la ridetanta ĉielo kaj antaŭ la okuloj de tiu mondo da scivolemuloj, kiuj ilin rigardadas avide.

Centoj da aliaj forgesitaj objektoj ĉagrenas la koron de tiu kiu kuraĝas agiti la fundon de tiu ŝaŭmo, de tiu nigra ŝaŭmo, jetata de la homaro dum la ŝtormoj de la vivo.

Tia estas tiu malgaja foiro. Foiro funebra, kvankam ĝi okazas en festotagoj; foiro en nuboplena posttagmezo, kvankam ĝin lumigas la suno de nia lando; foiro plena de forlasiteco kaj ekzilo, malgraŭ la svarmo de la popolamaso kiu superverŝas ĝin per ondoj de koloroj. La aĵoj vendataj en tiu foiro estas la herbo de la alegorio pri malsata scienculo en dramo de Calderón, kiun la mizero kraĉas en la grandajn urbojn, ĉar tiuj mizeraj aĵoj utilas denove al ankoraŭ pli kompatindaj malriĉuloj, kiuj alkuras al tiu lasta rifuĝejo kvazaŭ irante al la promesita tero, kvazaŭ farante la lastan provon antaŭ ol malespero ekokupas iliajn korojn kaj ĉagreno regas la falintan animon.

La objektoj plenaere ekspozataj atendas tie sian destinton, tute dependantan de tia lasta vizito. De tia moviĝema ekspozado dependas la vojo sekvota de ili; tie oni marĉandas ilian sorton ĝis la lasta centimo; sed la Fatalo estas skribita sur ili, ĉar, kia ajn estos la mano helponta ilian leviĝon, ili ne devas forĝi al si iluziojn pri la estonteco ilin atendanta; estas ja certe ke dum ĝia daŭro ili nur vidos novajn dolorojn kaj pliajn mizerojn, ili nur forviŝos aliajn larmojn kaj aŭdos novajn plendojn, ili trapasos alian fojon ĉe la pruntedonistoj, ili vestos korpojn malsanajn kaj partoprenos lastajn dolorojn, kaj, fine, unu fojon ankoraŭ, ili revenos, saturitaj de malinfektaĵoj kaj plenaj de novaj vundoj, al denova montrado de sia doloro, sub la hela ĉielo, ĉe la malsekaj trotuaroj de la Barcelona brokantejo.

PERE RIERA

(1862)

Bibliografio: Sonets.

ANEKDOTO

Mi rakontos al vi tre strangan agon
ĉeestitan de mi trans la landlimo.
Iuloke, kun ia fortesprimo,
ia vir' al mi diris, iun tagon:

“Ĉe gento plej altranga vi nun estas
ĉar multan gloron ni konkeris ĉie.
Ni regis multajn landojn, kvankam tie
nun al ni ne tre vasta loko restas.”

Kun mano ĉe prenil' de brila spado
kaj turnante rigardon al palaco
minacanta je fal' maltrankvilige:

“Nur ĉe ni—li sin vantis—estas paco.
Eblas nur tie-ĉi saĝa vivado.
Vi ne parolas kiel mi: mirige...”

JAUME MASSÓ TORRENTS

(1863)

Jaume Massó Torrents, naskiĝinta en Barcelona, poeto kaj prozisto, dediĉis sin ankaŭ al la historio, la filologio, la folkloro kaj la bibliografio. Li multe vojaĝis. Li fondis la eldonejon "L'Avenç" kaj eldonis "Biblioteca Popular" kaj "Revista de Bibliografia Catalana". Li publikigis, kun kritikaj notoj, la verkojn de la klasika poeto kataluna Jordi de Sant Jordi kaj la antikvan katalunan tradukon de la "Decamerone" de Bocaccio. El liaj kritikaj studoj pri literaturo, distingiĝas liaj diversaj monografioj pri la trobadoroj kaj lia "Bibliografia dels antics poetes catalans".

Kiel literaturisto, li verkis poemojn, romanon, lirikan dramon kaj serion da "Pireneaj Skizoj" atingintaj grandan sukceson. Jaume Massó Torrents estis prezidanto de "Centre Excursionista de Catalunya", la ĉefa el niaj ekskursaj societoj, kiu dediĉas sin ne nur al la praktikado de la pireneismo aŭ "alpinismo", sed ankaŭ kulturis la arkeologion, la folkloron kaj la natursciencojn.

Bibliografio: Ĉefaj verkoj. Croquis pirenencs; Llibre del cor; Natura; La fada (lirika dramo); Desil·lusió (novelo). Studoj literaturaj kaj bibliografiaj: L'antiga Escola poètica de Barcelona; La cançó provençal en la literatura catalana; Bibliografia dels antics poetes catalans; Historiografia de Catalunya; En Marian Aguiló; Les obres de Fra Francesc Eximenis; Obres poètiques de Jordi de Sant Jordi; Manuscrits catalans de la Biblioteca Nacional de Madrid; Manuscrits catalans de la Biblioteca de S. M. Tradukoj: Contes populars del Japó.

VAGANTE TRA LA MONTARO

Paŝtistoj kaj brutaroj

Kiam oni troviĝas tute sola, ĉe la montaro, sen ia kunesto krom tiu de fagoj kaj abioj, sen alia konversacio ol la gaja bruto de la malgrandaj akvofluoj glitantaj sub la herbo aŭ la senfine karesanta kantado de la vento tra la arboj, tiam oni plene sentas la allogon de la montaro.

Ĝi estas ravanta amo, kiu logas la enamiĝeman koron parolante per dolĉegaj voĉoj pri siaj ĉarmoj sen fino kaj voluptaĵoj sen lacigo.

Kaj oni lasas longigi la momentojn de rigardado, kaj, ĉar neniam sufiĉe oni estas ĝuinta ĝiajn belaĵojn, kiu ĝin vidis dum la tago, tiu volas ankaŭ surprizi ĝin nokte.

Estas frumateno de Aŭgusto kaj antaŭ du horoj mi pasis tra Noedes, vintra vilaĝo donanta nomon al la mallumaj lagetoj situataj inter la montpintoj apudaj al Madres, la altega montsupro kiu apartigas de la franca la katalunan landon. Mi iradas supren, supren, ravataj la okuloj, daŭre fortigata de la pura kaj freŝa aero, kontenta pri la unua parto de la ekskurso kaj eĉ pri la soleco min ĉirkaŭanta, kiam subite mi eniras en la arbaron. Ho, kiel belega arbaro! La vojo, malmulte signita, serpentiras meze de gigantaj fagoj, kiuj ĉe la supro de la branĉaro estas tutplenaj de folioj, inter kiuj treme vidiĝas la ĉielbluo. Mi vojiradas kaj dume regalas miajn orelojn la sennombraj sonoj de la Naturo, je kiuj agordiĝas la ritma bruo de miaj paŝoj. Kuŝas surtere sekaj branĉoj, disŝiritaj de la uraganoj aŭ la fulmo. De tempo al tempo, la malluma verdo de unu pino kontrastas la gajan verdecon de la fagaro; sed la pinoj pli abundas ju pli mi marŝas, ĝis kiam mi aŭdas la pendtintilojn de la unua brutaro. Baldaŭ mi vidas la herbejojn kaj la bovinojn kiuj tie sin paŝtas trankvile, dum aliaj ludeme kuradas skuante malkvietege la voston. Mi jam alvenas tien; mi renkontas knabon, kiu min alkondukas al la paŝtisto.

La paŝtisto estas forta junulo altkreska, kun aspekto kaj parolo tre kamparanaj. Li ne razis sin de post la printempo kaj estas tre ŝparema je vortoj. Mi invitas lin trinki vinon kaj manĝi iom da viando por paroligi lin.

Li naskiĝis en Noedes mem, de kies komunumo li estas la paŝtisto, kaj ĵus de antaŭ kvar monatoj li estas alveninta el Madagaskar, kie li plenumis la tri jarojn da militservo. Kaj mi estis imaginta lin, pro lia aspekto, junulo neniam forlasinta tiujn valojn! Pri sia mallonga restado en Perpinyà kaj en Marsella li nur havas konfuzan ideon; kontraŭe, li bone rememoras la tridek ses tagojn ĉe maro kaj la teruran soifon kiun li tie suferis, pri kiu li mem ne povis kompreni:

—Ja mi ne scias, kial mi havis tioman soifon meze de tiom da akvo; ia soifo, kiu al mi lasis la gorĝon tiel seka kiel mia bastono.

Sed nenio pli miriga ol aŭdi lin paroli pri tiu malproksima insulo, pri tiu lando kun tiel bela kreskajaro, kie li tiom nostalgiis siajn arbarojn, siajn herbejojn, siajn brutarojn kaj sian lingvon.

"Tiu ĵ hováj ja ne donis al ni unu nokton trankvilan en nia posteno. Estis al ni, la artilerio, al kiuj ili havis ĉiam la minacon; kaj ili estas ruzuloj kiuj ne eraras la pafon eĉ unu centimetron".

Ĉar li konas preskaŭ nur la Madagascaran insulon kaj la ĉirkaŭaĵojn de Noedes, li komparas ilin tre ofte. Li strange impre-

sas min, kiam, signante la senhomajn montarojn de la ĉirkaŭaĵoj, li diras konvinkite:

“Tie, en Madagascaro, ne estas ja la civilizacio kiel tie-ĉi”.

Sed eĉ kun bedaŭro, mi devas forlasi lin, ĉar pli efikas en mi la deziroj vidi la lagojn ol la agrabla kunesto de tiu bona viro. Li montras al mi la vojon, akompanante min dum mallonga tempo, kaj diras al mi, ĉe la adiaŭo:

“Vi ja ne povas erari: vi devas postlasi tiun montflankon kiun vi vidas de tie-ĉi; unu horon poste, vi renkontos la paŝtiston Janot meze de liaj ŝafoj, kiu gvidos vin. Nu, adiaŭ! Bonan vojiron”.

Mi malproksimiĝadas de li. Mi marŝas tra ebenaĵo kun herbotapiŝo tiel malseka kaj mola, ke miaj piedoj eniĝas en ĝin. Tra tiu herbejo ankaŭ disigis sin la brutaro. La bovinoj, ĉe mia paso, haltas kaj min rigardas longan tempon per siaj okuloj nigraj kaj fiksjaj, kvazaŭ suspektemaj pri mi, tute ne havanta intencon ĝeni iliajn orkolorajn bovidojn. Mi trairas la tutan ebenaĵon, tre ondli-nian, ĉie plenan de malgrandaj riveretoj kiuj ŝajnas ŝpruci rapidaj je mia surpaŝo sur la herbo. Ĉe tiuj regionoj altaj kaj serenej, kie ĉio eliĝas kvazaŭ per sorĉa arto, oni sin sentas foje time-ma kaj ŝajnas ke oni malhelpas al la Naturo. Ĉio montriĝas tiel mola al miaj ravataj sentoj! La riveretoj, ĵus naskiĝintaj, rapidas forkuri de apud mi, reapertaj baldaŭ kun mil infanaj ridetoj. Kiu povas rezisti la deziron senti korbati tiel proksime la vivon, sen alia bezono ol malfermi la okulojn kaj pretigi la orelon?

Mi daŭrigas la supreniron tra ŝtonriĉa regiono, kaj nelonge poste mi turniĝas por rigardi la herbejon de mi trairitan kiu vastiĝas kvazaŭ granda helverda tapiŝo, streĉata de la grizaj rokoj kiuj neegale ĉirkaŭas ĝin. La bovinoj, apud kiuj mi trapasis, nun vidiĝas malgrandaj kaj malproksimaj, malproksimaj: nur kun granda atento mi aŭdas la sonoron de la pendtintilo kiam la tiktak de mia pulso ne malhelpas tion. Antaŭ mi, en la malproksimo, mi ekvidas pli kaj pli da montaroj montrantaj siajn ostoriĉajn spinojn ambaŭflanke plenajn de arbaro.

Mi trairas tre ŝtonplenan intermonton, kaj denove mi troviĝas meze de herbejoj. Tuj mi aŭdas la bojadon de hundo atentinta pri mi. Ĉe la supro de roko, kaj kvazaŭ parto de ĝi, staras la paŝtisto kun malmultaj ŝafoj kuŝantaj kaj kaprino grimpinta, kiel li, supre de ŝtono. Mi alproksimiĝas: li devas estis la anoncita Janot.

Surprize vidante tiom malmultajn brutojn mi parolas pri tio al tiu viro, dum mi sidiĝas apud li.

“Mi paŝtas malmultajn, sed mi paŝtas miajn” li respondas.

Li estas maljuna, malalta kaj dika, sed malgrasvizaĝa. Galoŝojn, pantalonon kaj peltvestaĵon, ĉiun aĵon li portas ĉirkaŭnaj-lita aŭ alkudrita unu al alia, kvazaŭ li timus apartiĝi de la vesto kiel de la propra haŭto. Li estas tre parolema, kaj kun paŭzoj kaj rompitaĵoj li rakontas al mi sian tutan vivon. Li, dum siaj feliĉaj tempoj, estis alkondukinta al la montaro du, tri, eĉ

kvar centojn da bovinoj. Nuntempe tio-ĉi malprosperas: la gubernio havas la manion replanti arbaron, kaj aĉetas devige la komunumajn paŝtejojn por tie meti siajn plantejojn; kaj, kie ĉiam estis herbo, tie la arboplantado ne prosperas, kaj la popolamaso forlasas la vilaĝojn, kie malpliigis senĉese la bovbrutaro pro manko de paŝtejoj. Ĉi-tio kaŭzas, ke la monrimedoj en la nuna tempo estas malgrandaj kompare al la antaŭa, kaj la paŝtisto zorganta ok aŭ naŭ dudekojn da brutoj kredas sin granda kapitano. Kaj li, rememorante, parolas:

—Mi ja estis kvazaŭ generalo komandanta siajn trupojn. Ĉiuj bovinoj min konis, kaj mi ŝangis ilin je herbejoj, laŭ mia ordono, sen iama perdiĝo de unu sola bovino. Foje, sinjoro erarinta tra la montaro atingis min ĉe mia kabano, kaj mi memoras ke li demandis, kio mi volus esti se mi havus multe da soldoj. “—Se iam riĉa—mi diris al li—mi ne volus ja ŝanĝi la metion: ĉiam paŝtisto, paŝtisto mian tutan vivon, sed ke la bovinoj estu miaj kaj ne de la mastroj”. Nu, jam estas veninta la tempo kiam ja mi ne bezonas penadi por doni panon al la multnombra familio: ne estas al mi necese veni en la montaron; sed ĝi estas mia plej granda plezurigo, kaj, kvankam mi ne havas sufiĉe da mono por paŝti tricient bovinojn miajn, tamen mi havas sufiĉan por paŝti dekduon da ŝafoj, kaj mi estas kontenta kaj feliĉa.

Kaj li estis tia! Filino lia estis prospere edziniĝinta en Perpinjā, kaj komence nek ŝi nek lia bofilo volis ke li tiel maljuna restadu en tiuj montaroj farante mizeran vivon. La paŝtisto, dum la unua vintro, estis rezignacie restinta ĉe la vilaĝo; sed kiam printempo ekfloris kaj de malproksime li vidis ke la suno fandas la neĝon de la monto Canigó, li komencis nostalgii kaj senti ĉiujn malĝojojn de la elmigranto. La postan printempon la gefiloj devis konsenti lian foriron, por ke li ne mortu dum la somero. De post tiam, la patro restadas ĉiujn somerojn ĉe la montaro paŝtante kiom li volas, kaj ĉe la alveno de aŭtuno, li adiaŭas la montojn ĝis la venonta somero, kaj ekaperas, tute gaja kaj fortigita, en Perpinjā, por pasigi tie la vintron.

Mi decidis daŭrigi la vojiron supren, ĉar aŭskultante tiun paŝtiston mi eble perdus tro da tempo. Kiam mi foriris, li ne forĝis doni al mi salutojn por mia familio *multnombra*. *Multnombra* estis, por li, la plej bona adjektivo kaj la plej ĝentila.

La mallarĝa valo tra kiu fluas la rivereto venanta el la gurgoj estas tute ŝtonkovrita; sed en la fundo fluas la akvo sur milda muska kuŝejo. Poste la valo plilarĝiĝas, kaj maldekstre altiĝas longega monto plenkovrita de arboj, herbo kaj kreskaĵetoj. Subite mi vidas blui la gurgon Estelat. La surprizo kaŭzata de la apero de tiom da akvo meze de la abruptaj montsuproj ekposedas mian spiriton, ĉar ĝi estas neatendita impresio kiu profunde gravuriĝas. Mi avide rigardas la moviĝemajn ondojn, kiujn la venteto gracie formas ĉe la bordo kie mi troviĝas kaj pelas ĝis la

alia bordo: ĝi estas milda luletado pli vere ol ondo. Kelkloke la akvoj kisas la nudan rokon. Trunko de kolosa abio, kiun la neĝoj aŭ la fulmo mortigis, kiun la fortaj ventegoj igis blanka kiel marmoro, kuŝas flosante sur la akvo kvazaŭ forĵetita kranio. La soleco altiras kaj timigas samtempe en ĉi-tiu pejzaĝo danteca. Mi kuŝiĝas apud la akvo, kaj mi ĝuas longtempe rigardante jen la lageton, jen la ĉielon, jen la rokojn grandegajn, grizajn, krutajn. Ho! kiel dolĉe estas pensvagadi tie-ĉi kaj en tia sinteno! Kiel belege devas esti, en stelbrilanta nokto, vidi kiele tie-ĉi enspeguligas la steloj! Kiel bone oni komprenas, estante tie-ĉi, ke la soleco estas patrino de la timo! Kiel la legendo trudas sin! Oni vidas ĝin formigantan en la inteligento de la kompatindaj paŝtistoj izolitaj el la mondo. La lago naskas sentojn de miro kaj respekto. Al tiu, kiu troviĝis apud ĝi dum neĝaj ŝtormoj aŭ meze de siblanta vento en malluma nokto, prezentigis timige la terura ideo pri la infero. Tiu-ĉi estas loko de sorĉistinoj kaj de diabloj. Unu fojon ĉiujare venas beni ĝin la paroĥestro de Noedes, por forigi de ĝi la spiriton de l'malbono. Neniu kuraĝus jeti ŝtonon en ĝin, pro timo al terura puno: eble el tie leviĝus nuboj gravedaj de fulmoj kaj tondroj. Sed insiste aperas ĉe mi la deziro kaj la infana espero ke io okazu, kaj, ankoraŭ kuŝante, preskaŭ senkonscie, mi ĵetas ŝtonon, kaj mi distriĝas vidante la ondarojn kiujn ĝi faras, kaj kiele la cirkloj plivastiĝas, ĝis ĝi malaperas en la akvon...

Kio estas? Ĉu voĉo? Mi tuj starigas kaj aŭskultas.

—Aaaaaa!

Aro da kornikoj dikaj kaj nigraj eliĝas el fendo de roko, kaj pasas apude super mia kapo kun bruo de flugiloj kaj sentona gradado. Mi ree aŭdas la voĉon:

—Aaaa! Aaaa!

Mi aŭskultas, mi rigardas ĉien, kaj denove silento ĉirkaŭas min. Sereniĝinte, mi ne plu sentas la strangan iluzion min ekregintan, kaj tiam mi rimarkas ke mia koro forte batas. Mi havis timon.

La voĉo ŝajne venis el arbarplena monto. Mi ŝarĝas min per la tornistro kaj ekmarŝas tien. Mi trapasas mil akvoŝuetojn, kun tuta zorgo por ne enigi miajn piedojn en la koton aŭ en la malsekecon, kaj mi entreprenas la supreniradon. Mi ne memoras esti iam trairinta arbaron tiel plenan de trunkoj kaj branĉopecoj: ĉio estas abioj kaj rododendronoj, la arbo plej granda kaj la plej malgranda el la malvarmaj regionoj de la Pireneo. Trompita de la distancoj, kiel kutime en la grandaj montoj, neniam mi finatingas la montsupron: jam longe mi perdis el vido la lagon Estelat. Mi kalkulis duonhoron da supreniro, kaj rigardante la poŝhorloĝon mi konstatas ke mi supreniras de antaŭ pli ol unu horo: jam estas plena posttagmezo.

La arboj jam ne estas tiom abundaj kaj la herbejoj havas pli

kaj pli da senherbaj makuloj. Subite mi aŭdas alifoje la voĉon, sed tre proksiman, kaj ankaŭ ion kvazaŭ batalbruo. Kio estos? Du bovinoj senbride kurantaj preterpasas antaŭ mi, lasante min timigita. Poste, kiam mi alvenas eksteren de la arbaro, mi vidas kuri pli da ili en grupoj, ĉiuj en direkto al la mont-rando. Pli da bovinoj atendas ilin ĉe la alia flanko, pretaj ricevi ilian atakon. Kun la kapo mallevita, kun la kornoj supren, ektuŝegas unu kontraŭ alian la larĝaj fruntoj de la bovinoj, volantaj faligi sin reciproke. Ne tre malproksime estas la paŝtisto, kiu ne ĉesas kriadi kaj jeti al ili ŝtonojn kaj pliajn ŝtonojn, sen sukceso repacigi ilin.

—Timigu ilin—li vokas al mi, ne multe povanta lin helpi.

De sur la montsupro, la tuta bovinaro ekvidiĝas sur granda montdeklivo. La batalo ŝajne haltiĝis. Retiriĝas la bovinoj, sed por doni novan atakon, kaj ĉi-tiun fojon ili estas tridek aŭ kvardek: la batalantinoj de ambaŭ kampoj plifortigas sin. Kelkaj, svingante la voston, kvazaŭ la muŝo pikus ilin, trakuras la tutan longecon de la paŝtejo kaj disportas la teruron al tiuj ankoraŭ trankvile sin paŝtantaj aŭ kuŝe salivantaj: preskaŭ ĉiuj supreniras la herbejan deklivon, lasante ke la bovidoj krii malantaŭ ili.

Estas du brutaroj, unu ĉe ĉiu montflanko, kaj, sin paŝtadante kaj erariĝante, la bovinoj kunmiksiĝis: la bovoviro de unu brutaro kunigis kun la bovinoj de la alia, kaj liaj bovinoj, ofenditaj, furiozaj, entreprenis la batalon kaj havas avantaĝon. Estas posttagmezo, preskaŭ ĉe la vesperiĝo: supre de la monto reliefiĝas, en la oraj tonoj de la ĉielo kiu antaŭanoncas la sunsubiron, la giganta silueto de la bovoviro, kiu levas la nigran kapon kornhavan, spirblobante fiere, balancante indiferente la voston, kiam apud li plej ĵaluzblinde la bovinoj interbatalas, plej senutilaj estas la klopodoj de la paŝtistoj, kaj plej malĝoje ĝemas la junaj bovidoj. La bovinoj ektuŝegas unu la alian koleriĝinte, dum la hundo de ĉiu brutaro sin ĵetas kuraĝe mordi iliajn kruojn. Fine, eble jam laciĝinta je la sovaĝa lukto kiun pro li oni faradis, la bovoviro malsuprenvenas el la montsupro malrapide, kaj sin lokas apud la barako: tuj liaj bovinoj ĉesigas la lukton, kaj, submetiĝintaj al sia reĝo, denove maĉadas la herbon en lia ĉirkaŭo: denove la mont-rando disigas, kiel antaŭe, la du brutarojn.

Mi alproksimiĝas al la paŝtisto, kiu ankoraŭ minacadas la jam paciĝintajn bovinojn, kaj tiam mi ekrimarkas pri la pejzaĝo: mal-supre de la ĉarma herbeja deklivo, ĉe kiu tie kaj tie staras granda pinarbo, troviĝas alia lageteto de nigraj akvoj. La paŝtisto, kiu estas el Ĕvol, diras al mi ĝian nomon: ĝi estas la Nigra gurgon. Pri neniu alia en la regiono oni rakontas pli malbonajn aferojn: neniu povis iam sondi ĝian profundecon; la trutoj tie kaptitaj forkuras, dum oni fritas ilin, kaj revenas al la lageteto. Oni diras ke iufoje (antaŭ multaj jaroj) iu paŝtisto, kiu estis kun siaj ŝafinoj tra tiuj lokoj, vidis eliri el la akvo iun ŝafviron, kiu tuŝis ĉiujn liajn ŝafinojn kaj reenigis en la gurgon. Post la monatoj de paŝ-

tado, la bona paŝtisto forkondukis la gravedulinojn al sia vilaĝo, kaj ili naskis al li ŝafidetojn blankajn kaj belajn kiel neniam estis vidite. Dankema kaj avida, li reiris la postan jaron al tiu loko; sed tiam eliris el la Nigra gurgo la ŝafviro, kaj, vidante lin, ŝafinoj kaj ŝafidoj malaperis en la akvon post li.

La paŝtisto el Ĕvol ne estas tre agrabla. Li estas malgrasa kaj maljuna, tre maljuna; tiom, ke li preskaŭ jam ne povas fari sian metion. Al tiu-ĉi paŝtisto, la vivo en la montaro ne donis la rezignacion kiun proponas la Naturo. Estu paŝtisto, kiu volu: al li aliaj metioj estus plaĉintaj; metioj ne postulantaj tiel pezan laboron. Hodiaŭ mem, la tutan posttagmezon estis al li necese krii kaj elgorĝiĝi pro la batalo de la malbenitaj bovinoj. La paŝtisto de la alia brutaro ne tiom laciĝis, kiel li. Ĉiujn jarojn de sia vivo li estis paŝtisto, kaj ĉiam devigite. La Komunumo donas al li mizerajn, kiu apenaŭ sufiĉas por manĝi panon kaj fromaĝon. Li, kiu servis sep jarojn al la Francujo, kiu iris al Afriko kun la dukto de Aumale, kiu ĉeestis la prenon de Oran, kaj la Francujo ne plu memoras pri li, kaj ŝi lasas lin senhelpa, malgaja, ŝarĝita de jaroj kaj de mizero!

Dum la paŝtisto paroladas al mi tiel, en plenda tono, ne tre malproksime de la malluma Nigra gurgo, la nokto plenigas de misteraj ombroj la montflankojn, plivastigadas la arbarojn kaj nigrigas la ĉielon.

Kiam mi diras al la paŝtisto ke mia intenco estas iri dormi en Ĕvol,

—Ne pensu pri tio — li respondas: — estas tri longaj horoj da vojiro, kaj ĉi-tiun nokton estos tre mallume. Ci dormos kun mi en la kabano.

Mi komencas senti malvarmon. En la tuta vasteco okupata de la brutaro, kvieto regas. La bestoj, kuŝiĝintaj, ripozas kaj dormas. La steloj apenaŭ brilas. La ĉielo, la montaroj, la herbejoj, la arbaroj, la lago, ĉio estas nigra, ĉio estas unu sama ombro. El la ĉielo forkuris la tuta lumo, kaj la tero kaŝis ĉiujn siajn gajajn kolorojn: nenio ekzistas. Neeble estas koni la vojojn, en nokto kiel tiu-ĉi: la mallumo forviŝis ilin. Venas senvole al la imago ideoj pri krutrokoj kaj abismoj terurigantaj, pri haoso, pri ne-niĝo...

Post ne longe, mi jam estas en la kabano, kuŝante sur la pajlo; kaj dum la paŝtisto, kun la hundo apude, aranĝas la fajron, kiu donas reliefojn de nigromanto al lia sulkita vizaĝo kaj al liaj blanka barbo kaj hararo, mi rememoras la grandajn impresojn de la tago: la ŝanĝojn de pejzaĝo en la diversaj horoj, la grandajn arbojn, la mallumajn lagojn. Esplorante min mem, mi ĝuadas pensante pri la laciĝo, pri la timo, pri la tri renkontitaj paŝtistoj: tri homoj travivantaj la saman vivon, kaj tri karakteroj tiel diferencaj, ke tuta mondo disigas ilin. Kaj, fine, mi pensas pri la

bovinoj batalantaj supre de la monto, kvazaŭ movataj de la samaj sentoj kiuj bataligas la homojn.

AGONIO

Mi, en miaj tempoj de knabo, konis kuraciston, kiu ĉion saniĝis. Neniam li lasis iun malsanulon mortiĝi. Se li nun estus tie-ĉi, malfeliĉa Karmeno! Ja ŝi eliĝus el ĉi-tiu. Sed nun, ho, ve! li mortis: estas al li nepove porti konsolon al familioj, kiel li kutimis. Se vi estus lin vidintaj kontraŭ malsanulo, je kia ajn malsano, li ja ne multe hezitis! Li lokis sin apud la kapejo de la lito kaj kun fingro sur la pensilo, pensade kaj medite, traserĉis tie kaj apude interne de la frunto la tutan scienccon, kaj post ne multe, li eltiris longan kraĵonon el la poŝo kaj vi estus vidintaj, kiel li skribas rapide... rapide...

—Je multo li devis scii!

—Pri ĉio li sciis. Tamen, kiom li havis da skribo, mankis al li da parolo. Li estis senvorta kiel mia mulino mortinta ĉe Pasko, kiu faris, faradis, kaj nenion diradis. Kaj, do, li, skribe kaj skribe, sed tiamaniere, ke vi, filo Giu, ĉeestinta lernejon, estus kompreninta eĉ ne guton, ĉar ĉia skribitaĵo de lia mano, *tras tras*, kvazaŭ senatente, estis farita por esti legebla nur de la apotekisto kaj de neniu alia. Ĉu vi komprenis?

—Nu! nenion mi diris!

—Do, kiam la receptaĵo estis veninta en la domon, ja ĝi estis kiel oleo en lampon: la malsanulo saniĝis. Sed li, pri kio estis pli sperta, estis por la kuracado de la kapmalsanoj.

—Ĉu eble ĥemikranio?

—Nu! fi! Ĉiam vi estos sama, abismiganto de muloj! Mi volas diri tiujn suferantajn malsanon de malsaĝo, kiajn ni ĉiuj konis: la frenezuloj, fine! Li prenis la malfeliĉulon, kiu suferas ekkole-rojn aŭ lunfazojn, kio por la okazo estas same, eĉ se li estis el tiuj prenitaj de tia speco de manioj, kiujn oni ne povas teni hejme; prenis lin, mi diras, metis lin, forte premante lian kapon, inter siajn genuojn, elpoŝigis tranĉilojn kaj tondilojn, kaj vi estus vidintaj, kiel li levas la kapŝelon, mallonge serĉas kiel en poŝo interne, refermas, kunkudras la haŭton: bandaĝojn, ŝmiraĵojn kaj ĉarpiojn, ok tagojn en lito, kaj al kapolaboro sanigite por ĉiam plu en la vivo.

Ĉiuj kvar transportistoj alproksimiĝadis unu la alian, kvazaŭ por komuniki al si varmon. La lanterno pendanta de la plafono donis malklaran lumon, plenigante la grandan ĉevalejon per strangaj ombroj. Sur la tablo, la ludkartaro, ne tuŝita ankoraŭ, kaj ĉirkaŭe restis la viroj envolvitaj en siaj manteloj, spite la varmelspiro de la stalo. Ekstere neĝis kaj la malvarmo ŝajnis filtri-

ĝi tra la muroj. La kvar viroj ne trovis plezuron, tiun nokton, restante silentaj kaj kuŝantaj, kaj parolis, paroladis, kvazaŭ volante mortigi plej rapide horojn tro longedaŭrajn. La filino de la gastejmastro elfiniĝadis; kaj se la viroj hazarde silentis momenton, ili pli rimarkis la bruojn de la bestaro, la hufobatojn, aŭ la ies ĉevalan maĉadon: instinke ili aŭskultis kun atento, kaj ŝajnis ke ili aŭdas la molan falon de la neĝeroj ekstere, kaj supre, ĉe la domo, la iron kaj revenon de paŝoj, kaj streĉante aŭskulton iu eĉ atingis aŭdi la daŭran kaj angoran spiregon de tiu, kiu antaŭ kelke da semajnoj estis belkreska fraŭlino kaj nun per unu sola fadeno alkroĉas sin al la vivo.

Dum la momentoj de silento pli ol unu rigardis al la pordo, atendante la aperon de la gastejmastro, subite, post minuto, dironta, ne preterpasinte la sojlon, ke ĉio estas finita.

Tial ĉiuj klopodis ke la silentoj estu tre mallongaj kaj represnis konversacion; sed nur venis al ilia penso aferoj pri malsanoj kaj malfeliĉoj.

—Kaj kiel okazis, ke mortis tiu fama kuracisto?

—Tute certe mi ja ne bone scias, ĉar mi, pro aferoj kies sciigo ne interesas vin, ne plu vojaĝis tra tiu regiono. Tamen mi estas certa, ke li estis suferonta tian samspecan malsanon, kian li kuracis. Memorigas al mi bone, ke iun tagon, irante de Amer al Sankta Pau (pri kio mi estis aŭdinta diri, sed mi ne kredis) mi estis alestanta al plej stranga afero el tiuj de mi iam viditaj. Mi iris, do, kiel mi diras, de Amer al Sankta Pau kaj la nokto estis ne pli bona ol tiu-ĉi; en farmdomo de Ansjes mi estis kontraktinta kelkajn porkidojn kaj du sakojn da terpomoj (mi rememoras kiel nunan okazon, kvankam forpasis jam fasko da jaroj) kaj kiam mi penetris kun miaj muloj en la arbaron, ekvidiĝas al mi la normanda ĉevalino de la kuracisto, alligita al kork-arbo, pro kies karakteriza aspekto mi facile divenis ŝin; tia ŝi restis en mia memoro, ke mi estus ŝin koninta eĉ meze de la foiro de Sankta Mikaelo. Mi haltas, mi proksimiĝas kaj mi vidas antaŭ mi la kuraciston, kiu rejetas sin sur teron kaj splitigas sian kapon kontraŭ la kverkoj; tiele ke li aspektas spiritposedite. Mi, vidante viron tiel scian en tia ago, sentis ian ĉagrenon... Sed ankoraŭ mi kuraĝis diri al li: — Kion diable vi faras tie-ĉi, sinjoro kuracisto? Ĉu vi ne vidas, ke vi fendos al vi la kapon? — Kaj li tiam subite ĉesis fari strangaĵojn, rigardis min per malgajaj okuloj, kaŭzantaj respekton tiel, ke mi mem, tiam juna kaj fraŭlo, sentis ektimon; ŝajnis al mi, ke li ne bone rigardas min, ĉar mi estas lin malhelpinta de tasko al li plaĉa, kaj, kvazaŭ mi ankoraŭ aŭdas lin, — Ha! *Bielo!* — li diris. — Se tiel same, kiel mi malfermas tiujn de la aliaj, mi povus malfermi la mian, la kapon, por scii, kio estas en ĝia interno tiom min suferiganta!

La maljunulo silentis momenton, ĝis kiam ekdiris *Leporo*, maturaĝa transportisto:

—Nu! *Bielo!* Vi estas ja sperta homo; sed malmulton mi kredas el tio, kion vi diris. Mi ne ŝatas la kuracistojn. Jen! Certe pli ol paro el ili surprenis viziti Karmenon. Mi estimas pli la *salutiston* (1) kiu loĝas en Ĝirona, por kiu estas nenio nedivenebla, kaj kiu faris tiajn kuracojn... tondr'!... ke la kuracistoj, ĉiuj staras al li sub la ŝuoplando.

—Kviete, kviete, *Leporo!* Ĉiam vi estos pli besta ol tiuj, kiujn vi kondukas. Ne estas ĝusta horo por frapi la tablon kaj brui.

—Do, laŭte aŭ mallaŭte, mi diras ke mi ne alkonsentas; kaj se mi tion diras, mi jam scias la kialon, — diris *Leporo*, kun mieno obstina. — Ankaŭ ĉe min mi venigis kuracistojn, kaj neniam mi vidis ilin certaj pri farotaĵo: tial oni nomas ilin *dubtoroj*, ĉar ili ĉiam dubas.

—Vi estas ja malsaĝulo! Ha, prave. Mi jam aŭdis diri pri tio. Ĉu ne estas la kuracisto de Castellfullit, kiu manĝigis al vi peron?

—Tutvere, nu! Al ĉiu povus okazi simile. Li diris—mia edzino ankaŭ alestis—ke li receptos al mi paperetojn. Kaj nu! Kion mi devis fari? Kiam ili alvenis el la apoteko, mia edzino donas ilin al mi kaj mi ilin manĝas. Ĉu ne estas dirite, ke oni devas fari ĉion ordonitan? Sed, estas dirinde: malgraŭ ke ili estis bone falditaj, diable! kiel malfacile estis engluti ilin! Bonŝance, ke mia edzino donadis al mi buljonon, kaj kun peno ili povis malsupreniri ĝis la ventro. La alian tagon venis la kuracisto, kaj kiam mi plendis, ke lia medikamento ne estas facile englutebla, li ekridas kaj ridadas, kaj zorgis diskonigi tion tra la tuta vilaĝo, mi ĝin scias! Nu, do, kion mi devis fari? De tiam mi volas servodungi nenium alian kuraciston.

—Eĉ por via edzino, ankaŭ ne? Kaj kiel fartas via edzino, *Leporo?* Kiel iras ŝia okulmalsano? Ja estas tre malbela, efektive, via edzino!

—Ĉiam pusiĝas al ŝi la okuloj, precipe la maldekstra, tiele ke mi diras, ke eble putriĝas al ŝi io interne de la kapo, kaj ŝi ankoraŭ pli koleras.

—Kiel malsaĝa vi ja estas!

—Jen, nu! ne tiom, kiel multaj aliaj! Vi ja ripetas tro ofte tion, *Bielo!* Mi povas certigi al vi, ke se mia edzino mortus, Dio aŭ la diablo ŝin forportus, ne tiom mi ĉagreniĝus, kiel la gastejmastro pro sia filino. Mi ĵuras, ke mi ne estus tiel malsprita!

La aliaj ridis kaj silentigis *Leporon*, tial ke ne estis komparebla lia edzino, tiel malbela, al Karmeno, tiel juna, agrabla kaj bela. Malfermiĝis la pordo de la strato, kaj, samtempe kun malvarma blovo, eniris belaspekta fraŭlo kiu tute serioze skuis la neĝon el

(1) Tiel estas nomataj en Katalunujo la superstiĉaj resanigistoj.

la mantelo kaj el la bareteno (1), kaj kun bruego de galoŝoj alproksimiĝis al la transportistoj, demandante:

—Kiel ŝi fartas?

—Ve! Malbone. Afero je kelkaj horoj, ŝajne. Oni jam diris al mi la alian fojon, ke vi estimas Karmenon. Kaj certe, laŭ tio, kion mi ekdivenis, ŝi ankaŭ portis al vi estimon.

—Portis, vi jam bone diras!

Kaj la fraŭlo restis muta kaj serioza, apogante sin per kubuto sur rando de la tablo.

Leporo rompis la silenton.

—Kia nokto! Nek por lupoj!

—Ĉu lupoj, vi diris? Eble vi estas vidinta neniun, vi, kiu parolas.

—Neniam mi estas renkontinta lupon, sed hieraŭ mi renkontis serpenton, kiu min ektimigis. Mi troviĝis ne tre malproksime de la arbaro de *Can Tey*, kiam subite ĝi prezentiĝis, tiom granda, kia ĝi estas, dika kiel femuro. Mi estis fraponta al ĝi vergobaton, sed...

Unu, kiu ankoraŭ ne estis malferminta la buŝon, diris:

—Se tiom dika ĝi estis, ne povas esti alia, ol tiu de la flava lilio. Ĉu ĝi ne havis flavlilion tie sur la kapo?

La gastejestro persone prezentiĝis ĉe la sojlo de la interna pordo. Tio estis la vizio, kies aperon la viroj atendis de unu al alia momento. Ne moviĝante de la pordokadro, li diris:

—Ĉio estas finita!

Eĉ atente aŭskultante oni ne aŭdis la sterton de la agoniantino. Ekstere neĝis pli kaj pli intense, kun obstina konstanteco; la neĝo amasiĝis en la stratoj, ŝajne ŝvelantaj, kvazaŭ ili volus enmuriĝi la antikvan gastejon, kie ĵus finiĝis tiu fraŭlino freŝa kaj gaja, kiu logis ĉiun vojiranton.

La kvar transportistoj stariĝis, kaj la junulo, serioza kaj ĉagremita, sen eĉ vorto sur la lipoj, kondensante la tutan animon en geston, demetis la *baretenon* kaj reĵetis ĝin teren.

Trad. ARTUR TORNÉ

1. Tipa kataluna ĉapo.

ENRIC DE FUENTES

(1864)

Enric de Fuentes, naskiĝinta en Barcelona, estas eleganta prizisto romantika, sentimentala, kiu reflektas en siaj verkoj la ĝojon de la amo kaj de la vivo. Liaj romanoj havas guston psikologian: li speciale verkis pri la virina karaktero.

Nia eminenta aŭtoro havis intiman amikecon kun la granda Maragall, kiu sentis specialan ŝaton por li. En la lasta tempo Enric de Fuentes preskaŭ forlasis la verkadon. Sed malgraŭ tio lia nomo daŭre brilas en la kataluna literaturo.

Bibliografio: Romantics d'ara; Estudis; Prosa; Ilusions (novelo); Tristors (novelo); Fulls escampats; Amors i amorettes; Nuvolada.

LA URBO

Post la Kandelfesto, ĉiujare Laŭrenco veturis Barcelonon por enspezi la renton de mono kiun li havis en akcioj de tiu fervojo traŭranta lian bienon, de tiu fervojo kiu ŝajnis al li plugisto produktiganta lian karan monon. La lokomotivoj faradis sulkon sur la vojo, la vagonoj estis la semantoj, kaj li kolektis la rikolton. Domaĝe ke tiom da partohavantoj estis en tiu negoco: la obligaciistoj forgajnis preskaŭ ĉion.

Laŭrenco sciis ja ke posedo de fervojaj akcioj plej ofte signifas esti mastro de tio kio estas pagota, kaj certe li ne lasus sin fuŝlogi per paperaĉoj de iu ajn alia fervoja entrepreno; sed tiu fervojo estis la lia, ĉiumatene la lokomotivoj diris al li bonan tagon; la veturantoj, kiujn la vagonaro kondukis oni ne scias kien, elkliniĝis al la fenestroj de la vagonoj por rigardadi tiujn kampojn tiel bone kulturitajn pri kiuj fieris Laŭrenco, kaj li sentis inklinon al la vagonaroj, kiujn li konsideris kvazaŭ hejmokonatoj kaj dankis al la veturantoj ke ili eligis siajn kapojn el la fenestro.

Kiu scias ĉu tiuj viroj kaj virinoj, kiuj forveturis enkaĝigite, finalveninte, parolis—al parencoj kaj konatoj—pri la bieno de Laŭrenco...

Ĝi estis granda bieno kaj la mastro ŝparis neniom por ĝi. Ĉiujare, kiam li iris Barcelonon por enspezi la kuponojn, li delasis en la urbo ne malgrandan kvanton da mono tie ricevita. De kiam, ĉirkaŭ Aprilo, aperis anonco pri tio kiom oni en Julio donos kiel gaj-

non de ĉiu akcio, li ekmeditis kiu nova maŝino estos al li plej taŭga. Kaj li daŭre pripensis tion, kaj kiam li estis decidinta, li reprints kaj kiam li estis tute pensinta, parolis pri ĝi al sia edzino. Kaj ŝi trovis tion ĝusta, kaj en Februaro, al Barcelono, por aĉeti la ilon.

Kaj Laŭrencon akompanis lia plej aĝa filino: Rozo.

Tiu vojaĝo al la urbo estis la revo de la riĉa kamparanineto; la revo kovita dum tuta jaro. De kiam ŝi atingis la vilaĝon, reveninte el Barcelono, ĉiutage ŝi ravigis rigardante la irojn kaj reirojn de la vagonaroj, ĉiam kun la sama dezirego ke ili forkonduku ŝin malproksimen, en tiun urbon tiel belan, kie ĉio estas movo kaj ĝojo. Ĉiun fojon kiam la vagonaro revenigis ŝin hejmen, ŝi diris "ĝis revido" al la urbo per la samaj vortoj: ĝis venonta jaro! Kaj ŝi diris tion tute malgaja, kaj por ŝi pasadis malgaje semajnoj kaj monatoj. Kiom longa estis por Rozo la somero! Ĉiuj Barcelonanoj venintaj en la vilaĝon nur rememorigis al ŝi la sopiratan urbon, kaj ĉar ili estis tiel proksime, ŝajnis al ŝi ke Barcelono estas pli malproksime, ŝajnis al ŝi ke, kiel tiuj aliurbanoj, la maŝinoj povos iri al la vilaĝo, kaj la patro de Rozo ŝparos vojaĝojn, kaj ŝi ne povos reiri tien, kie ĉiam estas plej granda festo. Kiel malfruis Kristnasko! Kia malvarmo en la vilaĝo dum la malgajaj monatoj! En Barcelono sendube neniam estis malvarme kun tiom da lampoj ĉiam brulantaj, kaj kun tiom da domoj haltigantaj la blovojn de okcidento: sendube neniu sidis kuntrite apud la fajro, ĉiuj promenis certe en la stratoj sub la suno, tiu suno tiel sinjora kiu ne brunigis kiel la vilaĝa.

La suno! Rozo rigardadis malafable la vintran sunon, kvazaŭ riproĉe tial ke ĝi levigis malfrue. Kaj kiam ĝi ekestis pli fruema, kaj Rozo lumblindigis rigardante ĝin, ŝiaj okuloj plenĝojis, kaj ŝi iradis kaj reiradis al la fruktarbaro kaj petis al la migdalarboj ke ili rapidu ekflori.

Kaj kiam la branĉaro de migdalujoj ŝajnis bukedo de jasmeno greftita je rozo, la knabino pasigis multe da tempo sub la florintaj arboj; kaj dum ŝi revadis nur al la sopirata urbo, la suno, ludetante, eniĝis deflue meze de l' branĉaro. Kaj sunmakulo falis sur Rozon, kaj ŝi, blindigita, fermis la okulojn. Havis la vizaĝon lentuga kaj la harojn ruĝaj la kamparana knabino; kun fermitaj okuloj, plenbanita de l' suno, kaj apud la florinta migdalarbo, Rozo aspektis kiel kupra idolo sub flora baldakeno.

Kaj kiam, en la vagonaro, Laŭrenco kaj lia filino pasis sur tiu sulko, kiun en la bieno faris la lokomotivo,—la granda plugisto,—la knabino ne estis jam tiel kontenta kiel antaŭan tagon, ŝi pensis jam al malgajeco de la reveno. Sed, alveninte Barcelonon, tiu malĝojo malaperis, kaj la plezuro esti ĉe la granda urbo forviŝis eĉ la rememoron pri antaŭaj nostalgioj.

Ho, la urbo! Granda homamaso ĉie, la veturiloj kurante kvazaŭ spiritposeditoj, muzikistoj en la stratoj, sonorilbruo ĉiuhore,

surdiganta kriadado, bruado kiu ne permesis aŭdi la malsilenton de la maro, de tiu senfina vico da ondoj venantaj el malproksime, tre malproksime, el tie kie la ĉielo kliniĝas por donadi al ĝi ki-sojn. Nenia malĝojo estis en la urbo, ĉar ĉiu rapidis kun okuloj brilantaj kaj firma paŝado, ĉar oni vidis ĉie signojn de festo, kaj la promenejaj arboj larmis ligajojn de rubandoj el senkolorigita papero,—ĉifonoj de antaŭjara gajeco,—kaj en stratoj kaj placoj regis nova ĝojo. Ĉiu estis riĉa en la urbo: mono abundegis, veluron kaj silkon oni vestis ĉiutage, kaj en la montrejoj de juvelistoj neniam oni revidis la samajn juvelojn de antaŭ jaro. Ĉiu amis en la urbo, ĉar sufiĉe diris tion la rigardoj de tiuj altrangaj virinoj promenantaj sur nekrovritaj veturiloj, tirataj de du ĉevaloj kun floroj ĉe l' jungaĵoj. Ĉiu estis amata en Barcelono, eĉ la knabinoj kun lentuga vizaĝo, eĉ tiuj kun ruĝaj haroj.

Kaj kiam vesperigis kaj oni bruligis tiun belan lumilaron, kaj la tempo reveni vilaĝon estis jam proksime, kiel belaj Rozo trovis la ridojn de la homoj kaj la juvelojn de la elmontrejoj, kaj la virinojn rigardantajn kun amaj okuloj! Ho! Se ŝi povus nur pasigi unu nokton en la urbo, en tiu urbo kie oni songis tiel belajn aferojn, kiel tiuj klarigitaj en amrakonto! Se ŝi povus scii kiel parolas pri amo, en la urbo, tiuj kiuj amas la knabinojn kun lentuga vizaĝo kaj ruĝaj haroj!

La urboj estas bonaj nur por nelonga tempo,—Laŭrenco diris al sia filino, revenante sian vilaĝon.

Trad. MARIAN SOLA, L. K.

FROU-FROU, FROU-FROU!

Jam pasis multaj jaroj, de kiam mi aŭdis por unua fojo tiun kanzonon, kiu hodiaŭ elŝutiĝas tra gurdaj kaj tra fenestroj de korto; estis malproksime de tie-ĉi, meze de popolo, kiu bezonas la kanzonojn tiom, kiom la panon de ĝi manĝatan; en lando, kie kelkafoje por fari heroon sufiĉas unu kanzono, kie por nuligi homon nur estas necesa rekantaĵo.

Jam pasis multaj jaroj, kaj ankoraŭ mi memoras la belan virinon plenan de beligajoj, kiu sur la scenejo pepis harmonie, kaj kiu atingante la rekantaĵon de la kanzono, malfermetis la lipojn kvazaŭ la bruado de la silko donus al ŝi nervtremojn; mi memoras la salonon plenan de oritaĵoj kaj lumajoj, tra kiu flugadis la notoj de tiu valso; kaj mi memoras la amason de gajaj gejunuloj, kiuj, kiel mi tiam, nur celis vivi por rido kaj por amo.

Kiam la belulino finis, la tuta publiko kaj mi ekzumis la rekantaĵon de tiu kanzono, kaj la zumado unue hontema fariĝis baldaŭ

frenezega kantado, kiu daŭris, ĝis kiam mi laciĝis. En tiu lando oni estas tiel: oni permesas al la homoj, ke ili kantu.

Tiun nokton, elirinte el la *Concert*, kiom da paroj de geamantoj ripetis, pli serioze ol antaŭe kaj per pli mallaŭta voĉo, la rekantatojn de la kanzono je volupta ario, kiu elfluginte el la lipoj de bela virino, iris luli amason da iluzioj de amaso da gajaj gejunuloj!

* * *

Kaj jen hodiaŭ dum mi laboris en mia metio, mi aŭdis tiun valson gratitan sur gitaro. Lasinte flanken miajn laborilojn, mi eliris sur balkonon, ĵus kiam la gitaro komencis la rekantatojn, kaj kiam du voĉoj akresonantaj kiel fendita kristalo, blekadis senspire ĉi-tiujn versojn:

*Fru-fru, fru-fru
estes el bals de moda*¹

Kia malgajeco! Ŝajnis al mi, ke mi aŭdas funebran kanton al miaj memoraĵoj de la juneca tempo! Ŝajnis, ke mi aŭdas blasfemon! De la volupta kanzono de aliaj tagoj, de la melankolio kun kiu la virino de la *Concert* detale diris la vortojn, de la iluzio, kiun tiu muziko naskis en la koro de la junaj paroj, kiuj malproksimiĝis brakon ĉe brako, de ĉio tio, kio en pasinta jaro lasis en mi impreson de amo, nenio restas nun. Ĉio fandiĝis: de nun tiu transplantita kanzono nur alportos al mi memoron pri la du almozuloj, kiuj hodiaŭ blekadis ĝin!

Unu el ili, kiu ludis la gitaron, estis sesdekjara viro, malgrasa —tre malgrasa,— kaj blinda, kun maldensa blanka barbo, kun retonditaj lipharoj; li surportis pajlan ĉapelon, ĉemizon el blua ŝtofo, jakon el katuno, pantalonon el kotonveluro kaj sportŝuojn. La sidis sur dupieda skabelo tre malalta, apogita kontraŭ la muro, kaj ĉe sia flanko li havis apogbastonon tiel malfeliĉan kiel li mem; la gitaro, kiun li ludis per fingroj maldikaj kiel ferfadenoj, ŝajnis esti konstruita tute intence por malgajigi tiujn, kiuj ĝin eĉ nur rigardos. Ĝi ne estis gitaro el tiuj, kiuj igas pensi pri krioj kaj ŝercoj, nek el tiuj aliaj, el kies ventro larĝa kaj profunda eliras ŝpruce melankoliaj harmonioj. Ĝi estis gitaro por labori kaj por nenio plu; kaj la maljunulo ludis ĝin kiel iu, kiu laboras salajre, jen pinĉante tiun kordon, jen la alian, farante nenion por meriti, lasante ĉiun kordon laŭvole agi. Kaj li kantadis, kvazaŭ li vendus ĵurnalojn, tiamaniere, ke oni nur komprenis bone tiun blekatan "fru-fru, fru-fru".

1. Fru-fru, fru-fru, ĝi estas la valso en modo. Mi konservas en la tradukaĵo la vortojn hispanajn kiel en la kataluna originalo. La aŭtoro ankaŭ skribis ilin laŭ la malbona elparolado de la popolo; elparolado, kiu korespondas al la jena en Esperanto: fru-fru, fru-fru, ĝ' estas la vals' en modo. (N de la T.)

La alia kantanto estis dekjara infano. Ankaŭ surportis pajlan ĉapelon, grandan ĉapelon, tro grandan, kiu estis al li larĝa, kaj kiu kliniĝis jen sur ĉi-tiun flankon jen sur la alian. Kaj ankaŭ kunportis kotonveluran pantalonon, pantalonon mallongan ĝis la maleoloj tiel larĝan por la kruroj kiel la ĉapelo por la ĉapo, kaj kiu ŝajnis profitaĵo el vira pantalonon tranĉita ĉe la genuoj. Li surportis kitelon de knabo kun granda flikaĵo ĉe la dorso kaj ŝuojn malhelajn sen ŝnuroj. La vizaĝo de la infano ne kompatigis: havis la vangojn tre grasaj, la lipojn dikaj, la okulojn malspritaĵ. Estis li, kiu almozpetis; kaj cindrujo el lado, reklamo de industriisto, taŭgis al li por ricevi la almozon. Li iradis de pordo al pordo de la butikoj, aliris la pasantojn, vokis la homojn, kiujn li vidis ĉe la balkonoj, kaj tuj kiam alvenis la momento por bleki la rekantatojn de la kanzono, li proksimiĝis al la blindulo kaj per akra krio de papago, jen, nu!

"Fru-fru, fru-fru!"

Kaj la knaboj trairantaj mokimitis la kantantojn kaj foriris fajfante tiun kanzonon, kiun en pasintaj jaroj mi aŭdis, rigardante kun envio la parojn de geamantoj, kiuj zumis tiun rozarion da vortoj, kiun bela virino plena de beligajoj detale diris kun volupta pozo, igante pensi pri la bruo de la silko kaj la babilado de amantaj lipoj.

Kiam la almozuloj foriris—la maljunulo apogita sur bastono, kun la gitaro sur la dorso kaj unu mano sur la ŝultro de la knabo, kiu gvidis lin trenante la skabelon—, alia voĉo, voĉo de virino, kiu eliris el kvara etaĝo kontraŭ mia domo, daŭrigis kriegante la transplantitan kanzonon per la vortoj de la hispanaj versoj kaj miksante al ili de tempo al tempo tielan krakon da krioj, ke oni timis, ke subite konfuziĝos en unu kanto la franca valso kaj la *jota* aragona.

Kaj senpripense, mi ankaŭ ekkantis mallaŭte tiun rekantatojn:

"Fru-fru, fru-fru!"

Kaj ŝajnis al mi, ke mi jam ne scias ĝin, ke mi ne diras sufiĉe bone tiujn francajn vortojn,—kun la jaroj eĉ la kanzonoj perdas el si!— kaj ŝajnis al mi, ke tiu paro de almozuloj per sia voĉo fendita kantis al mi funebran kanton pri ĉiuj memoraĵoj, kiujn la francaj kanzonoj kutime al mi alportis.

Trad. FREDERIC PUJULA

MIQUEL DELS SANTS OLIVER

(1864 - 1920)

Bibliografio: L'hostal de la Bolla (1903); Illa Daurada (1906); Poesies (1910).

POPOLA

Ĉe la mezo de l' ĉasado,
en persekuto de apr',
la ĉevalo de la grafo
rapidegis tra l' arbar'.
Al la ĉevalo kuranta
forperdiĝis hufferaj':
nur tri kruroj estas viglaj,
l' alia restas sen paŝ'.
—Ekvojiru tuj, sinjoroj,
al la proksima vilaĝ',
kaj alian hufferaĵon
havu tuj mia ĉeval'.—
Jam estis preskaŭ tagmezo
ĉe l' alven' al la vilaĝ';
la necesan hufferiston
ili trovis ĉe la plac'.
—Aŭskultu nun kion petas
la grafo de Ĝinestar':
ke sen formeto de l' selo
iĝu preta la ĉeval'.—
Li komencis la laboron
kaj preskaŭ ĝin finis jam,
sed oni lin rigardadis
kun insista rigardad'.
—Li havas vian vizaĝon—

iu diras al la graf' ;
—kaj li vin ne nur similas,
sed li ŝajnas via frat'.—
Kun ridet' alproksimiĝis
al li kaj diris la graf' :
—Vi vidas sur tiuj rokoi
kastelon de Ĝinestar' :
tien la via patrino
sin ofte turnadis ja.—
La viro levis la frunton,
ĉesis lia laborad' :
pro l' akreco de l' insulto
li bruliĝis de malam'.
—Nu, sinjoroj, la aferon
tute ne konas la graf'.
En kastelon ŝi ne iris
nek dum nokto nek dum tag' :
al kastel' mia patrino
neniam sin turnis ja.
Kiu ofte tien iris,
tiu estis mia patr',
dum la via revenadis
de vojaĝo al Transmar' !—
La grafo, tion aŭdinte,
ĉin trapikis per la lanc'.

PRUDENCI BERTRANA

(1867)

Prudenci Bertrana naskiĝis en Tordera. Krom literaturisto, li estas pentristo kaj teatra kritikisto. Li verkis novelojn, rakontojn kaj lastatempe komediojn. Tiel en la stilo, kiel en la enhavo, li estas tre originala. Liaj mallongaj prozaĵoj estas vere modelaj. Prave li estas konsiderata kiel unu el la plej fortaj prozistoj katalunaj, iom realista, laŭ la maniero de Víctor Català.

En siaj kelkaj libroj, li pritraktis diversajn temojn: sed lia plej karakteriza lerteco estas la pritrakto de "kamparaj" temoj. Efektive li estis fervora ĉasisto kaj ekskursamanto, kaj li havis okazon profunde esplori la animon de plej humilaj kamparanoj.

Liaj du ĉefaj verkoj sendube estas: "Josafat", novelo, kie estas priskribata la eksplodo de la perfortaj trudoj de la karno, kaj "Barbaraj Prozaĵoj", prozaĵoj nomitaj barbaraj pro ilia krudeca priskribo de la vivo disvolviĝanta en plena naturo.

En "La forlasita vojo" la leganto povas admiri la fantazion kaj sugestian povon de la aŭtoro, sentante la timon naskatan de la kuniĝo de soleco kaj mistero; en "La kamenoj de la gastejoj" oni vidas pentraĵon de la kamparana vivo en ĉiuj ĝiaj delatoj; en "La kabanoj de la karbfaristoj" oni sentas la ĉarmon de vivado primitiva kaj izoleca for de urboj kaj vilaĝoj; en ili ĉiuj oni ĝuas sentimentalan vibradon de simpatio kaj kompatio, per kiu la aŭtoro ĉirkaŭas la prezentatajn figurojn; oni trovas delikatajn fajrerojn de ironio; oni konstata mirigan observemon de spirito sincera kaj fervora.

Por koni la karakteron de la verkisto Prudenci Bertrana, estas pli taŭge legi unu solan paĝon de liaj verkoj, ol la plej detalan kaj kompletan priskribon pri ili. La eminenta aŭtoro afable donis al ni sian permeson pri traduko. (Vidu la volumon 16 de "Internacia Mondliteraturo".)

Bibliografio: Josafat, novelo (1906); Crisálides, rakontoj (1907); Tard!; Proses Bárbares; Naufregs, novelo; Els herois, rakontoj (1920); El meu amic Pellini, rakontoj; La dona neta, komedio; kaj aliaj.

LA KABANOJ DE LA KARBFARISTOJ

Se vi ilin vidus reproduktitajn sur iu ajn ilustrita revuo, apu tiuj dudeketaĝaj domoj fiereco de la modernaj urboj, mi certigas ke vi trovus ilin komplete malŝatindaj. Imagu ke ili ne havas *water-closets*, nek modernan kuirejon, nek lifton. Ili konsistas nur el longa arbotrunko apogata ĉe unu ekstremo al la tero kaj ĉe la alia subtenata de la forkigo de du fortaj trunkoj malfermiĝantaj angule por fiksiĝi sur la planko: ia speco de segista tabulo, pli longa kaj pli krurdisigita, kun serio da ripoj el trunkoj, interple-nigitaj per herbaĵoj, kovrita ĉio per kunpremita tero, poste per boskaj arbetaĵoj por ke la pluvoj ne forportu la teron, kaj ankoraŭ per kelkaj branĉegoj supre, por ke la ventoj ne forportu la arbetaĵojn. Ĉe la triangula malfermaĵo de la fronto, muro el branĉetoj kaj densaj herbaĵoj; la pordo, en unu flanko, fermebla per fascino; kaj—ĉio finita.

Ni interkonsentu, do, ke inter la simpleco de la grotoj primitivaj kaj la kabano de karbfaristo ekzistas esperiga progreso. Vero estas ke dum la epoko de la mamuto, de la megaterio kaj de la grandaj saŭrioj, ili ne estus donintaj troan sekurecon al siaj loĝantoj. Sed nuntempe, en la jarcento de la guberniestroj, de la ĝendarmoj kaj de la rajtigoj pri ĉasado, trairas nur ratoj tra la montaroj.

Malgraŭ ĉio, mi trovas tiujn kabanojn aparte plaĉaj. Mi ŝatas vidi ilin en la senarbigitaj montflankoj, serenaj meze de la mal-feliĉo, inter amasoj da grizaj branĉoj kaj ŝeloj, nigraj ĉe la supra, kun fumanta marmito antaŭ ili, solecaj, maksimume kun haroriĉa hundo ilin gardanta, dum la mastro amasigas trunkopecojn pli mal-supre, nevidebla en la profunda krutaĵo. Mi ankaŭ ŝatas renkonti ilin senatende, ĉe krutroko, en la rando de monto aŭ en la unutona ebenaĵo, disĵetantajn fumon sub nuboplena ĉielo.

Vidataj de proksime, ili ankoraŭ estas pli allogaj.

Vi ne povus eniri en ilin stare; sed tio ne gravas, ilia malgran-deco mem komunikas al ili ŝatindan ĉarmon, kaj la vojiranto kon-fide ripozus en ili, kiel alaŭdo apud timiana arbetaĵo aŭ pasero sub tegolo. Ili estas admirinde aranĝitaj: la simpla tegmento tiel proksima kaj varmeta; tiu trabo, kiu ĉe la eniro devigas vin fleksi la korpon delikate, sen perforto, ĝis vi restas kuŝanta sur la pajlo, havas iom da amika trudo, da insista invito malfacile rifuzebla.

Kiom da fojoj, trapasante antaŭ ilia pordo konfide malfermita, mi sentis fortan deziron peti gastigon en ili! Ili tiom odoras je seka foliaro kaj je hordea pano! Se vi vidus ilin! Nenio mankas tie. Ĉe la fundo, en la duonlumo—la vinbotelo; pli proksime—la kuŝejo: molaĵo el pajlo, kiu eliĝas el inter la trunkoj kuntenantaj ĝin, disigante tra la planko. Apud la muro el branĉetoj kaj herba-

ĵoj, estas la kameno: malgranda kameno kie oni devas bruligi faj-reton kvazaŭ por ludo, ĉar ĝi havas la spirejon inter la ĉeftrabo kaj la forkigo de la du subtenantaj trunkoj, kiuj facile flamiĝus. Ankoraŭ, en la angulo kontraŭa al la pordo, vidiĝas manĝaĵoj kaj diversaj iloj: amasigo senforma kaj stranga. Tie la terpomoj ruliĝas sur lankovrilo; la pato fulgplenigas la duonplenan saketon de la legomoj; la oleujo, ŝtopita per papero, kuŝas apud la paper-korno de la salo, kiu elversiga; tranĉilo brilas sur la grasmakulita papero enhavanta rancan lardon. Kaj ankoraŭ, bone rigardante, su-pre aŭ malsupre, ĉe la trabo aŭ en kavo de iu trunkopeco, vi trovus kelkajn centimojn apud iom da nebona tabako kaj alumetoj. La bona karbfaristo ankaŭ sentas la poezion de la kaŝigo.

Nu, sincere, diru al mi: ĉu ĉio tio-ĉi ne vekas en vi iun egois-tan deziron izoligi, vivadi tie, pasigi tie almenaŭ unu nokton, sentante flosi super la tegmento el fascinoj kaj premita tero la solenan misteron de la malluma arbarego? Ili estas tiel intimaj, tiel kareseme malgrandetaj, ĉi-tiuj kabanoj de arbarloĝanto! Ĉio- vi havus tiel je manatingo, vi sentus vin tiel akompanataj de la fajreto de branĉetoj, estus tiel bona la botelvino kaj tiel bongusta tiu bruna pano, vin ŝirmus tiel volonte tiu kovraĵo de mortaj branĉoj! Kaj poste, kiam kuŝante en la mallumo vi vidus fali al viaj piedoj, pasante tra la spirtruo taŭganta kiel kamentubo, la palan helecon de la steloj, kiom vi sentus la ĉarmon de tiu res-pekta kareso, de tiu intimeca kisado!

Ho, ne ridetu, ne faru ironiajn grimacojn. Mi tutkore kompa-tas tiujn, kiuj en infaneco ne sentis la voluptecon sin kaŝi en angu-leton; tiujn, kiuj en la gajaj matenoj de la dimanĉoj, ludante sur la lito, ne kovris sian kapon per la littuko por vidi transiĝi tra ĝi la mildan lumon; tiujn, kiuj, sub pluvombrelo, en Aprilo, pasis indiferece, ne haltante por aŭdi la molan gutadon de la florintaj branĉoj; tiujn, kiuj en la malvarmaj vintraj posttagmezoj ne metis sin en iujn ruinaĵojn por bruligi tie malgrandan fajron, kaj tiujn, kiuj neniam gustumis la simplan vespermanĝeton, en lernejlibera jaŭdo, apude de arbetaĵo aŭ en alia loko, kie oni povu senti la nedireblan ĉarmon de malvasteco poezia kaj ama

Ĉu ĝi estas nia instinkto de animaloj timemaj kaj malfortaj, kio nin igas ami tiun plaĉan kuntiriĝon, tiun amindan malvastigon de la lokoj kaj de la aĵoj, tiujn ĉirkaŭpremojn protektantaj kaj varmajn de la Naturo? Ĉu eble tio estas troglodita atavismo, kiu persistas tra la jarcentoj spite nia animo fiere progresema?

Mi ne scias, mi nur kredas ke ne decas tro moki la poezion kiun eble trovas le grilo meze de la grenkreskaĵoj enigante sin en la malluman trueton, nek tiun kiun certe sentas la heliko kun-tiriĝante en sian perlamoŝtan dometon, nek tiun kiun povas ĝui la barbiŝo en la diafaneco de la akvo, sub ŝtoneto en la ombro de la betuloj.

La simplaj kabanoj de la arbarloĝantoj ankaŭ produktas altan

impreson rilate al la poezio de la konstanta sinmovi. Ili estas loĝejoj konstruitaj laŭ la hazardo de l' laboro por travintradi en ili kaj poste ilin forlasi, sen bedaŭro, sen rememoroj, trenate de travaganta vivo.

Ili havas malpezecon de nesto sen patrinaj malkvietoj, nesto de stoikulo, de rezignacia malsukcesinto, de libera izolulo. Ili ne havas la teruran senmovecon de la antikvaj palacoj, kie la vivo, finiĝas ne lasante alian postsignon krom malvarmaj memoraĵoj, forigitaj kun malsato de la venontaj generacioj kaj konservotaj pli poste kun kalkulita avareco. En ili vi ne sentos ian resonon de pasintaj malfeliĉoj, nek vibras tie la eterna minaco de la homa fatalo.

"Tiu-ĉi lito saturiĝos de la ŝvito de via agonio; en ĉi-tiu ĉambro korbato via spirito dum sia elliberiĝo; tra tiu-ĉi koridoro oni forportos vian kadavron, kovritan per morttuko en la nigra ĉerko". Tion sibladas la vento en la vastaj patrodomejoj; tiu-ĉi estas la dolĉa certeco de la heredontoj.

La kabano de la karbfaristo pensigas vin nur pri la plumba dormo de sana organismo, pri feliĉa simpleco, kaj pri iu laboro, kiu, se foje iĝas troa, tamen ne venenas nek turmentas, nek putrigas la animon, ĉar tiun laboron lumigas la sunhelo, ŝirmas la lazuro, incensas la bonodoroj de la arbetaĵoj kaj prikantadas la birdaro. Kaj ĉe la ekstro de tiaj kabanaj, forlasitaj meze de monto, detruitaj de la kruda vetero, kun la aro da ripoj putriĝinta kaj senkarnigita kvazaŭ mortrestaĵo de fidela besto, ili produktas al vi nenian ĉagrenon. Ili aspektas nesto de iu birdo, kiu estas forfluginta kanti en alia montaro, grati en alia montflanko, ornamo per sia nigra kaj kvietaj figuro alian solecon. Tie li estas konstruita novan nestejon, tiel malgrandan kaj amindan kiel la antaŭa, tiel simila, ke ĝi estas preskaŭ tutegala; sole li ŝanĝis je horizontoj, kun la sama facileco kiel urbano ŝanĝas la kurtenojn. Se li havis dolorojn, malfacilaĵojn aŭ ĉagrenojn, ili restas en la malnova kuŝloko, ĉe la maldelikata kuseno, meze de la pajlo.

En la fundo de mia koro enamiĝinta je la kruda belegeco de la kabanaj, ekstis kelkfoje iom da kompatato pri iliaj loĝantoj. Mi imagis ilin malsanaj tie, senfortigitaj de la malsano, mortantaj sen la konsolo de receptaĵo kaj sen la klasika ŝultro-kuntiriĝo de la nescianta scienco. Poste, ankoraŭ, mi min demandis ĉu eble ili trenadas sian liberecon kiel ĉenon; eble la vastecoj de la montaro estas por ili kvazaŭ la malgaja kaj teda ĉelo de karcero. Terura kutimo blasfemi, kiun en mi naskis la timema, iluziema kaj senforta loĝantaro de la urboj!

Mi ja ne vidis ilin sopiri pro envio, kiam ili loĝas en la belornamitaj ĉambroj sinjoraj. Ili eliras el ili kiel eble plej baldaŭ, ilin ili miras kaj forlasas Mi povis observi tion, ĉar iaforte mi loĝigis ilin ĉe mi. Ili forkuris de ĉe mi jam frumatene... Kaj ĉu vi scias kien ili iradis? Vastigi la pulmojn, for de la stratoj, mal-

proksimen; renkonti la matenan nebulon, la odoron de la kamparo, la oran sunleviĝon.

Ni, ni estas la malriĉuloj, la mizeruloj, kiuj iras envii lin, lin kaj liajn trezorojn: lian heroan krudecon, lian denaskiĝan fortecon, la serenecon de liaj okuloj kaj la belan simplecon de lia palaco.

Ho, malsatindaj litoj, abomenaj dormoĉambroj, teruraj kurtenoj blankaj, malgajaj marmoroj de la familiaraj mebloj, kiuj konservas ankoraŭ makulojn de kuraciloj, super kiuj viaj manoj trenis en la senfinaj noktoj, kiam forlasite de ĉiuj, kvazaŭ vi estus en dezerto, vi preparadis senefike la lastan laŭmodan formulon, la plej bonajn drogojn de la apoteko, dum kriadis la doloro sur la molaj matracoj!

Diru al mi: en kia angulo de via urba loĝejo ne falis larmo, en kiu ĉambro ne restas ankoraŭ iaj febrodoroj, malantaŭ kiu pordo vi ne aŭskultis ian doloran singulton aŭ iun flustron klabonaŭguran?

Aranĝu vian kaĝon zorgeme, metu en ĝi pendornamaĵojn, plenu ĝin per belaj objektoj, elektu la plej bonan lokon por akcepti la indiferentajn vizitantojn, tiujn kiuj ne lasas alian rememoraĵon krom la koto de iliaj ŝuoj sur la tapiŝoj; vin ĉirkaŭigu per ĉiusecaj komfortaĵoj! Vane estos: la medio de neŭrozo, de lukto kaj de maltrankvileco, kiu supreniĝas el la brua strato, trapenetros vin tute, malgrabiligos vian vivon. Necesas ĉiam pensi ke vi havas meblon kun malgranda tirkesto, kie via edzino, per siaj mastrinaj fingroj, senĉese bekfrapadas kvazaŭ mallibera koturno en sia manĝejo, kaj vi devas eliri ĉiun matenon kaj ĉiun posttagmezon, ne gravas kien, por bataladi, por enmeti viajn manojn ne tiel plaĉajn nek tiel purajn en la tirkestojn de aliuloj, por fari sangon, fari hipokritaĵojn, sufoki la aliajn, riski vian propran vivon. Kaj ve al vi, se vi estas malkuraĝa! ve, se via konscienco timiĝas kaj viaj manoj hezitas! Sentaŭgulo, mallaborema, senpova, malforta, malkuraĝa... Ho! ne timu, mi certigas al vi ke da vortoj ne mankas sufiĉe en la vortaro...

La tagoj klaraj kaj serenaj, kun forta malvarmo, estas la plej bonaj por la karbfaristo. Li ellitiĝas je la ektagiĝo, sen troaj ceremonioj; per piedbato li faligas la fascinon, kaj blovo de malvarmo penetras en la kabanon. La kampoj blankas en la malproksimo, la boskaj arbetaĵoj estas kovritaj de iom da prujno, la malmoliĝinta tero krakas sub la piedoj, kaj en la ĉielo ankoraŭ lumas la steloj. La karbfaristo streĉas sian zonan kaj dume rigardadas la nebulan horizonton. Bonan tagon! li pensas, kaj li ĝojiĝas. Antaŭ ĉio, li ekbruligas grandan fajron. La branĉetoj kaj malsekaj uleksoj malfacile bruliĝas: ili multe fumas, multe bruas, multe krakas kaj fine flamiĝas. Li kuŝiĝas apud la fajro, kaj li pasigas la malvarmiĝintajn manojn tra la flamoj, kiuj, en la blueco de la frumatena duonlumo, alprenas vivajn sangajn ruĝojn. La karbfaristo maten-

mangas en la sama sinteno. Li havas apude la botelon kaj prenas la tranĉilon kaj grandan pantranĉaĵon, kiu, en la nigreco de la fingroj, blankas kiel la neĝo.

La ventetblovoj ofte igas lin ĉirkaŭata de fumo kaj de fajreroj.

La ĉielo iom post iom alprenas palan rozkoloron. Grandaj aroj da piroloj flugas al la ebenaĵo, kaj perdrikoj kantas en proksima monteto.

La unua rigardo de la leviĝinta suno surprizas la karbfariston kun la leda botelo levita por trinkado; brilas kvazaŭ rubeno la falanta vinŝpruceto; liaj okuloj fermiĝas, helblindiĝintaj; liaj dentoj brilas tinkturitaj de skarlato, kaj tuta lia figuro bruna kaj mararaĝata ekbruliĝas kun bronza reflekto.

Kaj li ne plu sentos malvarmon dum la tuta tago.

Ho, karbfaristo, bona karbfaristo! mi volus pruntepeti vian kabanon; mi havas molan matracon, kaj mi ne povas dormi; miaj vizaĝo kaj manoj estas puraj, kaj mi estas pli timiga ol vi; mia domo estas vasta, pura kaj ordarangita, kaj en ĝi mi ne estas komforte. Mi volus pruntepeti de vi ĉefe vian pordon el fascinoj. La mia estas masiva kaj resonanta, ĝin ofte frapas la mizero kaj la perfido, kaj sub ĝi enŝoviĝas la banala ĵurnalo, la funebra sciigo, la miasmoj kaj la murmuradoj. Ho! via diskreta pordo, sub kiu traglitas nur la saniga venteto, la ekheloj de l' tagiĝoj, la mistera fosforeskado de la steloj kaj la arĝentaj fadenoj de la Luno!

SALVADOR ALBERT

(1868)

Salvador Albert naskiĝis en Palamós. Li akiris la titolon de unuagrada instruisto kaj pro grava malsano ne povis fini la karieron de inĝeniero. Jam en sia juneco li sin montris kiel klera verkisto. Li dediĉis sin al la novelo, al la teatro kaj en la lastaj jaroj al la poezio. Krom literaturajoj, li verkis serion da bonegaj artikoloj por la revuo "Joventut" kaj kritikajn studojn pri la Ĝeneva pensisto Amiel kaj pri la teatro de Ibsen. Dum multaj jaroj li estis deputito ĉe la Hispana Parlamento, kie en diversaj okazoj li parolis favore al Esperanto. Li ankaŭ rekomendis la internacian lingvon en Kongreso de Komercaj Cambroj. Kiam okazis la V-a Kongreso de "Kataluna Esperantista Federacio" (1914) en Sant Feliu de Guixols, kie li loĝas, li multe helpis la organizantojn. Salvador Albert estas alta kaj liberema spirito kaj tre estimata homo, kiu dediĉas sian vivon samtempe al la literaturo kaj al aferoj politikaj kaj financaj.

Bibliografio: Ideal, novelo; Soldats de la vida, dramo; El despertar d'un cor, dramo; Involució, artikoloj el la revuo "Joventut"; El pas de Venus, dramo; Amiel, kritika studo; Florida de tardor, poemoj (1917); Les hores que tornen (1920); Confins (1921); Opals (1925).

LA INSTRUATO

Puŝita de la minacoj de la familianoj kaj de la timo al lernejestro, la infaneto marŝadas al lernejo. Lia mallaborema mieno denuncas langvorojn de interrompita dormo; liaj moviĝemaj scivolemaj okuloj montras lian pasion por la vivanta vivo. Li marŝadas distrite, sciante kien li iras, sed ne pensante pri ĝi. Rutino gvidas lin; ĉiutage li ja faras la samon.

De la hejmo al la lernejo, li havas pli da tentoj ol Sankta Antonio. Ĉe ĉiu de li farata paŝo, li sentas la sekretan deziron "malesti". Sed, kiel du minacantaj fantomoj, aperas antaŭ liaj okuloj de virga rigardado, la ombroj de la eterna patro kaj de la eterna instruisto. Ha! Se ne estus la timo al la puno! Kaj li marŝas kaj marŝadas, en direkto — jam, la malgrandetulo! — en trudata direkto, li, malfeliĉa homarero, senpeza racia polvo forblovita de la senkompata uragano de la Devo.

Rutine li atingis la pordon de l' lernejo. Li haltas ĉe la sojlo, rigardas kaj enflaras kiel vigla museto: atakas lian nazon odoroj de sulfhidra acido kaj haladzoj de enfermita mola karno, kiuj kontrastas kun la purega aero de la strato. Enironte, li trarigardas la eksterajn kvazaŭ li lasus tie ion tre amatan. Fine li decidiĝas. Jam en la klaso, li rutine formetas sian ĉapon, sidas, unue unu kruron, poste la alian. La instruisto promenas tien kaj reen, mallaŭta, atendante tiujn, kiuj ne venas. La infaneto rigardas lin per rigardado longa, malrapida, kun la vango apogita en la manplato. Ambaŭ atendas, kun kutima pacienco, ke ĉiuj ĉestu por komenci... Se kiam li alvenis oni estus dirinta al li, ke la instruisto ne tre bone fartas, li estus reveninta, kiel kuglo, ĉe sin, komuniki la novaĵon, kaj poste li rapidus kuri, reakiri kion li lasis ĉe la strato enirante la lernejon! Sed la instruisto ne kurtimas malbone farti, kvankam li ĉiam plendas ke "oni elspezigas lian sanon." "Li nepre estas tre fortika, sinjoro la Instruisto" pripensas la infaneto.

Kiam la lernejo jam estas plena de korpoj, kiuj streĉiĝas, de ekzemaj vizaĝoj, de oscedantaj buŝoj, de dormemaj okuloj kaj de gratantaj fingretoj, la infaneton vekas la voĉo de la instruisto, kiu pretiĝas komenci. Komenci? Jes, komenci, kiel ĉiun tagon, je tre longa distanco de la *principo*.¹

"Nu, ni komencas!" anoncas la instruisto. La brua svarmado de la bubaro perfidmontras ĝeneralan seninteresiĝon. "Silentoni!" krias la instruisto per imperativa voĉo. Ĝuste nun, kiam la infanetoj komencis ekvekigi, sin senti ili mem, vidante sin ĉiujn kune, unuj apud la aliaj, farĉitaj de impresoj *vivitaj*, kiel floretoj ebriaj de aero kaj lumo, ĝuste nun elsaltas la ĝardenisto kaj ordonas ke ili fermiĝu! Ne rimedo: "oni devas obei!" Oni devas obei kaj jam nun en la oranĝerio oni devas demeti siajn molajn kalikojn al la dispono de la ĝardenisto, por ke li ilin ĉifadu kaj turmentu, submetante ilin al speciala ortopedia kuracsisistemo...

Jam la lecionoj komenciĝis. Jam la abeloj zumadas per bruado surdiga kaj unutona en sia artefarita korb.

Post kelkaj monatoj okazos publika prezentado de malgrandaj akrobatoj. Dume, la direktoro sin okupas turmentante kaj disartikigante ilin kun malvarma sango, sekvante okulfermite la instrukciojn de truditaj metodo, ne atentante al la suferoj de la malfeliĉaj martiretoj. La grava afero kuŝas en tio, ke la akrobatoj en *herbe* faru, kiam la okazo alvenos, riskajn ekzercojn kaj *tours de force*, kaj ke iliaj korpoj tre konvene — ne utile — dresitaj enformiĝu en la kapricajn postulojn de la publiko, kiu pagas... kaj ne plendas. Pli poste, kiam per la forto de la aĝo ili sin sen-

1. La aŭtoro ludas la vorton. *Principo* signifas ankaŭ *komencon* en kataluna lingvo.

tos kapablaj por la fekundiĝo de ideoj *puraj*, ili estos dece kas-tritaj ankaŭ laŭ speciala metodo, kaj destinitaj formi parton de la multenombra, nevenkebla nigra gvardio de la Haremo de la Priokupoj, kie sinjore agadas la reproduktema Eraro, kvazaŭ sultano plenega de erotiko.

Al la strato sunbanata kaj bruanta per mil bruoj de vivo, malsuprenvenas kiel griza nebulo de vesperiĝo la mallaŭta zumado de la abeloj en plena aktiveco... deformiganta.

De tempo al tempo du voĉoj plilaŭtiĝas el tiu klaŭstra murmuro; unu, kolera kaj raŭka: ĝi estas la voĉo de l' Puno; la alia, plenda kaj soprana: ĝi — tiu de l' Doloro.

Fine, kiel alloga aro da kolomboj kurieroj de ĝojo, disflugas tra la spaco la dek-du batoj de tagmezo. La vigla orelo de la enfermita infaneto ilin kaptas kun ĝuo, kiel soifanta floro kaptas dek-du larvojn de nubo en seka vetero. Gaja bruado de liberiĝo salutas la feliĉigan horon.

La infaneto alvenas en sian hejmon denervita kaj sen apetito. Sidonte apud la mangotablo, li dezirus iom sentorporiĝi, senkongestii korpon kaj spiriton metode turmentitajn. "Estas nun horo mangi" kontraŭstaras la voĉego de l' Devo. Ne estas rimedo: "oni devas mangi". Kaj li mangas, sed mangas sen apetito kaj rapide, iom el ĉio, por povi fini (1) tuj... kaj li forkuras... La malamata voĉego persekutas lin kun sanigaj kaj ekzemplaj elŝpruciĝoj de patra furiozo. Uf! Ili ne komprenas ke post mallonga horo kaj duono li devos reveni al la lernejo; kaj tamen li ja devas provi ŝipeton el korko, kiu mirigas liajn kunlernantojn! Li konstruis tiun ŝipeton, li mem! Kaj tio, kvankam la sinjoro Instruisto nomis lin "azeno" kaj eĉ batis lin, nur ĉar li ne scias kiom faras 7-4. Ankaŭ al li grumblis la sinjoro instruisto ĉar li silabis *g-u-e, ĝue*. Certe estas, ke la Instruisto "lernigis" al li tion aliajn fojojn; sed de nun li ne plu ĝin forgesos, ĉar tiujn literojn li vidis, kaj bone vidis, ĉe la malantaŭo de vaporŝipo kiun maristo nomis la *Guerra*.² *G-u-e, ge*. Ankaŭ *interparolante*, la maristo diris al li ke tiu maro kiun li vidas estas la Mediteraneo, kiu, laŭ li, kuŝis pli malproksime. Kiu povus tion scii per la landkarto de l' lernejo, kie ĉio konfuziĝas, kie ĉio estas ĉie!...

La dua! Li devas reiri al "lernejo". Li jam pasis kvar horojn da ĝi; li devas pasi tra tri ankoraŭ. "Se oni eltiras 4 el 7, restas 3. *G-u-e, ge*".

Se estus jaŭdo, li elfinus la ŝipeton korektante kelkajn difektojn, kiujn la provado montris. Sed li devas reiri al lernejo. "*G-u-e, ge*. Se oni eltiras 4 el 7 restas 3... ankoraŭ".

Pli ol sanktigi, li diigas la festojn. Dum la festaj tagoj ĉio

1. La aŭtoro ludas la vorton *desertar*: forlasi armeon, (mangi la desertojn!).

2. Elparolu *gera* (milito).

ŝajnas al li pli bela, pli ridetanta, kaj kvazaŭ Naturo karese lin ĉirkaŭprenus kiel patrino kiu reakiras alsopiratan filon. La lernejoj estas tiel malplenaj, tiel nigraj, tiel tedaj!...

Kiam li estos granda, oni *enmetos* lin en lernejon malpli ekzeman kaj pedikozan, oni aĉetos al li pli grandan paperujon, kaj *pasigos* pli dikajn librojn. Je la eniro mem jam albatas lin la sama haladzo de necesejo kaj miasma aero. La lernejestro krias kaj admonas kiel la unua. Kaj ankaŭ li ne komprenas, kiam li parolas. Kaj ankaŭ sep estas la horoj de mallibero. Ĉio estas sama kiel antaŭe, escepte la paperujo, kiu estas al li pli peza. Ĉe li, oni devas ankoraŭ doni al li la "oleon de hepato de moruo" kaj perforte igi manĝi. Ĉiumomente oni memorigas lin pri tio, ke li *jam* estas granda, ke *jam* estas horo kiam ludoj devas finiĝi. Li, kiu kredis ankoraŭ, ke li estas malgranda!... Tiu elreviĝo pikos lian animon la tutan vivon kiel nekuracebla vundo.

"Al la lernejo, tuj, ĉar la lernejestro maljuniĝas" oni diras al li senĉese por lin stimuli.

Li pligrandiĝas, la lernejestro maljuniĝas... Kie estas, do, tio kio naskiĝas kun rideto de ektagiĝo, se ĉie troviĝas nur aferoj subirantaj kun malhelaj... de sunsubiro?

"Vi zorgu ne iri al maro!" — Malfeliĉa vi, se vi iras al montaro!"

Kie estas do la revita mondo de eterna printempo kie povas sin etendi la gaja birdo kiu sopiras al la viviga suno?

Tiaj pripensoj ian tagon skulptos sur lian frunton nigrajn sulkojn.

Kiam li estos pli granda, oni trudos al li la abiturientecon. La libroj estos tre dikaj; la lecionoj tre longaj. Je la fino de P kurso li devos sin prezenti antaŭ tribunalo por montri la laboron, kiun li faris, kaj la horojn, kiujn li ŝtelis al la dormo. Se li iros al ekzameno kun la vangetoj ruĝaj de sano, la rigardado klara kaj serena, la juĝantoj rigardos lin flankokule kaj murmuro reciproke al siaj oreloj: "Kia mallaboremulo en tiu-ĉi" Kaj ili son- dos lin tra ĉiu flanko por esplori ĉu ĉio estas *sano* en li. Se li aperas anemia, kun la koloro pala, kaj nedecida rigardado, li allogos la konsideremon de la tribunalo, kiu, je la unua vido, estimos ĉe li liajn kapablojn... de sinmortiganto. La favora opinio de la juĝantaro estos kondamna sentenco: la laŭro — floro sur kadavro.

Kaj li *suferos* ¹ amason da tiaj ekzamenoj. Li pasigos kvin aŭ ses jarojn laborante por la ekzamenaj tribunaloj, trakurante en ĉiun direkton, kiel kaptita muŝo, la araneaĵon de la oficiala scio okulgardita de la abomena araneo, kiu atendas la bonan momen- ton por fari el ĝi festenon.

1. Popolo diras: Sufere ekzamenon!

Kiam li finos la studojn, li estos submetita al ĝenerala esplo- rado, kaj ho ve li! se naskiĝis al li haŭto sur iu el la mil vundoj, kiujn oni al li malfermis. Oni ne donos lin kiel bonan; oni ne aljuĝos al li *gradon*... la *gradon* ¹ de ftizeco.

Kun la pasporto sub la brako, li alfrapas la pordojn de la Uni- versitato, kie, post unu jaro da noviceco, li eniros en la *kongre- gacion* elektitan aŭ truditan. Tie li pasigos kelkajn jarojn farante *spiritajn ekzercojn* kun stoika krueleco, ĝis kiam li fariĝos tute disŝirita. Ricevinte la *pastrajn ordonojn*, li iros tra la mondo de Dio adorante la *Oran Bovidon*, fino kaj komenco de ĉiuj profe- siaj inklinoj. Li estos pli diplomo ol *homo*; li fariĝos sklavo de siaj votoj; kaj li enfermiĝos en la pastrovesto, perdante la egal- pezon kiam la dusako ne estos ekvilibra.

La infaneto transformiĝos en homon de *kariero*.. ² kaptur- nanta; la fekunda grajno, en malplenan spikon.

Se la manko de kapabloj aŭ rimedoj malhelpos la kandidaton al kariero atingi la ladtubon de licenciato, ³ restos al li solvo por sin liberigi de la manlaboro, kiun li ne amis pro manko de tempo.

Se li ne taŭgis por lerni, li taŭgos por lernigi.

Li fariĝos lernejestro.

Trad. FREDERIC PUJULA

1. Grado en la skalo de studoj. Grado en la skalo de malsano.
2. Kariero-kariero kaj kurado.
3. Licenciato: soldato fininta sian servotempon. Aludo al la ladtubo, kien enmetas la liberaj soldatoj sian pasporton.

PERE COROMINAS

(1870)

Pere Corominas estas ekonomiisto, politikisto, literaturisto, filozofo. Dum longa epoko li estis ĉefa kondukanto de la respublikana kataluna partio. Li estas tre lerta en financaj aferoj. Li verkis libron de filozofia gusto "La Vida Austerá", kiu famigis lin. Li sin montris kiel delikata prozisto en "Hores d'amor serenes" kaj en sia lasta verko "A recés dels tamarius". Li estas tradukita en la lingvojn hispanan kaj francan.

Bibliografio. — Les presons imaginàries; Les gràcies de l'Empordà; La Vida Austerá; Hores d'amor serenes (1912); Per amor a la França (1914); Lletres d'un visionari; A recés dels tamarius (1925).

"HOROJ DE AMO SERENAJ"

Ĉapitro V

"Vi estas la plej bela por mi, la plej bela, ĉu vi aŭdas? Vi estas ora skatolo plena de ĉielaj aromoj. Vi estas mia rifuĝejo kaj al la piedoj de via sankta rememoro mi venas ripozigi la spiriton lacigitan.

"El kia afero vi estas kreita ke vi elradias tian helon? Miaj okuloj ne laciĝus vin rigardante kaj miaj lipoj ĉiam preĝus vian nomon. Celestino, rozario el perloj, Celestino, lilio el la ĉarma valo, Celestino, anĝela gvidantino de mia spirito.

"Vi eĉ estas pli bela ol iluzio, vi eĉ estas pli ruĝa ol la rozoj en niaj ĝardenoj, vi eĉ estas pli bonodora ol la rosmarenoj sur la montoj. Vi daŭras pli ol la rozoj, ol la iluzioj kaj ol la rosmarenoj. Ju pli mi pensas al vi, des pli mi enfervoriĝas, kaj miaj vangoj nun brulas kaj la flugiloj de mia spirito tremas pro la dezirmalkvieto voli vin trovi kaj ekpreni al vi la manojn.

"Viaj manoj! Mi ĉiam ilin amados ĉar ili estis la plej kuraĝaj kaj la plej malavaraj. Miaj unuaj kisoj, kiam mi povos ilin al vi doni, estos por ili; la unua juvelo kiun mi donacos al vi ekfloros sur ilia karno.

"Kiom da aferoj mi ellernas pensante al vi, Celestino mia! Mia, tute mia vi ja estas, ĉu vere? Vi malfermis al mi plej malfermite la libron de la vivo. Sur la faldoj de via animo ekstaze

mi legas la eternajn verojn. Vi estas mia libro el oraj kovriloj substofita per orientaj silkoj.

"Mi neniam kredis ke plaĉos al mi la juveloj kiel ili al mi plaĉas. Mi pasigis feliĉajn momentojn antaŭ la ŝrankoj de la juvelistoj. Se mi estus riĉa, mi kronus la majestecon de via virga korpo per perloj kaj per oro kaj per ŝtonoj. Vi portus ilin kun reĝa simpleco. Ili taŭgus por ke via beleco triumfu el ilia pala heleco de mortaj aferoj.

"Nun mi scias kio ekzistas el homa eterneco ĉe la juveloj de la geenamiĝintoj kaj ĉe la kronoj de la reĝoj. Nur la virgulinaj tuŝitaj de la amo portas la juvelojn pro dia rajto. Nur la reĝoj kiuj estis gvidistoj de popoloj portis leĝorajte kronon.

"Kaj la mensogema mondo faras ridigan farson kiam kronas la frunton de l' reĝoj kiujn neniu amas kaj kiam surkovras per juveloj la korpon de l' patriniĝonta virino kiu kuniĝas kun la viro ne sentante al li amon.

"Feliĉiga imagaĵo ĉiam revenanta kun la amika rido floranta sur lipo! Hodiaŭ mi vidas vian korpon: mi vidas vin starantan antaŭ mi, alta kaj balanciĝanta kiel palmarbo ŝarĝita de maturaj daktiloj.

"Hodiaŭ mi vidas vian korpon kiel ritmon de la penso kiu ĉiam revenas. Restu kun mi, imagaĵo el la virino kiun mi adoras, kaj mia animo estos la tabernaklo kiu vin kondukos tra la mondo. Kia estos la tago kiam miaj brakoj povos gardi vin mem? La senfruktaj rokoj ekfloros kaj ĉe la sablaĵo de l' dezerto elkreskos la orangarbo kiu kronos kun pompo la frunton de l' edzino.

"Ho via korpo! Se vi estus sanktulino mi falus antaŭ vi surgenue kaj vin adorus. Sed vi estas pli ol sanktulino. La sanktulojn nur oni adoras el la spirito kaj mi vin amas el korpo kaj animo. La sanktuloj humiligas nin per sia nehoma grandeco kaj vi levas vian frunton tre alten kaj igas min esti homo.

"Reviglitaj de via ĉesto, miaj brakoj prenas viran geston. Vi redonas al mi la malpezecon de junulo. Sentante vin apude, mi antaŭeniras tra la mondo per triumfaj paŝoj.

"Adiaŭ, reĝino mia. Tiu-ĉi estas la letero plej mallonga kiun mi sendis al vi, sed ĝi estas tiu kiun mi verkis kun pli da amo. Tial ke la mondo neas al mi riĉaĵojn por donaci al vi juvelojn el oro kaj ŝtonoj, rezignaciĝu per tiuj-ĉi perloj, kiujn, pensante al vi, elŝutas la animo de via enamito".

Tiamaniere mi skribis al la fianĉino dum tiuj tagoj de aŭtuno. Kaj nun, kiam mi relegas la leterojn, mi renkontas en ili super ĉio fortan volon al enamiĝo, agado de la intima energio kiu por superstari la mallumajn rememorojn el la malliberejo, enmetis la fundamentojn de nova vivo. Mi ne neas la realan ekzistadon de naskiĝanta amo kaj estas tute certe ke la penso al mia amatino ekmovis molajn aminklinojn en mia koro. Sed la pasia fervoriĝo ne estis ankoraŭ sufiĉe forta por ne influigi de la malvarmecco

de longa forestado kaj estas eble ke, sen la volo de plena renoviĝo, mia vivo ne estus sin sentinta transfigurita de la amaj delicoj.

Mi sentis min, interne de mi, sinjoro de miaj korinklinoj; en mia amatino mi konsideris la korpajn kaj spiritajn virtojn de bona edzino; la gracio de ŝia korpo kaj de ŝia parolo ankoraŭ ne movis en mia koro nerezisteban kaj superregantan deziregon. Sed la larĝa senco de la vivo, kiun mi proponis al mi realigi, prenis bazon el tiuj-ĉi unuaj delicoj kaj ekbruligis en la menso pasiplenajn viziojn, kaj dismovis la senton kun la tumulto de pasiaj aspiroj.

Pro tio en la leteroj kaj en la poezioj tiutempaj troviĝas ia literatura agitado kiu ne akordiĝas kun la reala intenseco de la sento. Unufanke, influis en mi la konceptado de la amo kiel speco de frenezo senpense traskuanta la animojn, kaj, aliparte, mia menso senbrida ne povis alkonformiĝi al la trankvilaj kunfiguradoj de dolĉa amindumo. Sed nun, kiam mi rememoras de malproksime la volontan klopodon dum la longaj horoj de forestado, kaj kiam mi gustumis la realigon de la plej molaj deziregoj, mi vidas kiel, sube de la literaturaj entuziasmoj, elformiĝis malrapide kaj grade nia amo.

Tio, kio unue estis supraĵa delico de la sentoj, transformiĝis en amindan kaj sentimentalun kuneston, por fariĝi pli poste, per la ĝojoj kaj la penoj de la vivo, kiel spirita arbo de freŝaj kaj kolektiĝintaj ombroj enŝovanta la radikojn ĝis la plej sekretaj fundajoj de niaj koroj.

Ĉapitro XXII

Inter la horojn serenajn de mia amo, mi deziras enmeti por vi, dolĉa amiko min leganta, unu el la plej maldolĉaj dum la vivo, tiu horo serena el aŭtuna vespero, kiam viviniĝis nia filo, lasante al ni sian graciplenan rememoron kiel konsolon por nia malgaja soleco.

Ni nomis lin Ludoviko, Ludoviko kara, suno kaj belaĵo niaj. Li estis blanka kiel la laktokremo; liaj okuloj, grandaj kaj nigraj, brilis kiel malseka diafanaĵo; liaj vangoj el silko komunikis al la lipoj impreson de subtila delikateco kiam ni ilin proksimigis al ili por ilin ame kisadi. Liaj karnoj markis per faldoj de riĉa superabundeco la artikojn de la brakoj kaj la kruroj. La manetoj karnoriĉaj ŝajnis kusenetoj el palaj rozoj, kaj liaj unuaj ridoj estis la plej mola ĝojo de niaj okuloj.

Ankoraŭ la tagon antaŭ lia morto li alridis al ni ambaŭ, kiam vi havis lin sur la genubenko kaj diris al li vortojn kiujn li ne komprenis laŭ ilia senco, sed laŭ ilia senfina dolĉeco. Dum mi hejmlaboris, vi surmetis al li blankan tolaĵetaron tute ondigitan per punktoj, kiujn vi mem ellaboris por li kiam ni nur al li pensis kaj ankoraŭ lin ne havis. Vi deziris ke li parolu, ke li modulu

tiujn laringajn intencojn de vorto ne elfinita en la frivola spirito, kaj li rigardis nin ambaŭ kaj ekridis, kaj per siaj manetoj li sin ne lasis vesti.

Nia tuta vivo estis ekspertinta esencan ŝanĝon pro la naskiĝo de la unua filo. Ni sentis pro li devojiĝi al nova orientiĝo nian destinon; dolĉa ripozo de pleneco kvietigis niajn animojn; kaj la avido lin zorgi, lin subteni, lin konsoli en liaj ploroj, igis nin malŝparemaj de nelacigebla energio; ŝajnis kvazaŭ li estas nia propra amo, tiu pasia himero de la vivo, transsubstancigita en estaĵon, karna nodo de niaj plej molaj korinklinoj.

Kompatinda Celestino! Viaj suferoj por voli lin nutradi, kiam via mola korpo tion ne povis, estis tiel adorindaj kiel viaj ampromesoj. Pro tio, kiam vi havis lin sur la genubenko kaj miaj okuloj ekrigardis vin ambaŭ per unu sola rigardo, mi sentis min feliĉa en mia rigardado, kaj mia spirito, vagante ĉirkaŭ viaj imagaĵoj, fariĝis forta de nobla kaj ama virto.

Se vi komparas la trankvilajn vesperojn dum nia amindumtempo, tiujn kiuj ne estis saturitaj de niaj larmoj, kiam vi, apud la tablo mem kie mi verkas tiujn-ĉi dolĉajn rememorojn, intermovis la puntfarilojn sur la punkuseno, aŭskultante mian malŝparan vervon pri fantaziaj estontaj heroaĵoj, kun tiuj kiujn ni pasigis en la blanka salono kiu vidis la unuajn ridojn de nia filo, vi konstato ke tiuj-ĉi estis la plej serenaj kaj moligitaj de amo.

Multfoje ni ambaŭ kunestis por lin dormigi. Vi senvestigis lin amema kaj lin metis en la liton, kaj mi al li ekkantis la katalunajn kantojn kiujn mi estis lerninta de mia patrino, per malforta ritmo forportanta el mi la plej amajn efluvojn de la koro. Dum vi trapasis en la ĉambro, ordigante la korbajn kaj la litkovrilon, nia Ludoviko ekdormiĝis, kaj ni elŝoviĝis piedpinte rekantante la kanton kiel fervoran adorecon al la patrujo pleniganta per estontaj glorioj la pacon de tiu dolĉa izolejo.

Ho, Ludoviko, mia filo, unua espero de senmorta vivo, la plej bela rozo ekflorinta dum mia aprilo. Ci estas la plej bela, ci estas la plej dolĉa kaj sekreta kunulo dum miaj noktoj, ci estas mia stelo sur la ĉielo, pura flamo el amo, kiu, kiam mi memoras esti vin perdinta por ĉiame, renkontas novan realigon en miaj larmoj.

Ankoraŭ hodiaŭ ci sekvas mian vivon kiel ombro. Ĉiam mi kalkulas la jarojn kaj la monatojn kiujn vi havus, image mi mezuras vian altkreskon, kaj pensas ke vi konas alfabeton kaj mi vin igas legi, en la kvieto de la hejma mangoĉambro, unu el la *vivoj* el Plutarko. Kaj mi havas la konsolon figuri al mi ke ci min zorgas kiam mi estas malsana, kaj atendas adiaŭi cin en la sopiriga horo de la morto. Kiel bela ci estus nun kun cial blondaj haroj, pli altkreska ol cial gefratoj plenigante la domon per la naivaj ridoj de tiu dolĉa vespero de aŭgusto.

De post kiam naskiĝis al ni la unua filo, mi atendis kun delica ĝojo la horon reveni hejmen por ludi kun li longan tempospacon

kaj por formanĝi lin per kisoj. Kiam mi dormiĝis, nur pensante ke li estas tie apude en sia lulilo, kovrita per kurtenoj kaj littukoj kaj punktoj, falis sur min agrabla kaj dolĉega ripozo de feliĉa viro.

Sed tiun someran nokton, kiam ni ekrimarkis ke febro jam lin konsumas, la ektimo al la morto ekfalĉis subite niajn krurojn. Nek ŝi nek mi ion sciis pri tio kion oni devas fari: oni instruis al ni la plej diversajn konojn por plenigi nian vantecon, ni sciis pri la tero kaj pri la steloj, pri la kreitaĵoj kaj pri la nekreitaĵoj; kion ni ne sciis estis tio kion devis fari por defendi en tia neatendita lukto la vivon de nia malfeliĉa filo.

Ni vekis mian patrinon, kiu konis la efikojn de la aromaj herboj kaj la uzon de la hejmaj medikamentoj. La tutan nokton ni luktis kontraŭ la senkompata malsano, regataj de teruro, irante de unu flanko al alia, ĉion ekprovante sen trovo de konsolo.

Unufojon, troviĝante ekster la ĉambro por prepari medikamenton, mi ekaŭdis teruran agitiĝon el krioj kaj ploroj kaj akrasonoj kiuj ektimigis. Mia patrino skuis kun forto la etan Ludovikon kaj lin agitis supren, tiel ke subite li fariĝis moruskolora, preskaŭ nigra, kun la okuloj blankturnitaj. Armita de terura rezolucio, mi ekprenis de ŝi mian filon rapidmove, kaj, ne senvestiginte lin, nek haltiginte min pripensi tion kion mi faras, mi metis lin en la banon. Tuj li ŝanĝis la koloron, li ekrigardis min per siaj vitro-similaj okuloj, kaj sur lia blanka kaj serena vizaĝo mi observis la refluron de la plej dolĉa espero kiu iam estas ĝojginta la horojn de mia vivo. En mia koro aŭdiĝis bruetado de diaj harpoj, kaj ambaŭ patrinoj ploradis kaj ridete elbordigadis.

Ĉiumomente ni konsideradis lin savita aŭ perdita sen rimedo, sed la maltrankvilo kaj la febro ne permesis al li eĉ iom da ripozo kaj de kvieto. Dum malmultaj horoj velkiĝis lia brileta vizaĝo, kiu ŝajnis el emajlo, kaj montris en la duonlumo mizeran lanugon. Liaj okuloj ne laciĝis nin rigardante, kaj lia korpo sin donis sen ia rezisto al nia fervora volo.

Kia nokto tiel terura pro malesperaj maltrankviloj! La morto ne havis tempon penetri en ĉiujn fundaĵojn de niaj animoj, kaj niaj sentoj ne restis skuitaj de la nerezistebla doloro. La esperoj rapide reburĝonis en nia koro, la spiritaĵoj el kie elŝprucas la gojo plej pura abunde elfluis. En la aferoj nin ĉirkaŭantaj kaj en la intimaj imagaĵoj de nia estaĵo, ĉio venis rekrei la perditan feliĉon, tiamaniere ke en nia animo la senkonsolo antaŭeniris kaj returneniris kiel la furiozaj ondoj sur la bravan marbordon.

Kaj ankoraŭ la nokto plenigis per misteraj kaj akraj angoroj la tragedian malesperan lukton kontraŭ la morto. Neatentante, de tempo al tempo mi iradis spioni la unuajn helaĵojn de l' tagiĝo kiuj neniam finruĝigis la ĉielon. La malproksima kokkantado, la unuaj kaj konfuzaj bruetadoj de l' dormanta urbo, ŝvelas nian koron per sentimentala kunesto. Kaj kiam la tago revenas, ŝajnas ke ĝi rompas la misteron de tiu malgaja izolejo, kaj la brusto

largiĝas por elspiri la dolĉan matenventeton kvazaŭ la tuta mondo venus nin helpi en niaj penoj.

Nia filo jam ne plu rekonis nin: liaj vitrecaj okuloj fikse rigardis tiun kiu lin tenis sur la genubenko, ĝis kiam, per teruraj grimacoj, ili fulmekbrilis. Poste la movoj de l' vizaĝo malintensiĝadis, kaj, sur la pala kaj trankvila vizaĝo, nur la okuloj flagre lumis, ĉiam des pli neperceptebla ju pli proksimiĝis la agonio.

Tiam mi ekkomprenis la morton. Mia tuta vivo forpasis sen tio ke ĝi atingis esti sentimentala stato de mia animo. Jam antaŭ multaj jaroj mortis, miahejme, frato de mia patro kaj kuzino kiujn mi tre multe estimis. Sed la impreson, la teruran spasmon de l' morto mi ne spertis ĝis kiam komenciĝis la agonio de mia filo.

Mi estis la lasta kapitulaci. Sur mia genubenko mi trinkigis al li la lastajn medikamentojn. Interne de mia koro defaladis ĉiuj kolonoj subtenantaj la estaĵon, kaj la brusto premiĝis kun seka angoro kiu ne liveris al mi larmojn por plorado. Ĉiuj miaj patraj iluzioj suprenkolektiĝis al la atako, kaj la volo ankoraŭ resaltigis ilin eksteren, alpuŝita al neebla espero. Ĝis kiam mi komprenis ke mi mem ne elteniĝos, ke mi bezonas aliajn brakojn, ke venas la morto.

Restante tiamaniere mi leviĝis, kaj ĉar neniu prenis de sur mi mian filon, mi ekiris lin kuŝigi sur la liton de niaj amoj. Por ke li ripozu pli bone, mi formetis la lantukojn kiuj lin vindis kaj li restis kun sia blanka vestaĵo, brodita per punktoj, pala kiel laktaĵo, mia belulo, sen alia vivmanifestiĝo krom la preskaŭ sensenta fulmobrilado de l' okuloj.

Kaj la larmoj, kiujn la volo retenis, eliĝis el larmujo, kaj estis en viaj brakoj, dolĉa Celestino mia, kie mi rompis tiun ploron kiun mi neniam forgesos dum mia vivo. La nomo de nia filo, kiun ni ambaŭ elsilabadis, renovigis la malavaran elverŝadon de singultoj kaj de larmoj, kaj tiamaniere ni ne laciĝis plorante lin en tiu amdolora horo.

Ĉar nur la profunda simpatio al la kara estaĵo malsuprevenas al nia brusto fandi en ĝi ĉiajn angorojn kaj fortiri el ĝi ĉiajn maldolĉecojn kaj penojn. Kaj estas horo serena de amo ĉi-tiu kiam realiĝas la liberiĝo de la vivo kiu, sen la larmoj ploritaj en la brakoj de l' estaĵo amata, restus subkuŝanta sub la propraj kaj ne elbordigintaj malĝojoj.

Servistino kiu, lin surbrake promeniĝinte, akiris je li specon de ama kormoleco, iris aĉeti brakplenon da floroj kaj ilin sternis kun malordo sur la lulilon kien ni lin kuŝigis, lin vestinte per la broditaj tolaĵoj de festo. La fervoro de tia bona knabino efikis sur nin kiel dolĉa konsolo.

Trad. JOSEP VENTURA

LLUÍS VIA

(1870)

Lluís Via naskiĝis en Vilafranca del Panadès. Li estis la fondinto de la revuo "Joventut", kiu tiel fama fariĝis pro sia vicleco en literaturaj kaj ideologiaj aferoj. Li estas delikata poeto kaj eleganta prozisto. Li estis intima amiko de la granda dramisto Guimerà, kaj, puŝite kaj rajtigite de tia amikeco, li finis la tragedion "Per dret diví" kiun Guimerà lasis preta nur parte. Kiam ni skribas ĉi-tiun noton, estas anoncata la baldaŭa prezentado de tiu verko, la lasta de Guimerà, ĉe "Teatre Català Romea".

Bibliografio. — Poezio: Esteles; Del cor als llavis; Collita. Prozo: Impressions i records; Fent camí; De lluny i de prop; Tretze. Teatro: Per dret diví (kun Angel Guimerà). Tradukoj: La princesa llunyana, de Rostand; Contes, de Perrault.

FRENEZULO KAJ FEINO DE AKVO

Ni iru, ni eliru el la vinberkampoj, ĉar tie ne plu restas satirusoj nek bakhainoj. Ni iru al la maro, kie vi min logis kiel akva feino! Ni sidiĝos sur la sablejo: tie mi revis vin, kiam mi vin ne konis: tie mi alŝopiris je vi, kiam vi estis for...

Venu en la sablejon, kie la amadojn oni bedaŭras, kie la semoj ne enradikiĝas... Vin ne timigu malvarmo: ne frostiĝos via koro. Ĉu iam vi havis ĝin, vi, feino de akvo?

Ne timu: la sablo estas varmeta ankoraŭ pro la kisoj de l' suno. Kiam vi estis for, ĉe la mezo de somero, mi atendis vin tie horojn post horoj, eltenante la sunbruladon kun nuda kapo, kun malkovrita brusto, ĝis la haŭto ŝvelis. Kaj tiaj pikoj brulvarmaj ne distris min de la turmento vin memori... Ho, kia turmento!

Kial vi ridas nun? Kial, per viaj okuloj fiŝaj, vi tiel fikse rigardas miajn okulojn de frenezulo? Ĉu vi volas min delogi kaj elŝoviĝi de mia ĉirkaŭpreneno? Tion vi ne atingos! Eĉ se el via brusto eliros la tuta ŝlimo, kiun tie vi gardas, eĉ se sur ĝi vi treniĝos, vi tion ne atingos!

Kiom mi al vi deziris da malbono! Sed ne tiom, kiom vi al mi faris, ĵurante al mi amon kaj donante vin al aliaj frenezuloj ne sciantaj ami, nek frenezil!...

Ho, kiaj malbonaj sentoj, la viaj! Kaj mi, jen esperanta, jen senkuraĝa, estis kvazaŭ barko ludilo de ŝtormo kaj super la krestoj de l' ondoj mi vidis la bordon, ne povante albridiĝi.

Ne, tio ne estis amo! Mi sentis min malbona pro vi! Foje, en la silento de varma tagmezo, dum, sternite sub la ombro en krutajo, mi rigardis la balanciĝon de ia floro ĉe la flirtado de insekto, invadis min puraj sentoj: tio estis, ĉar kelkajn momentojn mi ĉesis pensi pri vi. Sed revenis via rememoro kaj mi denove sentis min kruela kaj punis pro miaj suferoj sendefendajn estaĵojn.

Mi volas, ke vi sciu kiom da malbono mi faris pro vi, akvulino; malbono, kiun mi faris, pro l' ĉagreno ne povi fari bonon... Mi volas, ke vi vidu min malgranda kaj malkuraĝa, tia, kia vi min igis.

Mi, neniam volinta sekvi la ĉasistojn; mi, kiu ilin nomis senkoraj kaj perfidaj, ne faris kiel ili, kontentiĝi mortigante: mi turmentis, mi suferigis la torturojn plej rafinitajn.

Mi interrompis la taskojn de la formikoj kaj kondamnis ilin harde laboradi. En tiu-ĉi delikata sablo mi faris kavaĵon, malprofundan kavon, kiu por formiko staranta en la fundo fariĝis cirklo de altaj montoj; kaj en la fundon iris la formiko, kiun mi kaptis en ĝia nesto aŭ laŭlonge irantan sur branĉeto de naiva konvolvulaco.

Ĝi ne malrapidis rampi sur la monto supren por eliri el la abismo. Mi lasis ĝin grimpi; kaj, kiam mi vidis ĝin preskaŭ en la supro, sufiĉis al mi ungegrati malforte la fundon por ke la deklivaĵo disglitu kaj ĝi falu envolvita en malgranda sabloturniĝo.

Senlaciĝe, senhezite ĝi rekomencis la supreniron. Sennombrajn fojojn mi lasis ĝin supreniri: sennombrajn fojojn mi enabismigis ĝin, kiam ĝi estis proksima al la supro, al la lumo, al la vivo... Mi pensis pri vi: mi plezuriĝis per rememorado pri la turmentoj, kiujn vi donis al mi, kiam vi povis fari min feliĉa... Kaj mi daŭrigis mian malnoblan laboron kaj admiris vere la rezistpovon, la moralan harton de la besteto, kiu post du horoj da tia danteca torturo perdis nek fortojn nek facilmovecon.

Mi pensis: " — Se ĝi estus homo, ĝi estus jam mortinta aŭ freneziĝinta!..." Kaj tiam, sentante min homo, mi sentis miajn malgrandecon kaj kruelecon. Mi surprize trovis min mem — la vizaĝo sur la tero, fermitaj la lipoj kaj dentoj, malrapida la spiro, fiksitaj la okuloj kaj alklinita la animo sur malgrandan kavon, dum super mi, ĉirkaŭ mi, la spaco malfermiĝis al ĉiuj ventoj, lume belege... Kaj mi ne povis plori: honto tion malpermesis.

Mallonga hezito mia, ia nedaŭra dubo, estis sufiĉaj por ke la formiko forkuru el la kavaĵo kaj malproksimiĝu plej rapide. Tiam mi serĉis ĝin avide, kiel ĝi sencecie, ĉe la senfrukta sablejo.

Iun tagon... ho! kun kia maltrankvilo mi serĉis unu por ŝpari al ĝi klopodojn, por reporti ĝin rapide, per miaj manoj mem, al la loko, el kie mi ĝin formetis. Mi serĉis multan tempon, multan; kaj mi ekperdis jam la esperon ĝin trovi, kiam mi rimarkis la malfeliĉan estaĵon, kiu, bone sin orientinte, estis alvenanta al la

limoj de la sablejo kaj suprengrimpis la krutbordon de vin-berkampo.

En unu kavo de tiu bordo, araneo dismetis sian araneaĵon, nevideblan de mi. Ĵus alveninte, mi vidis la formikon halti ĉe tiu truo, kiel ĝi haltis ĉe aliaj, serĉante traŭron... Rapide kiel fulmo, la araneo implikis ĝin en sia reto. Mi volis ĝin liberigi kaj mi trovis ĝin jam mortintan.

Kaj tiam ja mi ploris.

Vi ne estus plorinta, mi scias. Kaj kvankam vi plorus multe, pli multe ol mi, viaj larmoj estas falsaj.

Kial vi estas pli belaj, plorante, la virinoj kaj la sirenoj? Kial vi kompatigas pli ol la formiko, vi, pli malnobla ol la araneo?

Hodiaŭ araneo estas mi, kaj vi de mi ne forkuros. Mi tiom vin amas, tiom!... Kiel frenezulo! Pro vi mi fariĝis freneza kaj perfida, kaj malkuraĝa! De nun vi amos min, de nun vi ne trompos min, ĉar nun ni similas unu la alian, kvazaŭ du akvaj gutoj!

Ne pensu, ne, pri la amantoj vin atendantaj. Agu kiel ĉiam: pensu nur pri la estanteco. Pensante pri ili, vi suferus, kiel mi suferis. Trompu ilin, kiel min.

Vi vidas tiun ruiniĝintan domaĉon? Ĝi estis fiera kastelo. Sur ĝiaj muroj iradas la tutan tagon rampaĵoj. Kiom da fojoj mi imagis, ke vi estas ĝia kastelanino, kaj ke tie vi akceptas la amantojn. Ili estis lacertoj, tra la fendaĵoj de la muro, enirantaj vin adori: serpenton...

Tagon mi terure mortigis unu el ili. Preterpasis knabo kun pafilo por mortigi birdojn: malgranda arbalesto el fera drato kaj gumaj risortoj, kiu entenigis en la pugno kaj anstataŭ sagoj pafis kugletojn. Mi forprenis ĝin de li kaj ĝin alpafis sur la lacerton, kiu ebria je suno grimpis sur la muro supren.

Sin sentante vundita, ĝi nek falis, nek forkuris. Ĝi duone turniĝis kaj restis kun la kapo malsupre, min rigardante rekte, kvazaŭ incitante min.

Dua kugletpafo igis ĝin levi belkuraĝe la kapon. Alia ĝin igis ege malfermi la buŝon, ruĝan kiel brulaĵo. Kaj ĝi ne forkuris ankoraŭ, nek falis.

Plena de stranga teruro, mi daŭrigis alpfante ĝin, ne pro la ĝuo rigardi ĝin mortantan, sed pro la bezono liberigi de tiu vizio, kiu tremigis min kaj estus vin ridiginta. Kvar, ok, dek kugletoj travundis ĝin. Dek vundoj, dek ruĝaj makuloj helis sur la forta verdeco de ĝia haŭto.

Mi ne plu povis... Tiu heroa agonio teruris min. Jam la mortanto ne alfiksiĝis sur la muro per siaj kvar piedoj, sed nur per du kaj per nekomprenebla maniero rektigante sur ili sian korpon kaj horizontale antaŭenigante ĝin al mi en longedaŭra kaj terura konvulsio, en granda impulso de rabio kaj heroeco. Kaj la buŝo plimalfermiĝis, kaj la korpo gigantiĝis antaŭ miaj okuloj, fariĝante draka, diabla.

Subite mi pensis pri vi, kiu scias vundi ne konante teruron nek kompaton; kaj hontigita senti ilin, mi celdirektis la pafilon lastfoje, serene alcelante la kapon.

Kaj ĝi falis, mortinte.

— Kaj nun... nun venis la horo de via morto... Ho! Kial vi ne mortigis min? Kial vi volis eternaj miajn turmentegojn? Ĉu vi sciis, ke mi devos vin mortigi? Ĉu estis skribite, ke mi mortigu vin?

Ne forkuru, ne volu aliri en la kampojn. La satirusoj estas mortintaj: tie vi ne trovos aliajn amantojn, krom la lacertoj. Restu ĉe P' sablejo, feino de akvo! Ĝi estas via loko! Mortante tie vi mortos en via medio! Kia konsolo, morti! La doloro fariĝas gajeco, la frenezaj deliroj iĝas trankvilaj revoj, kaj kio estis fajro, tio estas glacio... Vi vidas? Jam leviĝis la luno: jam neniam plu revenos la brulvarmoj malbenitaj...

Kiu diras, ke amo brulas, ke amo estas fajro...? Per la nomo amo baptis la homo ĉiujn malaltajn pasiojn, kiuj lin punas. La noveloj estas de tio plenaj. Nun mi komprenas, ke, en la fundo, miaj suferoj estis nenio, krom protesto por tio.

Amo estas milda kaj radianta, kiel tiu luno, kiu leviĝas. Ĝi ŝajnas fajro, sed ne estas tia; kaj eĉ se tia ĝi estas, ĝi ne brulvundas. Ĝi estas fajro, kiu refreŝigas la animon. Rigardu ĝin, fajrumantan sur la akvoj. Kaj des pli da freŝeco ili havas, ju pli brilaj ili estas, ju pli leviĝas la luno, ju pli alvenas la nokto.

Ni iru tien, ni iru al ĝi. Ne timu: vi ne dronos, akvulino! Se vi ne estus tia, se vi estus kiel la aliaj inoj, se vi estus kiel mi, ja vin estus sufokintaj la rememoroj.

Ne batalu, ne kolerigu min! Eble vi ankoraŭ ŝajnigas! Eble vi estas kiu min logas, kiu min forportas, kiu min mortigas! Eble estas vi, kiu triumfas ankoraŭ, — ne mi!... Kion, tamen! Mi estas feliĉa, mortante. En la grandaj amoj fajro estas freŝeco, morto estas vivo...

Ho! Malbenita! Ĉu vi rezistas, baraktas ankoraŭ! Rezignu, kiel vi rezignigis min! Mortigu kaj ridetu! Ridetu, ricevante la grandan malvarman kison, la grandan kison de amo!...

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

IGNASI IGLESIAS

(1871)

Ignasi Iglesias, naskiĝinta en Sant Andreu de Palomar, unu el la Barcelonaj antaŭurboj, priskribis en siaj dramoj, plenaj de realistaj scenoj, ĉiujn mizerojn de la vivo en la grandaj urboj. Li estas unu el la dramistoj plej popularaj, filo de la popolo kaj amanto de la popolo. En liaj teatraĵoj, meze de krudaj dialogoj, ekfloras lirika delikateco kaj luma poezieco, kaj la paroloj de la figurantoj iras rekte al la koro. La sekreto de la sukceso de ĉiuj emociigaj dramoj de Iglesias kuŝas en tio, ke li havas poentan temperamenton.

Krom siaj dramoj Ignasi Iglesias verkis kelkajn librojn de poemoj kaj mallongajn prozaĵojn. Kelkaj liaj verkoj estas tradukitaj en aliajn lingvojn. Ni bedaŭras ne povi prezenti fragmentojn de liaj belaj teatraĵoj: la sekvantaj tradukoj ne povas doni kompletan ideon de la literatura valoro de la eminenta kaj populara dramisto.

Bibliografio: Poemoj: Ofrenes; Soleiades; Flors de cingle (drama poemo). Dramoj: Foc nou (4 aktoj); Fructidor (4 a.); La mare eterna (3 a.); El cor del poble (3 a.); Els vells (3 a.); Les garces (3 a.); L'escorcó (3 a.); Foc-follet (4 a.); La resclosa (3 a.); Lladres (1 a.). Aliaj teatraĵoj: La festa dels ocells; Flor tardana; La barca nova; Gira-sol.

LA SEMADO

Jam alvenis la tempo de l' semo!
Fidu ne al plibona veter!
Havu ni la plugilon brilanta,
oportunon profitu de l' ter' .
Semu jam ni, semu ni pli,
en postatemp' rikoltos ni.
Bedaŭru ne,
ni tra la mondo semi tre!
Semu ni pli,
bele rikoltos baldaŭ ni!

Jam sopiras la ter', ĝia brusto
jam batetas per febro interna

pro l' dezir' de plezur' fekundanta,
kaj malfermas la koron, eterna,
viva font', por la nova florar'
antaŭsign' de venonta fruktar' !
Ni laboru, sindonaj semantoj,
ne laciĝu, bonmarŝas labor' ;
volu ne, ke pro l' sunaj radioj
tutsekigu de l' tero la kor' .
Ne timu! Semu
ni, semu tre!
Ni ne bedaŭru,
rikolti ne;
rikoltos baldaŭ ni ĝojantaj,
kaj ĉiam vivos triumfantaj!

Nian kampon respektos furioj
de l' venteg', kaj de l' fulmo la fal' .
La plugiloj por liroj taŭgantaj
nin helpegos en tiu batal' !
Nova sun' nin salutas brilanta,
niaj fruntoj lumigas pro l' hel',
per la varma blovet' Ter' nin helpas,
birdoj trilas la kanton de l' bel' .
Renaskiĝas Natur' al la vivo
ridetante, kaj mortas malam',
atendante la freŝan floradon,
parfumitan arome de am'...

Por la homidoj tuj venontaj
ni estu firme batalontaj!
Semu jam ni, semu ni pli,
en postatemp' rikoltos ni.
Bedaŭru ne
ni, tra la mondo semi tre!
Semu ni pli,
belege falĉos baldaŭ ni!

Trad. JOSEP ROSSELLÓ

LA PASKO DE L' GRENO

Jen ni denove kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero en la koro de l' jaro krevanta de vivo kaj juneco, kronanta la someron per la plej voluptaj floroj el la tero kaj per la heloj de flamanta ora suno, kiu neniam maljuniĝas, kies potenco neniam malpligrandiĝas. La elspiroj de la vintro, maldiafanigantaj la senmakulan bluan ĉielon, iom post iom disiĝis, forportante post si la malgajecon de la naturo; la nebulaj vualoj, kiuj honteme kovris la suprojn de la plej altaj montoj, subite disŝiriĝis, kondensiĝante en la spaco kiel ploro de freŝa roso; la neĝoj, glaciigitaj de la frostoj, tuj kiam la suno kisis ilin, fandiĝis, ekstremane, brilante kun rebriloj de multekostaj ŝtonoj, kaj fluante al la ebenaĵo kiel grandega degutado de larmoj.

Kiel ĝuas la vido, rigardante la verdajn arbarojn kaj fruktejojn, kun makuloj de blonda greno kaj hela genisto, ore lumŝanĝa! Kaj kiel enridiĝas la spirito, ĝoja, ĉe la granda eksplodo de vivo, kiun ĉi-tie kaj ĉiuloke donace proponas la sindona tero dankema al la homo, kiu per sia penado ĝin kulturis! Jen ni, jen ni denove, kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero, en la fino de la floradoj promesantaj bongustajn fruktojn, kiuj rekompencas niajn klopodojn kaj dezirojn, kiujn, en eterna renoviĝo kaj harmonia edzeco de la vivo kaj morto, la naturo naskadas, paradante sian belegecon kaj sian kreaĵojn forton.

Ho sinmaldonaj animoj, avaraj je viaj riĉaĵoj! Rigardadu humiligite la sindonon fekundigon de la tero: la korno de la abundeco ne estas nur via propraĵo. Al ĝi rajtas, tiel kiel vi mem, la homoj viaj fratoj, la malfeliĉuloj, kiuj ne povas gajni sian ĉiutagan panon, kaj tiuj, kiuj dolore ĝin gajnas; al ĝi rajtas, tiel kiel unuj kaj aliaj, la humilaj formikoj, sin provizantaj por la vintro: kiel ankaŭ la graciaj birdoj, la gajigaj kantistoj, kiujn vi forpelas maldankante iliajn triladojn.

Jam ĉio grajnigis. La burĝonoj, floriĝinte, entenas la frukton; la verdinta novtrunko, stangiĝinte, elmetis plenan spikon; kaj la suno, kiel ama patro, maturigante ĉion, sin etendas, enridiĝante, kaj kisasante per siaj fajraj radioj la plenan de nova vivo.

Dissemantoj de amo, dissemantoj de gajeco: kantu triumfe laŭdan himnon danke al la eterna patrino! Viaj klopodoj estas florientaj, viaj penadoj estas grajnigintaj, tiel kiel vi esperis. Ne restu malkontentaj. Daŭru semante kaj dissemante, aliformigante la senkulturajn kampojn en fruktejojn, la fruktejojn en ĝardenojn, ĉiam konfidaj kaj sindonemaj, ĉiam pensante pri morgaŭo; ĉar viaj deziroj kaj viaj penoj trovas en la koro de la homoj kaj en la internaĵoj de la tero la ĝermigan varmon, kiu ornamas vin per gloraj floroj kaj fruktoj.

Ni kantu ĉiuj kune, harditaj de tiu suno, kiu neniam maljuniĝas,

kies potenco neniam malpligrandiĝas. Ni kantu, ĉar ni estas denove kun alia efektivigita iluzio kaj kun alia espero, en la pleneco de l' jaro krevanta de vivo kaj juneco, kronanta la someron.

Ni kantu, ĉar la tempo estas glora: ni estas en Pasko de l' Greno!

Trad. JOAN GILI NORTA

LA ALKOHOLEMULO

Eble estis la unua horo post noktomezo. Estis dum vintro: mi memoras ke la malvarmo estis intensega, kvieti, sen iu aerblovo, ia malvarmo el tiuj, kiuj, kiel la malsekeco, penetradas nin ĝis la ostoj, lasante nin kvazaŭ sensentaj.

Mi min direktis hejmen, enlitiĝi, malrapide, kun la kapo mallevita, konstruante *in mente* scenon de projektata verko.

Subite, kiam pli enpense mi vojiradis, interrompis min kompatinda alkoholemulo, kiun, ĉar ni estis estintaj najbaroj, mi konis jam de mia infaneco. Kun parolo malrapidema, kun malfacilo movi la langon, li diris al mi bonan nokton, haltigante min meze de la strato por subteni la jenan dialogon:

—Saluton, amiko: kien ci iras, ĉu hejmen, dormi?

—Jes, kamarado. Kaj ci?

—Ankoraŭ ne. Estas frue, Mankas al mi fini la taskon. Ĉu ci volas veni trinki ion? Ni iru: mi invitas cin.

—Ne; dankon. Mi ne soifas.

—Kion ci verkas nun, kion ci verkas? iun dramon el tiuj tiel fortaj?

—Jes: alian dramon.

Kiam mi respondis ke jes, ke mi skribas novan verkon, ĝojo fajrerumis en liaj okuloj kun brilecoj de admiro kaj simpatio, idealigante por momento la brulan ruĝecon per kiu vualigis ilin la troa trinkado.

Kaj li rigardis min, ridetante kaj kun respekto, ĝojante anticipante la sukceson ankoraŭ ne atingitan de mia verko *non nata*, sed kiun li, pro la amo kiun por mi li sentis, kredis tute certa.

Marsante per mallongaj paŝoj, kvazaŭ senkonscie, — ĉar, senmove, la malvarmo fariĝis pli intensa — ni reprenis la dialogon, sed baldaŭ ni haltis denove sub la heleco mem de strata lanterno. Tiam la kompatinda alkoholemulo, rigardinte ĉiufanken tra la strato, prenis min delikate per la brustorandoj de mia surtuto, kaj, puŝante min, iom post iom, kvazaŭ li gvidus blindulon, kondukis min en la ombron, preskaŭ en la mallumon, kie li, ree haltante, per voĉo mallaŭta kaj trema, konscie kaj honte pri la malvirto kiu lin regadas, flustris al mia orelo:

—Pardonu: mi ne volas ke la preterpasantoj vidu cin parolantan kun mi.

ADRIÀ GUAL
(1872)

Adrià Gual, naskiĝinta en Barcelona, eminenta dramisto, dediĉis sian tutan vivon al teatraj aferoj. Li fondis "Teatre Intim" kaj "Auditorium" kaj direktis multajn aliajn teatrajn entreprenojn, inter ili "Espectacles-Audicions Graner" kaj provojn pri "teatro de naturo". Li faris amason da paroladoj kaj prelegoj por diskonigi la bonan teatron de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj tempoj. Li estas la direktoro kaj la animo de "Escola Catalana d'Art Dramàtic". Li gvidis la prezentadon de "Ifigenio en Taŭrido", de Goethe, unuafoje ludita en kataluna lingvo ĉe la ĝardenoj de la Markizo d'Alfarràs, de "Edipo Reĝo" de Sofoklo, ĉe "Teatre Novetats", kaj de sia propra verko "Mistero de Doloro" dum la V^a Universala Kongreso en Barcelona. Tiel bona estis lia gvidado kaj tiel bona la deklamado de liaj disciploj, la ge-aktoroj de "Escola Catalana d'Art Dramàtic", ke ili estis elektataj de la organizantoj de la Pariza Kongreso por prezenti "Georgo Dandin", prezentado ne realigita pro la ne okazo de tiu Kongreso kaŭze de la Eŭropa milito.

Krom sia tasko de direktoro, Adrià Gual plenumis grandan laboron kiel aŭtoro. Li verkis dramojn, komediojn, farsojn, glosojn pri katalunaj popolkantoj, ĉiam per lingvo delikata kaj milda, kaj vera arta inspiro.

Bibliografio: Nocturn (1 akto); Silenci (2 a.); L'emigrant (3 a.); Misteri de dolor (3 a.); Blancaflor (1 a.); La fi de Tomàs Reynals (3 a.); La culpable; Les alegres comediantes (2 a.); Els pobres menestrals (3 a.); Donzell qui cerca muller (3 a.); La pobre Berta (3 a.); Comèdia extraordinària de l'home qui va perdre el temps (3 a.); Arlequí vividor (1 a.); Els tres tambors (1 a.); La presó de Lleyda (1 a.); Hores d'amor i de tristesa (3 a.); Llibre d'hores; La matinada (1 a.); En Jordi Flama (teatro por infanoj, 1 a.); La serenata (1 a.); k. a. Teatraj studoj; El Geni de la Comèdia; Estudi de farsa italiana; Molière i la farsa dels metges; La comèdia europea durant la divuitena centŭria.

MISTERO DE DOLORO

(Fragmento de la Akto Dua)

Silvestro kaj *Marianeto*, lia duonfilino

(*Marianeto* sidiĝas apud *Silvestro* kaj sin pretigas envolvi lian manon per la nova bandaĝo. Li etendas al ŝi la manon, ne rigardinte ŝin. Ŝi flegas tre zorge, rigardante lin de tempo al tempo, kaj dume ŝi diras):

Marianeto

Jen... tiel... nun, alia volvo. (Paŭzo. Tre mole): Ĉu mi doloras vin? (Paŭzo).

Silvestro

Ne; daŭrigu, ankoraŭ. (*Silvestro* ankaŭ rigardas ŝin, kaj ambaŭ subite kaj reciproke rifuzas al si la rigardadon).

Marianeto

Alia volvo ankoraŭ... kaj restas ĝuste por la knoto. (Paŭzo).

Silvestro

Ĉu vi ne finas?

Marianeto

Tuj. (Kunligante). Ĉu mi tro premas?

Silvestro

Ne. (Paŭzo).

Marianeto

Kiu flegas vin pli bone: ĉu mia patrino? ĉu mi? (Ŝi restas rigardante lin kun preskaŭa rideto. Li ankaŭ rigardas ŝin tre fikse, sed kun dolora esprimo. Post momento, tiamaniere pasigita, li kun impulsa trankvileco, prenas ŝian kapon per sia maldekstra mano, altiras ĝin al la sia, kaj li donas al ŝi fortan kison sur la buŝon. Unuamomente ŝi restas kvazaŭ terurita, ŝi faras timan movon, ŝi rigardas lin senmove..., sed subite ŝi ellasas sin, ĉirkaŭprenante lin kaj elprofunde plorante).

Silvestro (milde apartigante ŝin, ne volante ŝin rigardi)

Lasu min, *Marianeto*, lasu min.

Marianeto

Estas same: nun mi jam ĉion scias.

Silvestro

Ne, vi nenion scias; foriru. Kaŝu, kion mi faris; ne pensu pri tio; tio estis... mi ne scias, kio ĝi estis.

Marianeto (montrante la lipojn)

Estis kiso... *Silvestro*... tie-ĉi... vi vidas? Rigardu!

Silvestro (volante stariĝi)
 Lasu min; kredu.
Marianeto (haltigante kaj residigante lin)
 Ne foriru. (Ŝi ĉirkaŭprenas lin kaj ploras).
Silvestro
 Kion vi faras?
Marianeto
 Mi ploras, ĉu vi ne vidas?
Silvestro
 Sed kial?
Marianeto
 Mi ne volas ĝin scii.
Silvestro
 Ho, Marianeto, lasu min..., ne estas bone, ne povas esti...
Marianeto (rigardante lin)
 Tion saman mi povus esti dirinta al vi, kaj mi ne diris.
Silvestro
 Kial do vi faris al mi tian demandon?
Marianeto
 Kial do ordonis mia patrino, ke mi ŝanĝu la bandaĝojn!
Silvestro
 Kial ni troviĝis unu kontraŭ la alia!
Marianeto
 Ĉu vi bedaŭras?
Silvestro
 Iru.
Marianeto
 Mi ne.
Silvestro
 Mi iros do.
Marianeto
 Tion mi ne volas; antaŭe vi devas diri, kial vi kisis min.
Silvestro
 Mi ne scias.
Marianeto
 Mi scias, kial mi ne rifuzis.
Silvestro
 Vi scias pli, ol mi.

Silvestro
 Vi scias pli, ol mi.
Marianeto
 Tium-ĉi fojon, de vi al mi venas la scieco... Ĝi estas, ke vi amas min. Diru ĝin al mi.
Silvestro (pripensinte kaj plorante siavice).
 Eble jes.
Marianeto
 Ne ploru; mi nenion pli volas scii.
Silvestro
 Do, jen; kvazaŭ nenio estus okazinta. Volu pensi, ke ĉio-ĉi estis nur sonĝo. Eĉ parolu al mi neniam plu pri tio; nek mi parolos al vi. Pensu ion ajn por malproksimigi vin aŭ malproksimigi min... jen, ni finu, ni finu; edziniĝu!
Marianeto
 Ho! kiajn konsilojn vi donas al mi! Aliflanke, mi komprenas, ke vi estas prava, jes; tio-ĉi ne povas esti, ĝi estas peko, morta peko... kaj ankoraŭ pli bone estus, se mi ne amus vin, Silvestron; sed mi amas vin, mi amas vin, multe! (Ŝi ploras kaj denove ĉirkaŭprenas lin).
Silvestro
 Ĉu vere?
Marianeto
 Multe... multe...
Silvestro
 Sinjoro, mia Dio...! Vi sufokas min! Forkuru!
Marianeto
 Ne, mi ne sufokas vin. Vi ja sentas vin bone apud mi; mi ja suspektas, ke apud mi vi sentas vin bone.
Silvestro
 Kompatu min, Marianeto!
Marianeto
 Ne mankas al mi kompatu por ni ambaŭ; sed, kion vi volas, ke mi faru, se mi amas vin tiel multe? Ĉu ne, tio ne estas nova por vi? Diru ĝin al mi! Ĉu vi ne divenis tion jam, kvankam mi nenion diris? Mi sciis, ke mia devo estas ĉiam silenti, konsumigi pro ĉagreno, nenion dirante; kaj al tio mi estis decidita. Mi jam rezignaciis, kaj eĉ mi estis kontenta, ĉar mi tion rigardis, kiel oferon al la amo, kiun mi havas por vi.
Silvestro
 Sed kial vi ne silentis? Tio estus pli bona.

Marianeto

Ĉu vi scias, kial ne? Ĉu vi scias, kio malriglis mian buŝon? La sango de tiu-ĉi vundo, kiu, mi ĝin divenis, elverŝiĝis pro mi. Diru al mi nur, ke estas vero, kion mi diras, kaj mi faros ĉion, kion mi povos, por reveni al silento. (Paŭzo).

Silvestro

Estas vero, Marianeto.

Marianeto

Vere?

Silvestro

Vere. (Montrante la kapon). Mi havis ĉi-tie tiun viron. Ŝajnis al mi, ke iun tagon, li forportos vin, kaj mi havis por li la tutan koleron, kiun oni povas havi por alia. Se vi scius, kun kia ĝojo mi interbatalis kun li hodiaŭ, kaj kun kia plezuro mi estus elfininta lin, se oni ne estus veninta nin disigi. Kaj ĉio por vi, ĉio.

Marianeto

Vi, do, amas min multe?

Silvestro

Multe.

Marianeto

De antaŭ ne longe?

Silvestro

Mi vidas, ke de antaŭ longe.

Marianeto

De antaŭ ol vi fariĝis mia duonpatro?

Silvestro

Mi kredas, jes.

Marianeto

Kial vi ĝin ne diris al mi?

Silvestro

Mi ne estus povinta.

Marianeto

Do, vidu: mi, de antaŭ ne tiom da tempo. Mi povas diri, ke mi amas vin, de kiam mi vidis vin hejme.

Silvestro

Ĉu vi amis filon Labast?

Marianeto

Mi kredis, ke mi amas lin.

Silvestro

Jes, jes, vi amis lin; ne neu tion.

Marianeto

Kredu min, ne.

Silvestro

Ne? Mi ankaŭ tion rimarkis, kion rimarkis via patrino. De unu vidpunkto, mi juĝis la aferon natura, de alia, mi ne sciis, kio okazis en mi. Ĉe la komenco, mi mem estis kontraŭ mi kolera. "Kial vi devas atenti tion ĉi?" mi diradis al mi. "Fraŭlinoj devas edziniĝi". Nu, tiel mi suferadis kaj silentadis, kiel vi silentadis dum tiu tempo, kaj plaĉus al mi, scii tute certe, ke neniam vi edziniĝos. Ĉu vi kredas, ke mi ne rememoras la tagon de la balo ĉe la kampa festo? De antaŭ ne longe mi fariĝis fianĉo de via patrino. Ĝi kaj mi estis en grupo kun la aliaj, dum vi kaj Labast turniĝadis sur la draŝejo de la "Espigolers", kaj ŝajnas al mi, ke tiam la malbonaj spiritoj ekkaptis min. Vi estis ruĝa, gaja; vi moviĝadis kiel kapridineto; vi ensorĉita rigardadis filon Labast; vi ridadis kaj de tempo al tempo vi ektuŝetadis la sovaĝajn papavojn per viaj lipoj, kvazaŭ dankante lin, dum li apudiĝadis al vi, parolante mallaŭte kaj manĝante vin per la rigardo. Se mi estus kuraĝa, mi estus dirinta al via patrino: "Mariano, nenio, kion ni decidis, valoras. Vi estus plaĉinta multe al mi, kiam vi estis juna". Mi bone komprenis, ke vi estas la virino, kiu al mi mankis.

Marianeto

Kial vi ne estis kuraĝa?

Silvestro

Mi ne scias. Via patrino akaparadis min. Estas ŝi, kiu edziniĝis kun mi. Ŝi havis tiajn parolojn, tiom da fajro en la animo!... Mi troviĝis en la reto tute senrimarke... kaj ĉiel, ĉio proksimiĝadis vin al mi... Tiam, vi ne atentadis min, ĉu ne?

Marianeto

Ne tiel, kiel kiam vi restis kun ni.

Silvestro

Mi sufiĉe rimarkis tion.

Marianeto

Poste, jes; tuj filo Labast foriĝis el mia kapo kvazaŭ mirakle, kredu min. Kiam mi vidadis vin, apud la manĝotablo, mi faradis ĉiun eblon por rigardi vin, kiel duan patron, sed neniam mi prosperis. Kiam vespere, ĉe la fajro, vi fumadis la lastan cigaron apud patrino, dum vi ridadis al ŝiaj karesoj, mi komencis kredante, ke ne estas dece rigardi tion kaj mi finis, sentante strangan jaluzecon kaj koleron, ankaŭ multe da kolero. Poste mi iradis kuŝiĝi... kaj mi ploradis kontraŭvole, kaj pensadis pri vi kaj ju malpli mi voladis, des pli mi pensadis kaj ploradis, plie ankoraŭ! Plaĉus al mi koni aliajn preĝojn, ol tiuj, kiujn oni al mi lerni-

gis: ĉiuj estis malfortaj. Mi preĝadis ilin por apartiĝi de la danĝero, kaj por nenio ili taŭgis. Dum longa tempo mi apenaŭ dormadis; poste mi kutimiĝis al tiaj suferoj, kaj mi dormis, sed tiam la sonĝoj venis al mi..., kaj tio estis pli malbona!

Silvestro

Ni do suferis samtempe, kreu min.

Marianeto

Kion vi volas diri?

Silvestro

Jes, sed mi suferadis pli, ol vi. Vi almenaŭ restadis sola, mi ne!

Marianeto

Silvestro!

Silvestro

Kaj ofte, pense, mi havis vin en miaj brakoj, kaj estis ofte feliĉo, ke via patrino kaj vi havas la saman nomon.

Marianeto

Kial, kial vi ne estis kuraĝa!

Silvestro

Ni ne parolu pri tio; ni ne parolu!! Tion ni lasu, kaj ni faru ĉiun eblon, por ne plu pensi pri tio.

Marianeto

Ĉu vi kredas, ke ni povos?

Silvestro

Mi ne scias; ni devas klopodi! (Stariĝante) Promesu al mi, ke vi klopodos de via flanko.

Marianeto (retenante lin)

Mi preĝos al Dio por tion atingi.

Silvestro (denove sidigante kaj kun multe da fajro)

Jes, jes; preĝu Lin, preĝu Lin! Li certe aŭskultos pli vin, ol min! Diru al Li kiel ni estas malfeliĉaj, kaj ke, se Li ne povas alporti al ni la bezonatan rimedon, Li forportu nin el la mondo!

(Mariano venas tra la pordo de la ĉirkaŭmuro; ŝi tenas per la mano botelon kaj falditan paperon. Kiam ŝi malfermas, kaj, ne rimarkita de ili, ŝi ekvidas ilin tiel kunligitajn en amo, ŝi restas surprizita, kaj subite ŝi komprenas la fatalon, kiu ĉirkaŭas ŝin. Ŝi dubas pri tio, kion ŝi devas fari. La bato estas forta; la amo, kiu sufokas ŝin, pli forta ankoraŭ. Ŝajnas, ke ŝi volas iri bati ilin, ŝi haltas, dubas, ŝia koro dispeciĝas. Ŝi malantaŭeniras malgraŭ

si mem..., ploras, vidas la morton proksima... Penso de granda amantino lumigas al ŝi... Ŝi malaperas).

(Dum tiu-ĉi muta ludo de Mariano, la dialogo daŭras sen interrompo).

Marianeto

Ho, ne, Silvestro; min, se estas necese! Vin, ne; vi devas vivi.

Silvestro

Pli bone estas, ke vi vivu. Kion mi faras en tiu-ĉi mondo?!

Marianeto (ĉirkaŭprenante lin forte)

Kial vi ne estis kuraĝa? Diru, diru al mi.

Silvestro

Mi ne scias, mi ne volas tion scii. (Kisante ŝin) Vi vidas? Ne, ne estas eble! Mi deziras esti doninta al vi nenian kison! Nun mi konas la guston, nun mi ne povas vivi sen ili.

Marianeto

Ĉu la miaj plaĉas al vi?

Silvestro (stariĝinte)

Iru, iru for!... via patrino povas alveni.

Marianeto

Sed mi ne scias, kio okazas al mi.

Silvestro

Estas necese, ke vi sciu...; lasu la hejmon, edziniĝu!

Marianeto

Mi ne povas, Silvestro, mi ne povas!

Silvestro

Malamu min do!

Marianeto

Ankaŭ mi ne povus! (Ŝi ploras).

Silvestro

Fatalo, fatalo!

(Oni aŭdas la kanzonon "Marianeto" n, kantatan de Mariano, kiu alproksimiĝas. Oni komprenas en la voĉo suferon, kiun oni celas kaŝi. Tiel ŝi avertas ilin. Tuj kiam ili ambaŭ aŭdas ĝin, ili sin rigardas reciproke kaj, rapide, Marianeto stariĝas).

Trad. FREDERIC PUJULA

GABRIEL ALOMAR

(1873)

Bibliografio: El Futurisme (1903); Una vila que es mor. Tot passant, prozo (1904); De poetització (1908); La columna de foc, poemoj (1912).

LA KISO SUR LA OKULOJ

Pro abelfluga kis' subita,
okul' kliniĝas kvazaŭ flor';
kaj en okul', pro tim' fermita,
pupilo batas kiel kor'.

Kis' sur okul'... Ho, kia brilo,
de mia kiso sub la varm',
en la de tim' plena pupilo,
kvazaŭ birdet' en iu man'!

Aromas jam estonta ploro
sub la palpebroj en ridet';
kaj kun flugila mov-fervoro
batas pupil' en malkviet'.

Kaj ĉirkaŭ ni la tempo fluas
en faŭk-abismon en mallum'.
Mi ĉe l' okuloj viaj ĝuas,
de viaj vidoj je l' parfum'.

En kaptitec' via pupilo,
kiel alaŭdo en la man',
movadas sin kvazaŭ flugilo
por flugi for kun arda varm'...

VÍCTOR CATALÀ

(1873)

Víctor Català estas pseŭdonimo de plej eminenta verkistino Caterina Albert, naskiĝinta en La Escala, apud la bela kaj luma golfo de Roses. Oni ne dirus, legante la energiajn prozaĵojn de Víctor Català, priskribantajn krudajn kaj profundajn dramojn plenajn de doloro kaj de mizero, ke la aŭtoro estas virino, nek oni kredus ankaŭ, ke tiel viglaj kaj mallumaj pentraĵoj pri scenoj de la kampara vivo, de la vivo en solecaj montoj, estas faritaj de delikata virino-poetino, loĝanta apud unu el la plej belaj marbordoĵoj...

Certe en la pentraĵoj de Víctor Català abundas la nigraj tonoj, en ŝiaj majstraj priskriboj sangas la disŝirita kaj turmentita karno de homaj animoj, en ŝiaj noveloj vidiĝas kun doloriga persisteco la ne mildigitaj ombroj de la dramaj malĝojoj de la vivo, sed eĉ en tiu spektaklo la senkompara arto de la aŭtoro sentigas ian ĝuon, ian senton de kompato, de kompreno, de solidareco kun la dolorantaj figuroj, ĉe kiuj oni trovas veran kaj intiman homecon. Kaj subtila poezio, la poezio de la realeco mem, floras kaj brilas meze de tiuj scenoj krudaj, vivantaj...

Apud la eksterordinara riĉeco pri "sentoj" en la prozo de Víctor Català, ekzistas miriga lerteco pri rakontado, eleganta, suka, originala kaj persona stilo, delikataj nuancoj de poezieco, kolor-plena leksikono, beletristika molaĵo ĝue palpebla.

Tiuj ecoj, troveblaj tra la tuta verko de la eminenta verkistino, pleje brilas ĉe la novelo "Solitud", konsiderata de multaj kiel la plej bona novelo kataluna kaj sendube unu el la plej valoraj monumentoj de nia literaturo. Tiu fama novelo "Soleco" jam tradukita en kelkajn lingvojn, certe meritas plenan tradukon en Esperanton. Ni ne prezentas ĉi-tie unu el ĝiaj ĉapitroj, ĉar ni timis profani per tro rapidemaj kaj ankoraŭ ne sufiĉe lertaj manoj la belecon de tiu verko senkompara, unika, kiu estus fariĝinta mond-fama, se nia kataluna lingvo estus pli vasta kaj atinginta la gradon kiun por ĝi ni deziras.

Ankaŭ kiel poetino, Víctor Català estas bone konata. Ni prezentas tradukon de ŝia bela glosa al versaĵo de Maragall, kaj ankaŭ la tradukon (en versa formo) de ŝia ritma prozaĵo "Fabelo serena". Per ĉi-tiuj du versaĵoj kaj per du tre bone tradukitaj prozaĵoj, la Esperantaj legantoj povos, ni kredas, ekgustumi la verkon de nia admirata aŭtorino.

Bibliografio: Verso: El cant dels mesos (1902); Llibre blanc (1905). Prozo: Solitud, novelo (1905); Caires vius (1907); Drames rurals; Ombrívoles; La mare balena.

RIGARDE AL MAR'

(Gloso al poemo de Joan Maragall, vidu paĝon 193)

I

Apud de mar' l' eterna malkvieto
 revas eterne sen kviet' poeto
 de l' animo giganta,
 vidante, ke florigas pomarb' blanka
 sian revon je flor' blindiga hele,
 dum li florigas strofon ravan bele.

II

La mar' estas poeto de la kreitar',
 poeto estar mar' en la anim' de homo.
 Tremas de emoci' poeto kaj la mar',
 vidante apud si la ĝermon de la pomo
 fiere flori je
 eterna tentofar'.

III

Libera je regulo kaj mezuro,
 la mar' — poet' giganta de Naturo —
 paradas per radia per beleco,
 jen plena de teruro,
 jen plena de dolĉeco.
 Libera je la ritmo kaj la rimo,
 poet' — ne sklavo de malvasta bar' —
 rimon li portas en si mem kaj ritmon,
 kiele blua mar'.

IV

Mar' blua, mar' verda, maro ŝaŭmadanta!
 Kant' via — deliro; koler' — plendo kanta!
 En pac' aŭ ribelo, terur' aŭ kvieto,
 vi ravas ĉiame pomarbon la blankan,
 ĉar vi — la Poeto.
 Poet', observanta apude de l' mar'
 la venon de ŝtormoj, forirojn de bark';
 la koron je granda pliĝi, sentanta:
 paradu, poeto, per fort' radianta,
 ke ankaŭ vi ravas, ĉar vi — mar' giganta.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

FABELO SERENA

Bela kiel Apollo: lia vesto,
 mallonga kaj ligita al la trunko,
 kiun almuldis la Genioj; nudaj,
 la fortaj brakoj, kaj la kruroj ankaŭ;
 kiel eburkolono, lia kolo;
 kapo alta, severa kaj majesta;
 okuloj helaj, kiel brulaŝtipo, —
 Endimiono suprehiras monton
 Latmo. Sagon la bronza pugno tenas,
 vundontan la cervidojn flugrapidajn,
 kaj antaŭ li la paciencaj ŝafoj
 manĝas la herbon de l' paŝtejo suka.

Estas la milda sunsubira horo...
 Febo, la Dio de hararo ruĝa,
 de longe jam trairis la zeniton,
 per sia ĉaro radosulkojn vastajn
 kaj purpurajn farante, orohelon
 semante sur la pintojn de la arboj...
 Estas kvieta horo, por ĉagrenoj
 konfidencia, estas milda horo
 de l' bruetoj malgajaj kaj sopiraj,
 kiam kolomboj de Venuso kveras
 en la bruna soleco de la temploj.

Endimiono, la paŝtisto bela,
 paŝas sur monto supren al la altaj
 pintoj, ĉerpantaj la helecon lastan
 de l' brulado sidera. Kaj malsupre,
 sur la ebenoj, en la plej trankvila
 volupto, grenoj blondas atendante
 la falĉohoron; mirtarbaroj jetas
 aeren ĉirkaŭ ili bonodorajn.
 La gejunuloj, spiregante ĝue
 kaj lumbria, sur montflankoj restas,
 kie brueto de la kisoj sonas
 ĉe foliaro, kiel akv-murmuro.
 Endimiono, la rapidkrurulo,
 laca sidigas; liaj brakoj falas
 laŭlonge de la trunko, kiel velo
 de triremo senmova; harofrizoj
 sur frunto lia mirvalon faras.
 Kaj rigardante horizonton, kiu

antaŭ li sin malfermas, kiel floro
brulanta, je Destinoj primeditas
la bela knabo. Pensas li, ke Dioj
regantaj tutan mondon, lin forjetis
sur brunan teron, kiel ŝtonon, kiu
en fluo kota de la vivo iras
rulate de l' hazardo. Li sin trovas
laca; ĉio de li vidata kaŭzas
al li enuon, kaj nenio ĝojon;
ĉar lin la febro de freneza emo
senĉese rodas, kiun ne nuligas
odora vino en pokalo vasta,
nek plaĉa amo de fraŭlino juna,
nek la humilaj mildeblekaj ŝafoj,
nek sago traboranta la aeron,
nek mem la vivo, kiu al li pezas...
Pli fortan, ol la vino, li bezonas
ion, povantan elestingi ĉiam
ardan soifon, kiu lin bruligas;
ion pli dolĉan, ol virina amo;
ion pli belan, ol la blankaj ŝafoj;
ion kuraĝan, pli ol fluga sago;
ion pli grandan, ol la homa vivo.
Kaj Zeŭso diras: — Laŭ deziro, petu! —

La koro de l' paŝtisto, ĝojebria,
batas en brusto, kiel juna birdo
provanta flugi, je flugado virga,
por alteniri trapasante nubojn.
Fierigita de malhumileco,
levas la kapon ornamitan ore
de haroringoj, kaj okulojn turnas,
kaj antaŭen hardite rigardante,
tiel respondas li al la Sinjoro:
— Homojn gefratojn mi malgrandaj trovas
pro iliaj instinktoj kaj pasioj,
kaj superi mi volas ilin ĉiujn...
Senmorta esti tra l' jarcenta polvo! —
Zeŭso meditas kaj respondas: — Estu! —

Dolĉa, serena kaj solena, kiel
de virgulino ĉasta l' edziniĝo,
la nokto venas... Mallaŭtiĝas voĉoj
kaj flugas la Zefiroj en mistero
kvazaŭ de revo. Sur la maraj rokoj,
diafanaj Sirenoj alkuŝiĝas
sur la muskajn kusenon, kaj vesperto,
la birdo de malcerta flugo, tien

kaj aliloken mirigite glitas
sen ia bruo, en malhela vesto...

Malsupren iras sur Forgeso-monto
Endimiono, la olimpa; paŝas
embarasita de dormemo forta
pro kiu lace la palpebrojn fermas.
Ne malproksime li rekonas lokon,
kie kuŝadi ĝis Aŭroro brilos;
ĝi estas kavo, kies buŝon kovras
hederoj kaj likenoj, plektiĝante
kvazaŭ en milda, ĉe mallaŭto, sveno, —
en kies fundo sur ŝtonrando lumas
du okuloj otusaj, fosforeskaj.
Endimiono la arbustojn ŝovas,
kiuj vekigis kun murmuro mola,
du paŝojn faras en malsekan ombron,
kio lin kovras per malvarmo prujna,
kaj demetas surteren la sagujon,
dum ripozo kusenon por la kapo.
Jus kuŝiĝinta, tuj al li palpebroj
fermiĝas; post sopiro de feliĉo
restas dormanta, kiel suĉinfano
en vartaj brakoj de la nutristino.
Eĉ al li ŝajnas sur la freŝa vango
senti elspiron delikate varman
de virino; kaj tamen ne virino,
sed Vulpo ruza estas, kio venas
al la kuŝinto, ĉirkaŭrigardante
lin per okuloj pro surprizo granda
palpebrumantaj. Tuj, vekante Eĥojn,
eliĝas bleko el profundo kava,
kaj aliras, trenante voston, Lupo
flaranta suspekteme la mallumon.
Ĝiaj okuloj malkvietaj jetas
rapidzigzagojn de verdeco hela,
ĝis kiam Vulpon ekvidinte, ili
jen pro timo fiksiĝas, jen minace.
Kaj ĵus ĝi faris, kiam baraktado
de flugilegoj la aeron batas
kaj kun dismovo de freŝeco, Korvo,
el la spaco, malluma alteriĝas;
kaj sur roko Serpento verda rampas
ambaŭflanken swingante sian kapon.
Ĉirkaŭe la dormanton la kvar bestoj
sin metas diligente kaj tre ĝojaj
je la festeno, kiun la mallumo
rezervas bonvolema nur por ili...

Kaj elektas antaŭe ĉiu sian
 akirotajon laŭ la gusta ŝato.
 Manĝema Lupo, la malklarrigarda,
 la internajojn volas mordi akre
 kaj ilin preni je fumantaj pecoj.
 Vulpo la ruza plej la kapon ŝatas
 por formanĝi la cerbon rapidurĝe,
 varman ankoraŭ de l' idea ago,
 je intelekto homa mastriĝonte.
 Korvo pensas alie: same estas
 al ĝi nenio aŭ la intelekto;
 ĉar ĝi revas enigi la ungegojn
 retorditajn en bruston karnodensan,
 kaj bekfrapante, ĝin disŝiri, ĉifi,
 ĝis kiam trovos sub la kurbaj traboj,
 la ripoj, ruĝan fonton de la vivo.
 Al si hardita la Serpento diris,
 ke lanco sia, ĝi angion vundos
 kaj ĝi trinkos la sangon estingontan
 ĝian prujnan malvarmon, — fortigontan
 por rektigi la korpon, kiel Homo.

Kaj kviete Endimiono dormas,
 kiel Di-elektito; sur la tero
 li havas sian korpon: malproksime,
 sur la Olimpo, sian fantazion;
 sed por li jen la horo! Lupo blekas
 kun volupta spirado; Vulpo venas
 per lango dorlotante sian faŭkon;
 Korvo streĉas la kolon kaj ekkrias
 kaj Serpento rektiĝas sur la vosto...
 Kaj dume iras tra la densa ombro
 persista, vibra siblo de Otuso...

Pleniĝas spaco per heleco... Nubo
 mirinda tereniris; ĝiameze,
 reĝo de Dioj, tero kaj aero,
 Zeŭso eliĝis kaj antaŭeniras
 rekte al kavo, kien li eniĝas.
 Lupo kaj Korvo posten kuras, blindaj,
 kaj en ombron rapidas Vulpo kuŝi,
 dum la Dio, fulmante per rigardo,
 Serponton prenas kaj vipadas ilin,
 tremigante la kavon per parolo:
 — Malperfektaj estaĵoj, fiaj monstroj
 de malbonaj instinktoj, kunularo
 de inklinoj malplaĉaj, malŝatindaj...
 Indiferentaj bestoj je la Belo

— apanaĝo de Dioj, — enviemaj
 je intelekto kaj je vivo pura,
 for de la sankta homa ripozejo!
 Vian senpovan muksalivon verŝu
 sur teron, kiun suverene paŝos
 plandoj de Homo; sed haladzo spira
 de viaj buŝoj, for de lia kapo,
 elektita por templo de la revoj... —

Kaj dum Zeŭso parolis, tuta tero
 spiron haltigis... kiam li silentas,
 Lupo time kaŭriĝas kaj la Vulpo
 sin ŝovas tra mallumo, silenteme,
 kaj Korvo sub flugilojn kapon metas...
 Serponton Zeŭso jetas, kiu falas
 sur teron kun traf-sono de molaĵo
 kaj senmove restadas tie; dume
 en la profundo, sur ŝtonrando, siajn
 okulojn lumajn fermas kaj malfermas
 Otuso, fikse rigardante Dion,
 kies ordonojn ĝi atendas. Tiel
 al ĝi parolas Dio: — Kamarado
 de paco kaj sekreto! Garde staru
 apude elektiĝon, envolvitan
 de mistero, ke vi komprenas bone
 kaj obeas respektive mian volon! —
 Kaj Zeŭso realtiĝas en la nubon,
 kovrante per parfumoj homan mondon...

Infinito fendiĝas: brilas Luno...

Kaj honteme la steloj trembrilas...
 kaj la spaco skuiĝas kaj ekĝemas...
 kaj la fondo mallaŭte murmuretas...
 sub foliaro proksimiĝas birdoj...
 leono ĉe dezerto raŭke blekas...
 sur verdaj lagoj akvfeinoj naĝas
 onde trenante la hararon blondan...
 kaj plejbela kaj pala jonkvilfloro
 la tigon streĉas en odora sveno...

Kaj tutan teron iluminas Luno...

La kavo suĉas diligente ombrojn;
 likenoj kaj hederoj malplektiĝas
 kun ĝoja skuo, invitante Lunon
 inter ilin... Kaj Luno tuj eniras...
 Estas la bela knabo sur la tero,

kuŝa statuo el marmoro roza...
 Sur la tempioj, — flokoj de orharoj
 kaj la vizaĝo, — kiel masko vaksa...
 Luno lin vidas: per rigardo pala
 haltas lin mirefikse rigardadi,
 dum spasma daŭra ĝin subite skuas...
 De post la tempo, kiam mondo estas,
 ĝi ne memoras de mortulo saman
 miraklon, nek pli grandan superbeldon,
 nek mirindaĵon tian... Kaj venkita
 de la sorĉaĵo, kiu ĝin potencas,
 dormanton volas ĝui, dum li dormas.

Endimiono ĉe l' unua kiso
 tremante sentas, ke mistero vibras
 en interno de li; la vasta spaco
 de la sonĝo mistera tutplenigas
 per heleco lin forte blindiganta...
 Ebria de feliĉo ne sentita,
 ĝis profundo de l' esto atinganta,
 li dolĉe sin fordonas al Lunhelo,
 sentante, ke li ĉiam estos ĝia.

La Mondo antaŭsentis la magian
 edzofeston, kaj mire ĝi silentas
 kaj aŭskultas avide; la Diinoj
 en Olimpo forgesas dum momento
 pri la Dioj eternaj kaj ekpensas
 pri malproksimaj homoj... dum Otuso
 sur ŝtonrando, senŝanĝe gardstarante,
 malfermas kaj refermas la okulojn,
 lumantajn en la ombro kiel lampoj
 edzfestaj kaj per siblo tonpersista
 kantas senfinan himenean kanton...

Forkuras la Zefiroj; la Sirenoj,
 ridante, sur la rifojn de koralo
 kunrifuĝas, timemaj je la lumo;
 kaj unu post alia disfandiĝas
 la palaj steloj en etero blua...
 Arbo, skuante sian verdhararon,
 la birdojn ĵetas al la ventoblovoj,
 tintas la fontoj kun sonoro ĝoja,
 la floroj kaj folioj gutas roson,
 el fundo de l' ĉielo tero iĝas
 kaj en la spaco grakas akre Aglo...

Ekhelas la Aŭroro sur la tero!...

Edzofestaj lampetoj estingiĝas,
 hedero la malsekan foliaron
 apogas dorme al lulilo ŝtona,
 kaj, disĵetitaj, sub la suno blankas
 ostoj sur muske tapiŝita tero.
 Kiam heleco tra palpebroj liaj
 Endimionon vekis, li sopiras,
 kaj sentante plezuron en la sino,
 kaj feliĉan, mirigan korpotremon,
 li kredas, ke ankoraŭ revo daŭras...
 Sed kun nova fortiko li stariĝas
 tute hardita kaj sentante fajron,
 kiu hartas al li animon lian.
 Kaj tiam, kortuŝita de l' miraklo,
 demandas Diojn, kio li fariĝis...
 Zeŭso respondas lin: — Saluton! Homo
 al amo senmakula fordonita,
 al la amo je lumo, heroiga!...
 Senmorta estu tra l' jarcenta polvo! —

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

ANSTATAŬIGO

Estis edziniĝintaj la filinoj, unu post alia, dum malpli ol unu jaro, kaj, kiam ne restadis en la domo alia virino ol la patrino por elporti la tutan pezon de l' laboro, pulminflamo ekkaptita kiam ŝi eliris varma de la forno por prizorgi la porkidojn, senvivigis ŝin post ne pli ol oktaga malsano.

Oni ŝin entombigis ĉe la malproksima tombejo de la najbara vilaĝeto, kaj, reveninte hejmen, post la enterigo-procesio, kun la oreloj ankoraŭ plenaj de la funebraj kantaĵoj de la pastroj, la koro trapikita de la amara sento pri sia vidveco kaj la okuloj ruĝaj kiel juna perdrikido, la patro sidiĝis sur la dorsbenko apud la kameno kaj vokis la filojn ĉirkaŭ sin. Tiuj-ĉi sidiĝis sur la skabeloj kaj malaltaj seĝoj, lasante koridoron tra kie povus pasi de la fajrujo al la tablo la plej aĝa filino, kiu sin okupis por la vespermanĝo, kaj atendis ekparolon de la patro.

Ĉi-tiu havis la kapon mallevita kaj larmoj perlis ĉe la angulo de l' okuloj.

La plej aĝa filino, strabe lin rigardante, eksentis ke ploro suprenvenas al ŝia gorgo, ĝin obstrukcante, kaj la filoj mordis al si la lipojn senĉese.

Fine la patro, demetinte sian *baretanon* kaj ĝin turnante inter siaj manoj, murmuris per emocia voĉo:

—Jen vi vidas, miaj filoj, kia malfeliĉo!...

Li ne povis daŭrigi: singulta kredo rompis en li la parolon.

La singultoj de ĉiuj filoj alrespondis unuĥore kaj kelkaj manoj treme etendiĝis, sendecide, al li, kun ŝajno al li doni filan helpon en tia situacio...

—Patro!...

La patro skuis la kapon senespere.

—Neniam, neniam mi povos rezignaciigi je tio, miaj filoj!...

—li ekkriis kvazaŭ responde al la amaj sintenoj: —tiu-ĉi hakilbato ĉe la maljuneco mortigos min neeviteble... Perdi la edzinan-kunvivon estas ĉion perdi en la mondo...

—Patro — diris la filino viŝante al si la okulojn per la mandorso: — restas al vi la filoj... la filoj kaj la domo...

—Jam mi scias, filino, jam mi scias... kaj jen pro tio ni devas interparoli... se mi restus sola mi ne travivus tiom da peno; tiel mallonge tio daŭrus!... Sed, nun,... vi devos reiri ĉe vin post oko da tagoj, ĉar plej longe post dekkvino vi havos sur vin la falĉlaboron... La malplej aĝa filino loĝas malproksime kaj troviĝas ĉe la lastaj gravedtagoj... Ni restos, tiuj kaj mi, kiel infanoj sen gvido kaj kun la tuta domlaboro... kaj tio ne povas daŭri, estas necesa virino, hejme.

La unuenaskito mallevis la kapon, kaj lia frunto, velkanta pro malsaneco, iom paliĝis.

La patro salivglutis kaj reparolis per voĉo pli malfirma:

—Pro tio mi vokis vin, por havi interkonsiliĝon... Ĉiu esprimu sian opinion...

Sed ĉiu silentis, la patro levis la okulojn kaj ĉirkaŭdirektis longan rigardon sur la mallevitajn kapojn de siaj filoj. Poste li aldonis:

—Ni eble povus dungi servistino...

Malprofunda gesto de malaprobo de ĉiuj sekvis tiujn hezitantajn vortojn.

—... Sed estas tiel sencerbaj la junulinoj kaj tiel kriplaj la maljunulinoj, ke... Kaj, krom tio, konfidi la ŝlosilon de ĉia havaĵo al fremda persono...

Tiun-ĉi fojon la gesto de la filoj estis tute aproba.

Mi vidas ke vi opinias kiel mi... Tiele, ne estas pli ol unu rimedo... Unu el vi devos edziĝi...

Ĉies rigardoj konverĝis al la unuenaskito.

La patro alkonsentis.

—Jes, ĉar kompreneble ne koncernas min tion fari... Kaj ankaŭ ne estas juste ke tion faru la mezaĝa filo se li iam devos foriri el la domo...

La unuenaskito ellasis profundan spiron kaj malrapide diris:

—Nu, bone; mi edziĝos... Diru al mi kun kiu...

—Pri tio, vi mem, mia filo... elektu knabinon kiu plaĉos al vi; vi sufiĉe scias kio konvenas al ni...

La unuenaskito, senkuraĝa, turnis la kapon de unu flanko al la alia.

—Ne, ne; al mi estas indiferente... tiun kiu ŝajnos al vi preferinda...

Ili tion interdiskutis kunside, citante nomojn kaj subesplorante avantaĝojn, kaj antaŭ la vespermango ili decidiĝis, kun ĝenerala aprobo, al juna parenicino kiu loĝas en farmodomo ĉe alia distrikto, kvar horojn malproksime. Jam de kelkaj jaroj ili ne vidis ŝin, sed ŝi kredeble estas jam plenkreska virino; oni povas supozi ŝin tia, konsiderinte ŝian tiaman kreskon kaj ke ŝi elvenas el bona familibrancō.

Post la ok tagoj, la patro iris peti ŝin kaj li restis kunakorde kun ŝia familio.

La proksiman dimanĉon ekiros ŝin viziti la unuenaskito.

Tiu-ĉi, posttagmeze, ekprenis la angilnasojn kaj sin direktis al la fiŝkapejo. Neniam li sin sentis tiel malgaja kiel tiun tagon kaj li spiris kun la sama malfacileco sentata kiam li antaŭsentas ŝtormon.

Li komprenis ke hejme oni pravos, ke en ĝi estas necesa virino, sed li ne sentis sin sufiĉe forta por edziĝi, li kiu neniam povis ĝui la junecon, kiu ne povis dancadi, kiu ne povis kuri, kiu ne povis surporti la grensakojn supren tra la ŝtupoj, kiu ĉiun kvarmonaton devis trinki medikamentojn, kiu apenaŭ farante paŝon pli rapidan ol la antaŭa jam spiroblovegas, kiu ĉe la plej malgranda malplezuro remalsaniĝas por jaroj... Kaj, krom tio, li memoris la konsilon de la kuracisto:

—Vi, knabo: havu prudenton, multe da prudento. Ne forgesu tion: alie, vi pentus... Vi havas la koron pli malforta ol vi kredas.

Sed li estas la unuenaskito... kaj, se li ne edziĝos, edziĝos la duenaskito kaj li okupus lian postenon... Ĉar lia patro jam diris tion, ne estus do juste ke la alia laboru kaj elportu la tutan ŝarĝon de la domo se poste li devus foriri... Kaj, se li ne forirus, li, la plej aĝa, perdus ĉiajn rajtojn, kaj, sola kaj sen sano, en la maljuneco li nur estus baro... Ĉar, forte laboradi, sufiĉe oni komprenis ke li neniam povos... Estis al li necese resti heredonto¹, estis al li necese edziĝi...

1. La kataluna familio havas tute specialan moron rilate al la hereda rajto. Ĝi estas: la unua infano kiu naskiĝas, akiras tiun rajton kaj la devon resti en la domo kune kun la gepatroj, por iam preni ĝian direkton; se ĝi estas filino, ŝi akiras la saman rajton sed ĝin perdas kiam naskiĝas filo aŭ ĝin konservas se nur naskiĝas filinoj; tiamaniere, ke dum ekzistas filo en la domo, kvankam li estas la malplej aĝa aŭ la mezaĝa inter la filinoj,

La sekvintan dimanĉon li sin direktis al la ĉefvojo kaj prenis la publikan tartanon² de la veturigisto kiu pasis, vojire al la urbo, horkvaronon malproksime de ŝia domo, de la domo de la fianĉino.

Kiam ĉi-tiu eliris renkonte al li tra la malsupra flanko de l' draŝejo, la unuenaskito restis eksurprizita.

Dum la jaroj kiam li ne vidis ŝin, ŝi fariĝis belforma knabino kiu kaŭzis ĉarmon. Ŝi estis tiel altkreska kiel li kaj kun la haŭto, sur la vizaĝo kaj brakoj, blanka kaj rozkolora, kvazaŭ neniam ŝin estus tuŝinta la suno. Ŝi havis la okulojn verdaj kaj la rigardon dolĉa; kaj la haroj blondaj, dividitaj per linio, formis grandan hartuberon sur la okcipito. Ŝia voĉo estis klara kaj gaja kiel infana voĉo; ŝiaj pozoj, de honesta knabino; kaj ŝi montriĝis pura kaj ordigita kiel vilaĝa knabino...

Ili eniris en la farmodomon por konversacii momente kun la gepatroj, kaj poste, jam solaj, laŭ gefianĉa maniero, ili kuniris ĉirkaŭpromeni eksteren.

Ŝi montris al li la legomejon, rakontis ke ŝi havas dek specojn de diantujoj, kunkondukis lin al bedoj kie la lasta riverakvego forprenis al ili duonon da terstrio.

Kiam, ĉe la vespero, ŝia patro akompanis lin ĝis tie tra kie pasis la veturilo, la unuenaskito havis la koron pli trankvila ol ĉe la alveno, kaj eĉ la haŭto sur lia frunto velkanta pro malsaneco ŝajne streĉiĝis kaj freŝiĝis.

Ĉe la alveno hejmen, lia patro, iom tima, demandis lin:

—Nu do, filo, kian impreson vi ricevis? —

La unuenaskito, tute animita, respondis:

—Ke ni faros bonan akiron, patro...

La patro kunigis ambaŭ manojn kaj direktis la okulojn al la ĉielo, poste ekiris rapide al la stalo, doni la porcion al la brutaro, por ke la filo ne rimarku sur li la larmojn... Li rememoris sian edzinon.

La sekvintan dimanĉon, kaj la sekvintan kaj postsekvintan, la unuenaskito reiris viziti sian fianĉinon. Ŝi jam ne atendis lin malsupraflanke de l' draŝejo, sed ŝi ĝisiris kelkan interspacon pli antaŭen ĝis apud la loko kie lin delasis la veturilo. Ŝi venis tien tute ruĝkolora, ekŝvitanta, kaj kiam ŝi lin vidis, ŝi alridis almontrante dentojn kvazaŭ el delikata fajenco.

Iun tagon ŝi staris tiel lacevarma ke li proponis al ŝi sidiĝi kelktempe sub tamarindo, kaj ili sidiĝis.

Ĝis ŝi edziniĝos ŝi havis la dimanĉojn liberaj, ĉar ŝia patrino

nur al li apartenas tiu rajto. Same do, se ekzistas pli ol unu filo, krom la filinoj, la rajto ĉiam apartenas al la plej aĝa filo, al la unuenaskito, kaj se mortas tiu-ĉi, ĝi transiras al la duenaskito kaj tiel plu. — N. de la T.

2. Durada veturilo.

zorgis pri la tagmanĝo por ke ŝi povu paroli kun sia fianĉo. Kaj tiun tagon, dum ŝi parolis, ŝi ventumis sin per la antaŭtuko, kaj je ĉiu pintofrapo, la unuenaskito eksentis alfluon de bonodoro kiun ankoraŭ li neniam estis sentinta; kaj rigardis la orelojn de sia fianĉino kaj opiniis ke ili estas bele formitaj kaj rimarkis ke kiam ŝi parolas, ŝi ĉiam eligas langopinteton kaj ĝin rapide pasigas sur la lipojn ilin malsekigante, kaj ke, tion farante, ŝiaj lipoj fariĝas ruĝaj kvazaŭ la salivo estus pura sango.

Ili revenis al la farmodomo, ĝuste antaŭ tuja pretigo de la tablo, kaj ŝi, tute ridema, petis de li kunstreĉi la tablotukon kaj li alportis al ŝi la telerojn kaj la kulerojn; kaj post la tagmanĝo, ili eliris detranĉi pizojn ĉe la legomejo, kaj ŝi trempis folion el kardo kaj, subite, kiam li plej malatente restadis ŝin elrigardante, ŝi aspergis al li la tutan vizaĝon... Li sentis eksalton de io viva en la brusto, vundis lin fulmo de ebriga delico kaj lia vizaĝo ruĝiĝis kvazaŭ oni estus doninta al li vangofrapon.

Post la vespermanĝeto, li adiaŭis ŝiajn gepatrojn kaj ambaŭ ili kuniris al la ĉefvojo. Duonvoje, pro tio ke li plimalrapidigis la paŝon, ŝi demandis lin, mirigite:

—Ĉu vi estas laca?...

—Ne... sed ni havos ŝtormon...

—Kiel vi tion konas? — demandis ŝi, surprizita, vidante la ĉielon blua kaj pura kiel angela okulo.

—Ĉar mi havas enŝtopiĝon...

Kaj la fianĉino rimarkis ke la vizaĝo de l' unuenaskito restis pala kaj kvazaŭ pli velka kaj maljunece ol ordinare. Kun granda miro lia, ne montriĝis signo de nubo ĝis la nokto, kaj tiu-ĉi etendiĝis sur la tero kiel mantelo el blua silko tute brodita per lumreflektaĵoj kaj fosforbrilantoj.

Por la unua fojo la prognozo de la enŝtopiĝo kaj angoro estis malsukcesinta, sed la unuenaskito restis gaja kaj dum la tuta vespermanĝo li nur parolis pri sia fianĉino, pri la diroj de sia fianĉino, pri la pizoj kiujn li detranĉis kune kun sia fianĉino... Nur li rezervis por si la delican aspergon kaj tiujn alfluojn de bonodoro sub la tamarindo. Al lia instinkto de enamiĝinto estus ŝajninta profanago komuniki tion al aliuloj.

—Kaj la vestaĵoj, kiel antaŭeniras? — demandis la patro, kontenta de la animeco de l' unuenaskito.

—Pretigiĝante, pretigiĝante... Baldaŭ oni alportos al ŝi la komodon kaj ĉio estos preta por kiam alvenos la geedziĝa permeso...

—Plej bone, ĉar la falĉlaboro...

—Nu, ne timu, ĉar dum la falĉadtempo vi havos jam bofilinon... Kaj li ridetis, feliĉa, kiel neniam li ridetis en sia vivo.

Sed la ŝtormo antaŭsentita venis, kvankam kun ok tagoj da prokrasto.

Matene ne montriĝis ia signo, ke ŝanĝiĝos la vetero; tiama-

niere, ke la unuenaskito eliris el la domo nur kun la vergo ĉe la mano kaj la agava tuko ĉirkaŭ la kolo.

— Ĉu vi ne sufokigas, tiel kovrita? — demandis ŝi. — Vidu: mi nenion povas porti ĉirkaŭ la kolo! — Kaj el sub la korsajtukoj, mallonge surmetita, ŝi elmontris al li la malagrafitan korsajkolumon kaj la karnon, blankan, blankan, depost la elvidiĝo ĝis la orelo.

— Ho vi! Ĉar vi havas la kolon bela, jam vi povas ĝin elmontri! — ekkriis la unuenaskito: kaj li ekridis, tute mirigita li mem de tiu ŝerco kiun li ĵus faris. Poste, kvazaŭ alfluus al li tumulto da vortoj, li ekparolis, parolis, pritraktante kun malkonstanteco, pri multaj aferoj: pri la bredbrutaroj kiujn oni havas ĉe li, pri la angiloj kiujn li kaptadis la festotagojn, antaŭ la fianĉiĝo, pri la nova vesto kiun al li konfekcias la vilaĝa tajloro, pri la orelringoj kiujn li iros aĉeti kun ŝi al la urbo la proksiman jaŭdon...

— Kiel vi preferos ilin? Kun ŝtonoj verdaj aŭ ruĝaj?...

Ŝi mallevis la kapon tute konfuzita kaj modeste respondis:

— Mi ne scias... kiel vi volas. Tiamaniere ke ili kostu plej malmulte da mono...

Li eksilentis, kaj ŝin elrigardis ravite; poste li murmuris tute kortuŝita kaj dankema:

— Kian ĝojon ricevos la patro kiam mi sciigos al li ke vi respondis al mi tion!... Vi nepre konvenas ĉe ni! — Kaj li mole aldonis: — Sed tiujn aferojn oni aĉetas unu fojon dum la vivo kaj oni devas ilin bone plenumi... Ĉu duro ' plie ĉu duro malplie... Ni jam regajnos ĝin, se Dio donos al ni sanon... Intertempe, mi volas ke ĉio necesa estu tute je via plaĉo...

Kaj ĉar ŝi ree alpaŝis kun la okuloj teren, li ekbalbutis:

— Mi jam dezirus esti edziĝinta. Ĉu vi?...

Ŝi ruĝiĝis kiel ĉerizo kaj turnis la vizaĝon al la densaĵo de la termuro.

— Sed nu!... — ŝi dolĉe silabis. — Kion vi volas ke mi diru?... Tiajn aferojn... oni ne pridemandas.

Li, ĉe ekpenso, prenis al ŝi la manon kiun ŝi portis pendanta kaj ĝin alpremis kontraŭ sia brusto.

En tiu momento, densa nubaro kovris la sunon...

Ili revenis al la farmodomo per viveca paŝo kaj ofte rigardante la ĉielon: tiu-ĉi estis tute malluma ĉe la flanko de okcidento, kvazaŭ ĝi estus ricevinta grandan ekbaton: ĉe la suda flanko tiu nigraĵo jam kovris pli ol la duonon kaj ekpluvetis rapide, senhalte. Je du horoj malproksime ekkrevis la furioza ŝtormo. Tondroj, pluvo, fulmoj supermezure kaj kiel okaza fino, la ĉefa afero: hajloŝuto kvazaŭ el sukergrajnoj, el aveloj, el nuksoj... Kaj meze de la mallumo subita kaj preskaŭ kompleta, de la konfuzo de bruegoj kolektiĝintaj, de la zigzago ellumanta de

(1) Kvinpeseta monero.

la fulmoj, la tuta anaro el la farmodomo apudiĝis al la kovritaj fenestroj, kun la vizaĝo terurita kaj la manoj sur la kapo.

Tuj kiam la vetero iom heliĝis, la unuenaskito parolis pri reiro; oni proponis al li ke li restu, ke li tranoktu tie... Li rifuzis. Tio ne povis esti; unue, ĉar ĉe li oni maltrankviligus; poste, ĉar la morgaŭon oni devis konduki la ĉevalinon al foirejo kaj por tio du devis foriri kaj la alia resti por la laboro. Jam li tro prokrastis la reiron kaj li devos rapidigi la paŝon por alveni antaŭtempe al la veturilo...

Oni liveris al li pluvombrelon kaj li foriris. Flanke de l' draŝejo li turnis sin por adiaŭi la fianĉinon kiu ne akompanis lin pro la vetero, kaj li sola entreprenis la vojeton. La timo malfrui spronis lin, kaj, jen kotigante sur la malmola tero, jen sursaltante kavetojn kaj akverojn, li vojiradis rapide, kvazaŭ oni lin persekutus. Feliĉe tiun tagon li sin sentis pli malpeza kaj diligenta ol ordinare kaj nek la malsekeco ĉe la piedoj nek la refreŝiĝo de la atmosfero, ellasita de la ŝtormo, kaŭzis al li malbonan impreson. Tamen, kiam li sidiĝis sur la koloneto ĉe la ĉefvojo, li estis tute ŝvitanta kaj lia brusto elspiris kiel blovilo. La naztukon kiun li pasigis sur la vizaĝon, same kiel tiun de la kolo, oni povus deŝvitigi.

Li ekrigardis supren kaj malsupren de l' ĉefvojo: Flanke de la urbo, proksimiĝis neniu; kontraŭflanke, plej malsupre, elmontriĝis nigra makulo, sendube veturilo kiu vojiras antaŭen. La unuenaskito opiniis ke estas feliĉo ke ankoraŭ ne elvidiĝas la tartano ĉar tiamaniere li povos iom ripozi. Sed, en tiu momento, elaperis el malantaŭ arbustoj, ĉe proksima termuro, maljuna kamparano ĉirkaŭvolvanta la zonan al la talio. Rimarkinte la unuenaskiton sidantan sur la koloneto, li salutdeziris al li bonan vesperon, kaj, ĉar li jam vidis de sia kampo alian dimanĉon kiam li adiaŭis sian fianĉinon, suspektinte tion kio okazis, li aldemandis lin rideme:

— Ĉu eble, vi atendas la tartanon? —

Kaj al la jesa respondo de l' unuenaskito li krevis per rido, kaj ekkriis:

— Vi povas jam ĝin atendi, diable!... Vidu ĝin tie, plej malsupre, preskaŭ ne videblan...

La unuenaskito ricevis ekfajriĝon. Lasi lin en tago tia, malgraŭ lia antaŭavizo, estis ago senskrupula!...

— Se vi entreprenos longan troton, vi eble ankoraŭ ĝin atingos ĉe la unua gastejo... — sugestis la kamparano.

Kia plua rimedo restis al li? Konsternita de la malbonago, li dankis la viron kaj longpaŝe sin direktis antaŭen tra la vojo.

Dum kvin aŭ ses minutoj li vidis ankoraŭ la nigran makulon, sed ĉiumomente pli malprecizan, pli konfuzan... malproksimiĝantan... Kiam li jam tute ne vidis ĝin, ekterurite de la penso ke li povus bezoni laŭiri la tutan vojon piede, li ekkuris...

Li alvenis al la unua gastejo tiel flavkolora, tiel transfiguriĝinta, ke la gastejmastro opiniis ke li estas malsanulo kiu venas

el vizito ĉe kuracisto. Surmetinte la manon sur lian ŝultron por lin subteni, li ĝin retiris vive surprizita. Interne de la korpo de l' unuenaskito ŝajnis ke saltas malregule, kvazaŭ por elliberiĝi, ia besto enkaĝigita.

La tartano, kiel oni povas supozi, jam de antaŭ kvin minutoj reforiris. Malgraŭ la opinio de la gastejmastro, la unuenaskito volis denove kuriri ĝin atingi. Kiel ankaŭ oni povas supozi, ĉe la zigzago post la gastejo li vidis ĝin pli proksima ol ĉe la antaŭa interspaco, sed jam sufiĉe malproksima por povi supreniri en ĝin tuje, kaj poste ĝi pli kaj pli malproksimiĝadis, metante ĉe ĉiu paŝo pli longan distancon inter ĝi kaj li ĝis kiam ĝi refariĝis maku-lajo konfuziĝanta, ĝis ĝi forviŝiĝis.

Tiam la unuenaskito komprenis klare: li ne plu atingos ĝin kaj pli valoris preterlasi intenci tion. Al li estis devige vojiri piede. Li rezignaciis, ĉesante kuri.

Kiel li daŭrigis tiun vojiron, nur Dio kapablus diri.

Ĉe l' alveno al lia domo, jam nigranokte, oni lin kondukis surbrake al la lito, eĉ kuraĝon li ne havis por supreniri la ŝtuparon.

La morgaŭon la duenaskito iris serĉi la kuraciston, kaj la kuracisto, sciinte la malsaĝaĵon kiun li faris, ekstreme koleriĝis.

—Tio, kvankam oni parolas al ili tre klare!... Ili estas bestetoj, bestetoj, tiele! kvazaŭe!

Ĉar la tagon antaŭfiksitan li ne povus iradi por la juvelaĉeto, la duenaskito supreniris averti tion al la fianĉino kaj la jaŭdon fianĉino kaj ŝia patro venis viziti la unuenaskiton. Ĉi-tiu estis pli senviva ol vivanta, sed li tamen ridetis al la knabino per nedifinita rideto de feliĉo, ŝin ekvidinte.

Okaze venis la kuracisto, kaj ŝia patro, kiam li eliris el la ĉambro, haltigis lin ĉe angulo.

—Pardonu, sinjoro... ĉu vi kredas ke tiu knabo povas edziĝi?

—Ĉu edziĝi?—demandis la kuracisto kun elkaviĝantaj okuloj.—Sed nu! Kiu pensas pri tiuj malsaĝaĵoj?

—Sed ĉar li havas kompromison rilate al mia filino...

—Laŭdata Dio estu! Ĉu vi ne vidas ke li troviĝas ĉe la vivfinaĵo pro la malsano? Se ĉiuokaze vi estas mortigistoj!...

La kuracisto foriris; patro kaj filino restis kaj tiun vesperon refariĝis kunsido apud la kameno.

La morgaŭan tagon matene la mastro de la domo eniris en la ĉambregon de sia filo...

Li aspektis tute konfuzita, tute malkvieta... La unuenaskito ekrimarkis tion.

—Kion vi havas, patro?

—Mi devas komuniki al vi ion, knabo...

—Diru, do...

—Sed mi ne volus ke vi tion prenu kiel malbonon...

Kvazaŭ reflektajo de malkvieteco pasis antaŭ la okuloj de la malsanulo.

—La kuracisto... vi scias?... diras ke... ke vi ne povas edziĝi... ke... tio ne konvenas al vi...

La vizaĝo de l' unuenaskito malgajiĝis.

—Jes, mi jam supozis ke li tion diros al vi. Daŭros multe da tagoj tiu-ĉi malsano, kaj oni ne povas atendi... Ni havas la falĉlaboron sur nin... Sed ne havu timon... La unuan tagon kiam mi estos iom pli bonfarta... ni iros al la preĝejo, kaj poste... kvankam mi troviĝos tiamaniere... ĉio antaŭeniros.

La patro mallevis denove la kapon; la unuenaskito remalkvietiĝis.

—Ĉu tio ne ŝajnas al vi bonopinia, tiamaniere, patro?...

—Vi vidos, filo... mi devas al vi tion konfesi... kaj ne ofendiĝu... Ĝi estas tio ke vi ne povas edziĝi nune... nek iam... Ĉu vi komprenas?... pro la malsano...

—Ha!...—Kaj ŝajnis ke la malsanulo ĵus ricevis trapikon meze de la brusto; malfermiĝis liaj okuloj kaj buŝo, kaj malrapide, malrapide, li deturnis la kapon kaj fiksis la rigardon al sia patro kun speco de sorĉa afliktiĝo.—Nu... do?...—li fine murmuris per voĉfaden.

—Ni... vi scias? Ĉar la parolo jam estas donita... kaj ili okaziĝis jam la elspezojn... kaj... kaj...

—Finu!—petis la unuenaskito, kun avido.

—Ke ni opinias, se tio ŝajnas al vi bona... ke, ĉar ni bezonas virinon en la domo... virino ĉu virino... ĉar nun jam ni ŝin konas... estus indiferece se...

—Kio?... demandis la unuenaskito, subite incitita de suspekto.

—Se ŝi edziniĝus kun la duenaskito kaj... nenio estus malgajnita...

La malsanulo senkonsciigis, liaj okuloj vualigis, lia mano lace deglitis sur la tolaĵon... Pasis longa minuto da silento dum kiu la fulmo de la senkonscia maljusteco tratanĉis animon.

La rigardo demanda kaj samtempe ĉagrena de la patro, kiu ne deturnis la okulojn de sur la malsanulo, konsciigis lin fine.

—Mi jam vidas ke tio malplaĉas al vi...—murmuris la maljunulo kun bedaŭro.

—Ne... Sed ĉar... Kaj poste... ŝi...—Li ne povis ion plu diri.

La respondo estis rapida, triumfa.

—Ŝi jam alkonsentas al tio!

Tiu-ĉi lasta frapo estis definitiva; li eĉ ne havis kuraĝon por tion kaŝi. Intensega plorsingulto ŝajnis splitigi al li la brustan plataĵon; li direktis ambaŭ manojn al la vizaĝo kaj, sen forto por ilin elteni sur ĝi, ili dekliniĝis kiel maturaj fruktoj, denove falante sur la tolaĵon.

La patro afektis geston sekan, senindulgan, de blinda animo.

—Jam mi suspektis ke vi tion prenos tiamaniere...—Sed li tuj dolĉaspektiĝis.—Ni decidis tion kiel bonan faron... Sed se tio vin traskuas...—Kaj, kun denova esprimo de bedaŭro, li finis tute malĝojigite:

—Kiel profite tio iradus al ĉiuj!

Post agoniaz minutoj, la malfeliĉa martiro, submetita, rezignaciinta, konsumiĝanta, deklaris spontane, sen novaj insistoj, ke... tamen... *tio* kion ili proponis estas... afero plej bone pripensita.

La patro fariĝis tre ĝoja pro la solvo de la konflikto kaj mal-supreniris ĝin komuniki al la novfianĝito.

Kiam la kuracisto revenis, li konstatis ke la malsanulo estas pligraviĝinta grandpaŝe. Kaŭze de la malbona sciigo, ili montris urĝon havigi al si la geedziĝdokumentojn kaj, tuj kiam tiuj-ĉi alvenis, la duenaskito edziĝis.

La saman tiutagan vesperon eniris la bofilino al la domo, kaj, kiam ŝi proponis geedziĝosukeraĵojn al sia antaŭa fianĉo, sidanta inter kusenoj apud la fenestro, tiu-ĉi fiksitis al ŝi la okulojn, ŝin rigardis, ŝin rigardis, liaj lipoj tremis, diamanta guto elverŝiĝis el lia larmujo ne defalante. Sed... li povis diri nenion.

Kvardek ok horojn poste, li liveris la animon al Dio.

En plena konscio li adiaŭis siajn samfamilianojn... la bofilino, sendita kurrapide, venis sen tuko sur la kapo; el la malagrafita korsajkolumo elmontriĝis ŝia kolo blanka, blanka kaj mola, graseta... La mortanto fiksitis al ĝi la rigardon, kun timiga persisteco, kaj li jam ne deturnis ĝin ĝis kiam ĝin vualis la ombroj de la morto. Tiam la bofilino memoris la ŝercon (la unikan ŝercon) kiun li faris al ŝi, kaj por la unua fojo ŝi eksentis strangan impreson: la impreson pri honto, pri puno, pri angoro, de tiu kiu antaŭsentas teruran *ion*.

Trad. JOSEP VENTURA

REZIGNACIO

La sonoriloj turniĝis malrapide, plende, laŭ longaj interpaŭzoj kaj malgajaj sonoj, kiuj ĉagrenis la koron. Ŝajnis ke la sonorigisto estas artisto scianta dismovi la aman elfajraĵon, kiu kuŝas en la fundo de ĉiuj animoj, eĉ la plej malmolaj, por ŝpruci el ĝi flamon de frataj sento kaj kompatato.

Ĉie ĉirkaŭ la enirĉambro, sidantaj sur malaltaj seĝoj apudigitaj al la muro, vico de virinoj senmovaj kaj kun la brakoj plektitaj, estis en eniĝemaj pozoj ŝajnigante sur la vizaĝoj dolorplenan geston, per la brovoj streĉitaj kaj la palpebroj falintaj. Ili ŝajnis mistera gardio el statuoj, el parolantaj statuoj, kiuj hore respondis la rozaripreĝon, kiun per plena kaj sana voĉo diris dungita virino, la rondon prezidante de tie, ĉe la plej funda parto de la muro kontraŭa al la strato.

Pendigita per najlo en angulo, la olea lumileto palpebrumis malkviete, kvazaŭ malsana okulo, dismovante per siaj flammovoj de rustkolora lumo la malprecizajn ombrojn, kiuj kvazaŭ grandaj kurtenoj el nigra gazo, funebriĝis la ĉambron.

Pli funde, en la kuirejo, tute mallumigita, la familio, kuniginte, respondis kiel distrita eĉo la unutonan murmuradon de la enirĉambro.

—*Patro nia, kiu estas en la ĉielo...*—diris la dungita virino per plenda tono kaj sen nuancoj.

—*...Panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ...*—respondis pli mallaŭte la horo el dolorataj statuoj.

—*...donu al ni hodiaŭ...*—postzumis malakurate la nesonora murmuro en la mallumigita kuirejo.

Kaj oni aŭdetis malgrandan brueton de movataj rozarioj, kaj la paroĥaj sonoriloj... *ning! nang!... ning! nang!...* dissendis super la vilaĝon, ekdormantan en la noktrepuska paco, sian plendan sonoradon por mortintoj.

Subite, la avo, la vidvo, stariĝis meze de siaj samfamilianoj kaj, sen bruo, kvazaŭ li ne tuŝus la teron, supreniris la ŝtuparon. Kiam li jam staris sur la lastaj ŝtupoj, la ligna ŝtuparo krakis.

—*Iu supreniras!*—spire diris la bofilino kun ektime.

—*La patro,*—silabis la plej aĝa filo per neaŭdebla voĉo.

Kaj ili trankvilanime daŭrigis la preĝadon.

Supre, malforta brilo eliris tra la pordeto de la koridoro: ĝi estis de la lumilo, kiu gvardiis la mortintinon.

La avo, la vidvo, eniris en la ĉambron: li tenis la brakojn pendantaj kaj la kapon sur la brusto. Apud la ruĝa rando de la kataluna ĉapo, elturnita, la haroj blankis kiel kanaba ŝpinaĵo; la tuko el nigra merinosa ŝtofo, volvita ĉirkaŭ la kolo kvazaŭ buŝoŝirmilo, kovris al li la mentonon kaj buŝon; lia brusto ŝajnis pli enfundiĝinta ol kutime sub la trikoto, kaj la dorso pli ĝibiginta.

Li alproksimiĝis al la lito malrapide, trenante la piedojn, kvazaŭ li ne povus ilin sekvigiti. Sur la littuka freŝo kuŝis la mortintino, tute rigida, nigrevestita, kun la brakoj etenditaj kaj la manoj flavaj, de malpura latunkoloro, krucigitaj sur la ventro; el inter la fingroj eligis la rozario el lignosimila ŝelo, kies kvasto dubeblua estis glitinta sur la maldekstran femuron kaj pendis, kun la faden-tordadoj malkombitaj, kvazaŭ etendita hararo de enabismiĝinta virino. La kapo ripozis sur la lito mem, pli malalte la frunto ol la mentono, kunportante nigran kaptukon kaj alian koloran, falditan kaj volvitajn kiel bandaĝon ĉirkaŭ la makzeloj kaj ligitajn ĉe la vorto por eviti ke la buŝo de la kadavro malfermiĝu; kaj la buŝo, perforte fermita, formis malsupre sur la vizaĝo longan trapasantan sulkon, per la lipoj enigitaj, entiritaj de la truo de la sendentaj gingivoj. Apud la sulko, la nazo, akra kiel birda beko, montris la truojn, longajn, nigrajn, malfermitajn. La piedoj, nur vestitaj per linaj ŝtrumpoj, streĉis ambaŭ plandojn kunigitajn, rektajn, rigidajn kiel starigitaj manoj, kiuj volus haltigi la enirantojn.

Malgraŭ la ventaĉo, kiu pasis tra la tute malfermita fenestro, kiel spiraĵo tra gorĝo de kvieta monstro, en la ĉambro oni sentis

strangan odoron, eteran odoron el la lasta medikamento, kiun la malsanulino trinkis, kaj vaksan odoron el la kandeloj, kiuj brulis dum la sanktoleado. Sur la tableto proksima al la pordo, olea lampo, en tera telereto, kraketis de tempo al tempo, kvazaŭ estus salo ĉe la meĉo; kaj apud la telero, la ŝuoj de la mortintino ŝajnis akompani ŝin. Oni ne metis ilin al ŝi ĉar piedvesti mortinton venigas malfeliĉon: mortinto, kiun oni portas piedvestita al la tombejo, antaŭ unu jaro sekvigas samfamilianon.

La avo, la vidvo, haltis proksime de la litkapejo: li havis la okulojn sekaj kiel du maldiafanaj vitraj pecetoj, kaj laŭlonge la pantalonojn, tremis la manoj, malglataj kaj malmolaj kiel ungegoj de raba birbo, kun tiu nekuracebla tremo, kiu lin senutiligis por ĉiaspeca laboro. Li levis la kapon malrapide kaj rigardis la mortintinon; de antaŭ pli ol dudek jaroj li ne rigardis ŝin tiele, intence, pro memvola impulso. Li ŝin rigardis, sed kiel oni rigardas nekonatan aferon, kiun oni eĉ ne deziras koni: per rigardo malbrila, malvarma, pli mortinta ol la mortintino mem; kaj li vidis glatan frunton, kun la haŭto streĉita, kvazaŭ gluita sur la ostoj, kaj malgrasan, maldikan kolon, kiu flavis inter la korsajo kaj la kaptukoj kiel disŝirajo de ranca grasajo. La avo, la vidvo sentis ke ia strango boris en li, kredigante al li ke tiu rigida virino neniel estas la sama virino je kiu li edziĝis kaj kun kiu li kunvivadis dum tiom da jaroj; kaj mirigita de tiu mirigaĵo, restis rigardante la kadavron per fiksa rigardo, kvazaŭ al li ankaŭ estus haltintaj por ĉiam liaj pupiloj inter la palpebroj.

Dume, tra la malluma fenestra kadro daŭris enirante la dolor-tonaj plendoj.

—*Patro nia, kiu estas en la ĉielo...*

—*Ning!... nang!... ning!... nang!...*

—*...pardonu miajn kulpojn kiel ni pardonas...*

Kaj tra la ŝtupara ŝakto senskue supreniris la malakurata mururo de la kuirejo:

—*...kiel ni pardonas... miajn ŝuldantojn...*

Subite, tra la kvieta densaĵo de la cerbo de l' avo, pasis la lumo de penso, kiel pasas luna radio tra maldensejo de primitiva arbaro. Li pensis ke baldaŭ tiuj sonoriloj resonoros por mortintoj, kaj la vivinoj senmovaj, repreĝos rozarie en la enirĉambro. Sed li tion ne aŭdos: li kuŝos kuntirita, rigida, sur tiu geedza lito, tie mem kie nun kuŝas la edzino. Tiu penso estis klara, el pura klareco; sed ĝi restigis la avon serena kaj trankvila kvazaŭ ĝi neniam estus pasinta tra la mallumo de lia cerbo, kvazaŭ ĝi nenion estus kompreniginta. Nek la koro plifortigis sian ritman kaj malfortan batadon de eluzita maŝineto, nek la maldiafanaj vitroj rebrilis pro la eliro de larmo. Li ja sciis ke li estas maljuna kaj ke la maljunuloj devas delasi la vivon kiel delasas la arbon la matura frukto. Tio estis natura, kaj la naturaj faktoj estis tute ne timigaj por la avo. Ĉiu samaĝa kamarado aŭ kamaradino, kiu

foriris, ŝajnis montri al li la vojon kaj fari al li signon por ke li lin sekvu; kaj li estis preta volonte sekvi ilin. Ĉar, fine, "kion li devas plenumi en tiu-ĉi mondo?" li diris al si. En ĝia tempo li plenumis sian devon kiel viro, sed li jam ne plu povas levi la fosilon nek teni la hakilon, kaj jam delonge la plej aĝa filo kaj la bofilino mastrumas la domon kaj ili ne havas sufiĉan lokon por enloĝigi la idojn. Estis necese, do, malplenigi lokon: tiu ĉambro plendpostuladas novajn loĝantojn, kaj li, la avo, volonte lasos ĝin al ili. Nun, krom liaj kamaradoj, jam vokas lin *tien supren* la edzino, kiu etendas al li la manon por helpi lin trapasi la pasejon, kiu apartigas tiun-ĉi mondon de l' alia. Ŝi faru tion tre baldaŭ, kiel eble plej baldaŭ!... Kaj la avo rigardis la mortintinon, kvazaŭ memorigante al ŝi tiun sekretan deziron, kaŝitan malantaŭ liaj maldiafanaj kaj fiksjaj pupiloj. Sed, kvazaŭ subite kaptus lin la timo ke la edzino lin forgesos kaj lin lasos sola sur la tero, li havis inspiron por memori ĝin.

Malrapide, trenante la piedojn, kiuj ne volis sekvi lin, kun la kapo sur la eniĝinta brusto kaj la dorso pli ĝibiginta ol iam ajn, li foriĝis de la lito kaj alproksimiĝis al la tableto, etendante siajn tremantajn manojn; kaj ŝajnis, ke ekvidante tiun agon de la maljunulo, la du veluraj ŝuoj, frate parigitaj kaj movigataj de mistera impulso, antaŭeniris al li, por ke li ilin prenu pli baldaŭ.

Kaj la avo prenis ilin, reiris al la lito, kaj en la moviĝanta lumo de la olea lampo, kiu kraketis kvazaŭ estus salo ĉe la meĉo, li vestis trankvile, serene, la rigidajn piedojn de la mortintino.

Tra la malluma fenestra kadro eniris en la ĉambron la mal-laŭtaj lastaĵoj de la finiĝinta rozaripreĝo, kaj la vasta kaj korporemana *ning!... nang!...* de la sonoriloj.

Trad. ESTANISLAU PELLICER

FREDERIC PUJULÀ

(1877)

Frederic Pujulà i Vallès naskiĝis en Palamós. Baldaŭ lia familio kondukis lin al la insulo Kubo, kie li loĝis ĝis la 10-jara aĝo. Revninte en Katalunujon, li studis kaj fariĝis advokato en la Barcelona Universitato. Li estis unu el la plej aktivaj kunlaborantoj en la revuo "Joventut", kiu estis tre ŝatata dum sia sepjara vivo. En ĝi li aperigis multnombrajn artikolojn pri politiko, filozofio, literaturo, kritiko, k. t. p. Krom tiuj artikoloj, li verkis dramojn, satirajn teatraĵojn kaj du interesajn librojn "Titelles febles" kaj "Homes artificials".

Li longe vojaĝis tra Belgujo, Nederlando, Germanujo kaj Francujo. Dum unu el tiuj vojaĝoj li fariĝis esperantisto, kaj oni povas diri, ke li estas kiu enkondukis Esperanton en Katalunujon. Li verkis la unuajn lernolibrojn kaj vortarojn katalunajn pri Esperanto, kaj en 1909 li estis ĉefa organizanto kaj Prezidanto de la V^a Universala Kongreso en Barcelona. Li estis unu el la fondintoj de "Kataluna Esperantista Federacio" kaj dum kelkaj jaroj agis kiel pioniro de la kataluna movado. Jam en 1912 li estis la iniciatinto de la ideo pri la nuna "Kataluna Antologio".

Vigle partopreninte la politikan movadon katalunan, li forlasis sian econ de hispanŝtatano por fariĝi ano de la franca ŝtato. En 1914, troviĝante en Parizo por partopreni la Xan. Kongreson, li estis mobilizata, kaj li partoprenis la tutan Eŭropan militon ĉe la franca armeo. De tempo al tempo li sendis interesajn impresojn al la katalunaj ĵurnaloj. Post la milito, li aperigis katalunan libron "En la ripozo de la tranĉeo", kiu havas paĝojn kompareblajn al tiuj de "Le Feu" de Henri Barbusse.

Nia estimata amiko Pujulà, kvankam vigle okupata pri aliaj aferoj, konservas sian simpatian por Esperanto kaj de tempo al tempo aperas ĉe la Barcelonaj samideanoj, kaj regalias ilin per unu el siaj spiritaj kaj spritaj paroladetoj. Li ja ne perdis sian majstrecon pri la lingvo, kvankam li diris, en unu el siaj paroladoj tuj post finiĝo de la milito, ke li timas "esti perdinta la spiriton de Esperanto ĉe la koto de la tranĉeoj"...

Bibliografio: Katalunaj verkoj: Creuant la plana morta; L'illa de Vademecum; Titelles febles; Homes artificials; El geni (Triakta dramo); El boig (triakta dramo); Dins la gàbia (1 akto); La Veu del Poble i El Poble de la Veu (satira teatraĵo); El metge nou; En el repòs de la trinxa. Traduko: Kaatje (el la flandra Spaak). Esperantaj verkoj: La rompantoj (kvin monologoj); Mistero de doloro (trad. el Adrià Gual); Aŭtunaj ventoj (unuakta

dramo); Naivulo; La grafo erarinta; Curs pràctic de la llengua Esperanto; Gramàtica raonada de la llengua internacional Esperanto; Vortaro Esperanto-Kataluna; Vocabulari Català-Esperanto.

ĈEVALO

Kien oni lin kondukas? Li ne plu sentas sur la flanko la timon de la droŝko, kaj lia kamarado ne marŝas apud li. Sed li sentas sur la dorso la pezon de kavaliro, tute kiel dum tiu tempo, kiam oni okupis lin en heroaj klopodoj, kaj iom da fiereco varmigis lian sangon. Kial ĝuste por tiu tago de gloraj rememoroj oni bandaĝis liajn okulojn kaj blindigis lin? Kien oni lin spronos?

Li ja troviĝas en la urbo: la pavimoj ne permesas erari. La homoj staras laŭ du bruemaj vicoj inter kiuj li amblas. Eble la tago de la justeco, rekono kaj dankemo jam alvenis. Malfrue, kiam li nur staras en ostoj kaj en haŭto, sed fine oni eble dankos liajn servojn... Tamen, kial nun ĝuste, kiam printempo floras ĉe ĉiu branĉo kaj varmo de l' aero reunigas, kiam ĉio lumas kaj festas, ĉio parfumiĝis kaj la horo de dankemo alvenis, kial ĝuste nun oni blindigis lin per ĝenanta, mallerte alligita tuko? La fera kruro de l' rajdanto doloras lian dekstran flankon.

La ĉevalo memoras. Kaj li klopodas paŝi elegante. Sed liaj genuoj krakas eluzitaj, liaj hufoj tordiĝas, liaj nervoj kaj muskoloj lacigitaj tradukas la deziron per mallerta implikiĝo. La stelo de la sprono glitas sur ripo. Kia giganta heroo rajdas lin?

Iam, kiam li estis juna kaj fortika, ili staris milope en regulaj vicoj, tremantaj sub retenaj rimenoj, agititaj de nervoskuoj de juneco. Akraj trumpetoj splitis siajn sonojn tra la aero, la polvo de l' amaso nubigis super iliaj kapoj, la tinto de armiloj kaj froto de ledajoj tondrigis la kamparon. Tiun unuan tagon de batalo neniam li forgesos. Ĉe la kontraŭa flanko kelkaj grizaj nubetoj ŝvelis super horizonto kaj krakado aŭdiĝis. Ĝi estis kvazaŭ signalo: la amaso ekgalopis, kaj li sentis ke li iras kun ĉiuj al defendo de io grava grave atakita. La polvo kaj la fumo plidensiĝis, la bruo pligrandiĝis; ordo regadis tamen super ŝajna malordo. La suno rompis siajn radiojn sur klingoj kaj kiraso; tie-ĉi-tie ekfulmis la kanonoj kaj grumblis mitralaĵoj. Li kuris, trotis, galopis, saltis, kapreolis. Li estis vundita, tamen li kuris; lia sango elŝprucis el lia brusto, tamen li trotis; ĝi fluis sur la kruro, tamen li galopis; ĝi malvarmiĝis sur la haŭto, tamen li saltis kaj kapreolis. Pulvon

kaj polvon nur, oni enspiris. Sed lia rajdanto falis kaj li haltis. Li haltis tiam nur, kaj rigardadis la rajdinton en liaj lastaj frostremoj. Kaj li protektis lin per sia korpo, kaj lekis lian vizaĝon. Li sentis sin plenega de kompatio por la homo... Ha, li laboris bone por la bono de sia propra lando!

Li restis iel invalida. Tra la vundoj, la mistera forto de juneco trafluadis; la brusto kunpremiĝis kaj sufokiĝis. Adiaŭ, paradoj kolorplenaĵ, heroaj trairadoj kaj kavalkadoj bruaj. La nova stato ne plaĉis al li unue, sed baldaŭ poste li alkutimiĝis kaj eksentis, ke ankaŭ tiel li servadis al la lando. Dum senfinaj aŭtunoj li tenis la plugilon sur la sanganta tero; dum brulantaj someroj li piedpremis grenon sur draŝejoj; dum longaj vintroj, sur frostiĝintaj vojoj, de l' kampo al urbo kaj de l' urbo al kampo, li tenis la ĉareton ŝarĝitan de nutraĵoj por la homoj. Kaj li plenumis la malsuperan taskon kun blinda sindonemo de obeema besto. Miloĵ, kiel li, laboras tra la tuta lando; ili helpas riĉecon kaj prosperon helpante la loĝantojn. Li sin sentis fiera, ŝuldiganta dankemon de la homoj.

Tiu feliĉa tempo ankaŭ malaperis. Novan epokon li devis traviĝi kaj denove novajn kutimojn li devis alpreni. Nun estas la angulo de la strato, kie la vento siblas senkompata, kaj la malnova droŝko haltigita senfine ĉe l' stacio, ruliĝanta kun bruo de feraĵoj, semanta ŝraŭbojn kaj splitaĵojn sur la vojo. Kaj ankaŭ la vergado sur la dorso por kontentigi tage rapidemon de borsisto aŭ turisto, nokte—senpaciencon de malfruiĝinta kuracisto kun familiano...

Sed nun, fine jen la gloro. Li trairas la urbon en heroa marŝado; por vidi lin la homoj amasiĝas en du respektajn vicojn. Li sentas fluon de danko falanta en lian koron kiel manpleno da tritiko ŝutata en traplugitan teron... Floros en ĝi la ĝojo kaj kontento.

La cirko bruas per milopaj bruoj de tridek mil personoj amasigitaj sur la ŝtonaj ŝtupoj. Varmo de suno kaj vino boligas la popolan sangon. Lumo blindigas per movo de multkoloraj ventumiloj, flirtado de poŝtukoj, svarmado de l' amaso, interkizado de lipoj kaj oranĝoj. Krioj salutaj kaj alvokaj, ŝercaj kaj mokaj, miksiĝas kaj zumadas en la aero kiel siblado de bolanta kaldrono. La birdoj, kiuj superflugas, nepre sin demandas, al kiu apartenas tia giganta okulo sen pupilo,—kia svarmanta puzo ĝin mordboras.

La lastaj notoj de nacia himno mortas en la spaco, kaj ĉiu brusto retenas eĉ spiradon; sub mantelon de silento kaŝiĝis ĉiu bruo; kaj la subita malluĝo estas iel dolora. Dekstre, triope, ĉevaloj staras rajdataj de travestiitaj viroj—la kruroj en feraj ingoj, la akselo kaj pugno premantaj longajn pikilojn.

Ĉe la akrega lumo de la suno, la pordo de la stalo malfermiĝas kaj desegnas makulon nigran. En la kadro aperas la silueto de l'kor-

nohava bruto,—la lipegoj ŝaŭmantaj, la kapo vibranta ankoraŭ pro l' incito de pikoj ĉe l' brutejo. Ĝi rigardas la dezertan arenon, blindigan, vibrantan ankaŭ en la elvaporigo de la varma posttagmezo. Ĉe la alia flanko, tuko agitiĝas. Tro malproksime—la malantaŭ ĝi, la pordo refermiĝis kun malmola bruo. Maldekstre—la ĉevaloj. Oni ĝin vokas. Ĝi streĉas la muskolojn, malstreĉas ilin, saltas kaj alkuras. Ĝi korncelas la homon, sed io, la pikilo, ĝin haltigas. Alkroĉita al la selo, la homo retenadas la brutan puŝon, ruĝa pro l' peno, streĉanta sian korpon je superhoma forto. La taŭro puŝas ankaŭ apogita en la truoj, boritaj de la hufoj en la tero; kaj flueto de sango ruĝigas ĝiajn ŝultron kaj maldekstran kornon. En la giganta daŭrigo de la peno, la ĉevalo tremetas, ŝanceliĝas kaj cedas; la pikilo tuŝas oston, grandigas la fendegon de la haŭto kaj glitas. La taŭro venkas la reziston kaj antaŭeniras je unu paŝo: li skuas la korpon kaj enigis la kornojn en la bruston kaj kolon de l' ĉevalo. Sango fluadas tiam kvazaŭ tra malfermita krano, ŝprucas al tero, al bariero, makulas la brutdorson, marĉiĝas sur la sablo jam sufiĉe trempita. Kaj la ĉevalo tremas sur la kornoj, pendanta kiel felo de najlo, sentante jam trakuron de malvarmo sub sia faldoplenta haŭto. Pro ĝia malforteco la homo estis venkita, elŝirita de lia selo, jetita kontraŭ la fostojn de l' bariero en mortiga falo; eble li mortis jam ĉe l' brakoj de la helpistoj, kiuj lin kunportas nun. Pro malforteco de la ĉevalo nur! El ĉiu brusto elŝiriĝis ekkrio. Dume la bruto ankoraŭ furioza, blindigita de la ruĝo de l' sango, en nun facila batalo trapikas kaj elfinas la ĉevalon, taŭzas lin kiel pelton, rejetas kaj rekroĉas lin denove. Jen nun ankoraŭ vundo ĉe la kolo, jen ĉe la brusto, jen fine ĉe la ventro; kaj jen la intestoj falas en pakaĵo sur la sangan teron. Tiam de ĉiu flanko de la cirko oni aplaŭdas al la bruta braveco, kiel puno al la kulpa ĉevalo, la porka rajditaĵo, kies malfortaj kruroj difektis la belfinon de la ludo. De ĉiu buŝo iras pezaj vortoj al kraĉinda ĉevalaĉo, al la infera felaĵo, al la senpatra ido de la koto. Boteloj kaj oranĝoj flirtas tra la spaco al lia frostremanta haŭto.

Li dekroĉiĝis nun de l' kornoj de la bruto jam distrita, provas forkuri, sed vane. Ĉe ĉiu mallerta paŝo liaj kruroj implikiĝas en la intestoj, tiras la sangantan rubandon, malplenigas la ventron. Komike li hezitas, ŝanceliĝas, kaj sub publika rido, li falas kun bruego de meblo renversita. La blindiginta tuko demetiĝis dum la skuoj de l' lukto. Sian belan okulon li malfermas, li rigardas surprize. "Kio! Homoj? El kiu lando—ili?" Unu botelo frapas la okulon kaj fermas ĝin por ĉiam.

TRADUKO DE LA AŬTORO

ANGEL RUIZ PABLO

(1877)

Bibliografio.—Per fer gana (prozajoj); Del cor de la terra (novelo); Poesies (poemoj).

LA AMO

Amo, dolĉa turmento, vundon faras
kaj samtempe kuracas per magio;
ĝi nutras sin per revoj, nostalgio;
kie ĝi vivon vidis, morto staras.

Amo havas eternan flordiforton,
mortas de l' frukto, vivas de l'espero;
amo vivas en glora vivlibero
kaj nur en l' ideal' ne trovas morton.

Ne tentu vin am' viva en real',
nek am' vivanta nur en nuna hor',
ĉar amo estas ja nur iluzi'.

Des pli, amo ĝi estos — ju pli for;
ĉar amo, majstr' en ĉia ideal',
vivas nur en fiktiva fantazi'.

JOAN MARIA GUASCH

(1878)

Joan Maria Guasch, naskiĝinta en Barcelona, unu el la plej eminentaj poetoj katalunaj, preskaŭ ĉiam glosas Naturajn temojn. Li profunde sentas kaj scias sentigi la poezion de la pejzaĝo, de hela floro, de paca herbejo, de maturiĝinta frukto, de gaja akvoflueto, de ĉiu malgranda detalo en la naturo. Liaj poemoj estas tre originalaj kaj karakterizaj, tre propraj de li, havantaj nuancon tute specialan kaj ĉarman.

Tra la verkaro de Joan Maria Guasch, brilas kaj aromas la tuta mitologio de la Pireneo, kun ĝiaj nimfoj, paŝtistoj, faŭnusoj, lagoj, kavoj kaj neĝbrilaj montsuproj. Li majstre prezentis, en amaso da poemoj aŭ poemetoj aŭ simple poeziaj notoj, ĉiajn detalojn de la naturo kaj la vivado en la alta montaro kataluna.

Per la sekvantaj tradukoj, espereble la leganto povos ĝui iom el la ĉarma poezio de nia kara Guasch, ĉiam kaj ĉiel facila, klara, inspirita kaj *natura* poeto.

Bibliografio: Poemoj: Joventut (1900); Pirenenques (1910); Ofrena (1912); Branca florida.

EKLOGO

Min pri la rakont',
kanzon' de montano,
sur Aneto-mont'
instruis paŝtisto en sia kabano.
Pri ĝi, kiel flor'
en solec' arbara,
vivas rememor'
sur la pint' montara;
tra temp' gardis ĝin
paŝtisto, kantanta
en nokto pro tim',
dum iras la urs' tra arbaro giganta.
Sub pin' iam mi
aŭskultis, ravata:
impona vizi'
elfloris el kanto de l' paŝtist' glosata.
Kun jena la ton'
aŭdiĝis kanzon':

Malantaŭ Anet-pint' brilanta nune
 kronite per la neĝ', kun ruĝnuanco
 tiun vesperon alstariĝis nubo.
 —Nokton malluman signas!—mi al knabo
 diris, ĝin rigardanta kvazaŭ vidus
 li de grandega rozo la floradon.
 —Dum mi ĝis supro iros kun la hundo,
 al kuŝejo konduku la brutaron!—
 Kaj preninte bastonon, supreniris
 mi, senhalte marŝante, ĝis la lagoj.
 La nokto kreskis. Saturita akve
 etendiĝis ĝis fundo de la valo
 la nova herbo de paŝtejoj supraj;
 aromon de l' arbar' kapreolaro
 trankvile flaris, kiun vent' forportas
 malsupren sur la vojon al kabano.
 Veninte ĝis abioj, ho mistero!,
 parolantajn sub freŝo de la arboj
 mi surprizis virinon tute junan
 kaj viron kun piedoj kvazaŭ kapro,
 harriĉan, kornohavan, kun pendanta,
 sur lia dors' sunbruna, flut' el kano.
 Belega kiel floro nimfo estis,
 ligiĝis ŝiaj haroj kiel garbo,
 kaj sur mamoj la ŝiaj helruĝiĝis,
 el burĝon' ne krevintaj, du dianto.
 Mi, ĉiam je novaĵoj scivolema
 rakontindaj dum posta travintrado,
 sub ia ŝtono longe min kuŝiĝis
 kaj en pelton enigis mian kapon.

—Rigardu, jen!—la nimfo bele diris,
 kisante lian frunton kun fervor';
 kaj brula kis' el ruĝa buŝ' deiris,
 mire kurante tra l'arbaro for.

—Rigardu kiel venas nokt' serena:
 sur neĝo, nek vualo de nebul';
 arbar', en dorm'; kaj herbo, parfumplena;
 por amadi jen hor', mia karul'!

Dum en suproj degelis prosomere,
 la Aran-valon adiaŭis mi:
 ĉar en suproj vin sciis mi parkere,
 parkere nur, la pleje granda sci'.

Nun, apud mi, sunbruna via haŭto
 odoras kiel pin'; en ĉirkaŭpren'
 dormadi volas mi ĉe nokt-mallaŭto
 sur viaj fortaj brakoj por kusen'.

Ni ĝuos nian amon en libero:
 en lagojn vintre sub glacimantel',
 en suprojn de montaro dum somero
 por atingi la lumon el ĉiel'!—

Kaj diris li: —Ho, kia rozodoro
 disfalas de abioj el branĉar'!
 Sed, silentu pri am',
 ĉar sensentiĝas koro,
 kiel en vintro de malvarma jar'!

Faŭnuso maljuniĝis! Kantis ame
 mi, kiam estis mia sang' en flor';
 juneco mia forte vibris, same
 kiel tintil' el or'.

Plej bonan kuŝolokon en fagaro
 sub suna varm' elekte serĉis mi;
 malvarma fluis de fontan' akvaro
 el suproj, tutkovritaj de glaci'.

Kaj ĉirkaŭ min la nimfoj kolektiĝis
 sur la mola herbejo por petol',
 kaj rikoltante fragojn disperdiĝis
 tra vojoj plenaj de malluma sol'.

Mi vokis la plej belan
 kaj plektis kanton ambaŭ ni en hor'...
 Mortiĝis kant'... sur ŝia buŝ' anĝela
 elkreis mia kiso kiel flor'.

Sed nun, kiam, se pintojn mi aliras,
 turniĝas mia kap', kaj eĉ dum halt',
 kaduka jam, mi tuse febrespiras,
 ĉar ilin trovas mi de troa alt',

por mi amadi estas malgajajo;
 nigrec' por mi—por vi, kolor' de sang';
 por mi kis' estas mort'—por vi, belaĵo;
 sur viaj haroj, blond'; ĉe miaj, blank'!—

Kaj ploris la faŭnus'! Kaj je ŝancelo
 malgaje diris ŝi: —Falinta arb'!

Sur via morta ŝelo
junecoflorojn volvos mi en garb'!

Mi lasta nimfo estas!
Ĉiujn faŭnusojn jam forprenis mort'!
Ankoraŭ ruĝa mia buŝo restas,
en vi—ne batas kor'!

Forkuru ni! Mia harar' radia
en kavaĵo dum noktoj ŝirmos vin;
velkos beleco mia
sen la parfum' de l' ĝoj' esti patrin'!—

—Ho, ne, nimfo tre kara!—
kaj faŭnus' ŝin alprenis al la kor';
poste, per mano hara
okulojn viŝis, ruĝajn de la plor'.

—Fandiĝis nia raso!
Ke restu por paŝtistoj tuta spac'!
Ili venu kun sia bovamaso
al herbejoj sur mont' plenaj de pac'!

Ni mortu! Roko brava
atestos pri la granda am-ofer'!
Vivon ne volas sklava
mi sub perforto de la hommizer'!—

Kaj al krutaj' kiel lavanga falo,
ili subite ĵetis sin en ĝin...
kaj krakis la arbaro, kaj en valo
l' unua flock' nebula levis sin!...

Tiam mi kun teruro tuj demetas
galoŝojn kaj pendigas peltvestaĵon;
de ŝton' al ŝton' malsupren mi min ŝovas
kaj atingas la fundon de l' krutaĵo.
Al mi prezentis tie roko brava,
ruĝa makule de ilia sango,
apud kornulo la malfruan floron!
Pasis jam multa tempo post l' okazo,
sed konservas mi tamen tiun fluton
memoraĵon de l' vir' ŝajninta kapro.
Prenu ĝin! Vi retrovos la aromon
el la, de l' maljunulo, lasta kanto...
Por mi l' alia memoraĵ' dolĉega:
manpleno da hararo, flock' el garbo
en suproj noktomeze rikoltita,

kiel sanktaĵo, per la ambaŭ manoj.
Adiaŭ, nu: jen tuj vespera pluvo
kaj jam trans monton iris la brutaro.
Ĉar rakonton vi scias, mi vin benas
kaj faras je l' montaroj heredanto!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LAŬDO

Al rikoltantino de oranĝoj

Antaŭ la mar', je horo sunoplana.
Ĉe l' bela land' de l' oranĝarb' en flor'.
Plaĉas al mi l' interparol' serena
kun la virino de la land' el or'.

Kun la virin' oranĝojn rikoltanta,
pleniĝinta pro tio de parfum',
la gracia virin' sin ornamenta
per vest' brodita de la hela lum'.

L' okulbrila virin', flor' de l' ĝardeno,
kiu ridas kun laŭta rid' sen ĝeno,
kun rido ŝpruca kiel ĝoja kant'.

Kiu montras donacon de l' bril' suna:
lumplektita trezor', la haŭto bruna,
arda simbol' de fort' kaj plena san'.

LAMPIRO

Nokt' de somer',
nokt' de parfum',
raŭpo de lum'
kun la lantern'

Dum la vagad',
tra la mallum',
aŭdiĝas zum'
de kisa ŝmac'.

tra la ĝarden'
laŭ la hazard',
vagas por gard',
vagas sen cel'.

Somer' de am'!
Nokt' de parfum'!
Malbrilas lum'.
Ekridas raŭp'.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

KANTO DE LA RUGA DIANTO

Falas dolĉe pluvo-kant'
kaj aromas la ĝardeno.
Tremas juna ruĝdiant'
pro la kiso de l' aero.

La diant' kun sangkolor'
kiel tru' de iu vundo,
vivoplene grimpas for
el la koto de la grundo.

Ardan bruston serĉas ĝi
ĉar Am' estas io granda
kaj ofero de pasi'
estos ĝia vivo sanga.

Ruĝdiant' kun ama ard'
donas sin al la revaĵo:
—Mortos mi sur ĉefaltar'
de virino mirindaĵo...—

Falas dolĉe pluvo-kant'
kaj aromas la ĝardeno.
Tremas juna ruĝdiant'
pro la kiso de l' aero.

LA FALO DE L' FRUKTARO

Mistero de aŭtun'. Ho, morto dia
de l' fruktaro falanta sen dolor'!
Mi rigardas la frukton en ador',
sukan kaj pezan pro matur' ebria.

De lakto kaj miel' trezor' magia,
sunoplana parfum', ruĝo kaj or',
eliĝis el la iam eta flor'
kun sorĉo kreipova kaj gracia.

Virino klinas sin kaj fruktojn prenas,
ĝis ŝi da ili plenan kruĉon tenas.
Miraklo de la frukto kaj la man'!

Amo regas en hejm'. Se malvarm' venos,
ni el la kruĉo fruktmielon prenos
por dolĉigi buŝetojn de infan'.

LA MUELISTINO

Dum elŝutas vi sakojn da tritik',
muelejon plenigas polv' el or';
dum elŝprucas la granda homtrezor',
parfumplena vi estas kiel spik'.

De l' muelest' vin celas l' okulbril'
kaj buŝe li vin kisas dum ripoz';
via sino ŝveliĝas kvazaŭ roz',
anonco pri venanta via fil'.

Ĉio estas ĉe vi en bona ord'.
Vinberarb' ombron donas ĉe la pord'.
En ĝarden' falas jam maturaj fruktoj.

Senĉese ruliĝadas muelil'
kaj vi revas pri veno de la fil'
en atendaĵo de l' patrinecaj luktoj.

LA MISTERO DE L' HERBEJO

Apude de l' river' floras trankvila
la junfresa herbej', velursimila...

Tagmeze mi ĝin vidis
brulantan de lumhel',—blindiga brulo—
kaj ankaŭ nokte, kiam sur ĝi sidis,
anstataŭ luma ĝoj', densa nebulo.

Herbej' misteron havas;
nur l' akvo konas ĝin, en ĝi kantanta;
kial ĝia florar' tiele ravas
ĉiun, kiu ĝin estas rigardanta?

Eĉ la nimf' de l' rivero, kuŝigante
sur ĝi sian nudecon,
harligojn malplektante,
de ĝi petas imiti la belecon.

Sed silenta, trankvila,
dormiĝas freŝa herb', velursimila...

LAMPIRO

De lili' skuiĝas
parfuma elspir':
al musk' subeniĝas
la luma lampir'.

Smeraldo vivanta,
ĝardena trezor':
vi estus brilanta
en ringo el or'!

—Jen, prenu!—mi petus
de l' mitra ĉefpastr',

kaj vin li surmetus
al fingro sur gant'.

Popol' per voĉ' forta
ekdirus: —Sinjor'!
kian helan portas
li ringon el or'!—

Kaj kiam li movus
la manon por ben',
al ĉiu alblovus
parfum' de ĝarden'!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

KANTO DE LA KLARA VIVO

Unu vivon aŭ du vivojn,
aŭ kiomajn havas Vi?
Vi ja havas mian vivon
kaj tiun de ambaŭ ni.

Vi havas la etan vivon
de venanta infanet',—
ama flor', bela frukteto
kiel ĉeriz' dum somer'.

Vi estas branĉ' kurbiĝanta
pro la frukta maturec';
Vi havas la tutan forton
de mia viv' kaj junec'.

Vi havas en la rigardo
la ĝojon de l' klara viv'
kaj venontan rikoltadon
Vi havas en via sin'.

La amo nin ĝojiganta
iĝis promeso por ni:
infan' kiel florbukedo,
kun okuloj-lumradi'...

Unu vivon, aŭ du vivojn,
aŭ kiomajn havas Vi?
Vi ja havas mian vivon
kaj tiun de ambaŭ ni.

POR VI KAJ POR MIAJ INFANOJ

Al amiko

—Jen verketo por infan'!
—Ho, amik', ĝin ni bonvenu
kaj infanoj miaj tenu
ĝin por ĉiam en la man'!
Ili ĝoju je l' parfum'
de la nobla via koro;
ili ĝuu, de l' vivgloro,
kio floras en la lum'.
Lum' interna kaj ekstera:
lum' de vi kaj de l' kampar'...
Ho, se ree horo venus
ĉiuj iĝi infanar'!